

GÉZA GÁRDONYI
STELOJ DE EGER



HUNGARIA ESPERANTO-ASOCIO

GÉZA GÁRDONYI

STELOJ DE EGER

ROMANO

Hungaria Esperanto-Asocio

Originala titolo de la romano:
Egri csillagok

El la hungara originalo tradukis:
Jozefo Horvath

Unua eldono: 2012

Titolpaĝo:
Bertalan Székely: Virinoj de Eger

ISBN-n-ro: 978-963-571-476-6

Antaŭklarigo

Por iom prilumi la fonon de la agado de l' romano kaj komprenebligi al legantoj ne familiaraj kun la mezepokfina historio de Hungario mi konsideris necese doni kelkajn skizajn klarigojn pri la historiaj kaj politikaj cirkonstancoj de la tiutempa Hungario.

Kiel mezpotenca regno en Mez-Eŭropo Hungario enklaviĝis inter du grandpotencoj: la okcidenta Habsburga kaj la orienta Otomana Imperioj. Tempe de la agado de l' romano, do komence de la 16a jarcento, la hungara ŝtato, kiu malfortiĝis pro internaj luktoj (ekz. kamparanaj ribeloj) kaj malforta reĝado, jam de pli ol cent jaroj devis enorme elspezi por bataloj kontraŭ la Eŭropa ekspansio de la otomana regneco, kiu okupinte en 1453 la Bizancan ĉefurbon Konstantinopolo (la postan Istanbulon) kaj la kristanajn landojn ĉe la sudaj kaj orientaj limoj de Hungario komencis senpere minaci la landon. En 1520 surtroniĝis Solimano la 1a, kiu alportis al la turkoj la oran epokon kaj apogeon de la imperio. Liaj ambicioj koncentriĝis precipe al Eŭropo, celis akiri la hegemonion super Mediteraneo kaj faligi la Habsburgan Imperion, al kiu la vojo kondukis tra la malfortiĝinta Hungario. En 1521 li trarompis la sudan limfortikaĵan ĉenon de la lando, okupis la ŝlosilan limfortikaĵon Nándorfehérvár (Beogrado) kaj en 1526 elbatalis neniigan venkon sur la kampo ĉe Mohács super la hungara armeo, kie mortis la reĝo kaj multaj baronoj kaj episkopoj. La lando disduiĝis, la okcidenta parto elektis reĝo la Habsburgan Ferdinandon, la suda kaj orienta Johanon (János) Szapolyai, kiu metis sin sub turkan protekton. Post lia morto Solimano ĉesigis la tronbatalojn de la du reĝoj: truke okupis la ĉefurbon Buda kaj per tio la lando disfalis en tri partojn. Tiu situacio pli-malpli konserviĝis tra pli ol jarcento.

La hungarojn dividis ne nur diferencaj politikaj apartenoj, sed ankaŭ la tiutempe ekburĝonanta religia diverĝado sekve de la disvastiĝo de la Luteraj kaj Kalvinaj instruoj. La Ferdinando de Habsburgo ne havis sufiĉan ekonomian, sekve militan forton por repuŝi la turkojn, la otomanoj ne povis konkeri la celitan imperian ĉefurbon Vieno kaj disvastigi sian regadon al la tuta lando. Hungario ĉesis roli kiel politika faktoro en Eŭropo, tamen ĝi servis rempare al Eŭropo kaj devis ade-ree alfronti, rebati kaj trasuferi proprasange la milit- kaj rabirojn, konkerprovojn de la Otomana Imperio.

En 1552 tri potencaj armeoj marŝis kontraŭ Hungario por okupi la

restintajn teritoriojn kaj firmigi la Eŭropajn poziciojn de la Otomana Imperio. Post la konkero de pluraj gravaj ĉenoj de la dua limfortikaĵa linio la tri armeoj, unuiĝintaj ĉe Szolnok, turnis sin kontraŭ la fortikaĵo kaj urbo Eger, kiu staris kiel lasta baro kontraŭ la invado de Supra Hungario.

Jen la nuraj historiaj faktoj. Tamen historiografie dokumentitaj estas ankaŭ pluraj personoj rolantaj en la romano, inter ili la ĉefprotagonistoj Dobó, Bornemissza, Mekcsey, la hungaraj baronoj, turkaj paŝaoj; fakta okazintaĵo estas la turka kampanjo en 1552, aŭtentaj la priskriboj pri Istanbulo, Buda, la sultana serajlo, la sieĝo de Eger, tiutempaj kutimoj, modoj, moroj; la cetero estas poezio, aventuroj, amo, malamo, bataloj, sinoferoj, do verkistaj inventaĵoj, por kiuj oni volonte legas romanojn.

La tradukinto

ENHAVO

**Unua parto
KIE KRESKAS LA BRAVAJ SOLDATOJ HUNGARAJ?**

**Dua parto
BUDA PERDITA!**

**Tria parto
LA MALLIBERA LEONO**

**Kvara parto
PERIPETIOJ DE EGER**

**Kvina parto
LUNEKLIPSO**

EPILOGO

**NOMLISTO DE LA HEROAJ DEFENDINTOJ DE LA FORTIKAĴO
DE EGER**

KELKAJ SENNOMAJ

TURKAJ VORTOJ KAJ ESPRIMOJ

Du infanoj baniĝas en la rivereto: knabo kaj knabino. Eble ne decas baniĝi kune, sed ili ne scias tion: la knabo aĝas apenaŭ sep jarojn, la knabino estas du jarojn pli juna.

Ili vagis en la arbaro kaj trafis la rivereton. La suno arde brilis. La akvo ekplaĉis al ili.

Unue ili nur trempis la piedojn, poste mergiĝis ĝisgenue. La kalsoneto de Gregorio malsekiĝis, li do deprenis ĝin. Sekve ankaŭ la ĉemizon li demetis. Post kelka tempo ili ambaŭ plaŭdis tute nudaj.

Ili povas trankvile baniĝi: neniu ja vidas ilin. La vojo al Pécs estas tro malproksime de tie kaj la arbaro senfina. Se iu ekvidus ilin, ha, kiel hajlus riproĉoj! Koncerne la knabeton – ne gravas, li estas ido ne nobela; sed la knabineto estas sinjoridino, filino de lia nobela moŝto Petro Cecey, plie ŝi estas forglitinta elhejme sen esti vidata.

Eĉ tiel nuda ŝi aspektas ido sinjoreca: pufa kiel kolombo, blanka kiel lakto. Dum ŝi saltadas en la akvo, ŝiaj blondetaj harplektoj flirtadas tien-reen sur ŝia dorso.

– *Gjeĉjo* – ŝi vokas al la knabo –, ni *nadju!*

La malgrasa brunuleto, nomita de ŝi Greĉjo, alturnas sian dorson. La knabineto alkroĉas sin ĉirkaŭ lia kolo. Li vadas al la bordo, ŝi postflosas kaj piedbatadas sur la akvosurfaco.

Atinginte la bordon Greĉjo firmtenas sin per verda junkotufo kaj zorgmiane ĉirkaŭrigardas.

– Ha, la griza!

Li vadas el la akvo kaj kuras tien-reen, serĉrigardas inter la arboj.

– Bonvolu atendi min, Enjo – li krias al la knabino –, atendu, tuj mi revenos!

Kaj nuda li forgalopas.

Post kelkaj minutoj li revenas sur maljuna griza ĉevalo. Sur ĝia kapo estas kolbrido el ŝnuraĉo. Ĝi estis ligita al piedo de la ĉevalo, sed malnodiĝis.

La infano senvorte frapadas la ĉevalon per kornusvergo. Lia vizaĝo estas pala. Reveninte al la banejo, li kroĉas sin ĉirkaŭ la kolo de la griza kaj glite desaltas.

– Ni kaŝu nin! – li diras frostotreme. – Ni kaŝu nin! Mi vidis turkon.

Per hastaj movoj li ligas la ĉevalon al arbo. Li kaptas detere la vestaĵojn. Kaj ambaŭ kuras nudaj al kratago. Ili kaŝas sin platkuŝe post la arbusto en la foliaĵo.

Tiutempe ne maloftis turkoj sur la vojoj. Kaj vi, mia kara leganto, certe trompiĝos supozante, ke la du infanoj baniĝis niatempe, ĉi-somere en la rivereto. Ho Dio, kie jam forestas tiuj du infanoj, kie for? Kaj kie troviĝas tiuj

homoj, kiuj venos al vi renkonte en ĉi tiu libro, moviĝos, agos kaj parolos tra ĉi tiuj paĝoj? Ĉiuj iĝis jam polvo kaj cindro!

Do flankenmetu, estimata leganto, la ĉi-jaran kalendaron kaj image prenu tiun de la jaro 1533. Vi vivas nun en Majo de tiu jaro, kaj via reganto estas aŭ reĝo Johano aŭ la turkoj aŭ Ferdinando la 1a¹.

La malgranda vilaĝo, kie loĝas la du infanoj, kaŝiĝas en iu valo de la montaro Mecsek. Ĝi konsistas entute el nuraj tridek argilbrikaj domoj kaj unu granda ŝtona. La fenestroj de ĉiuj domoj estas kovritaj per oleitaj toloj. Eĉ de la sinjora. Sed cetere ili estas domoj kiel la nuntempaj. La vilaĝeton kaŝkovras densa frondaro kaj ĝiaj loĝantoj kredas, ke turkoj neniam trovos la vojon kondukantan al ili. Kiel ili ja trovos ĝin? Ĝi estas kruta, ne sulkita de radoj. Turo ne videblas. La homoj vivas, mortas en la eta kaŝvilaĝo simile al arbaraj insektoj.

La patro de la knabo nomata Greĉjo estis iam forĝisto en Pécs, sed jam mortis. La edzino transloĝiĝis al vilaĝo Keresztesfalva kun sia patro, blankhara, maljuna kamparano, kiu batalis siatempe dum la ribelo de Georgo Dózsa². Parte pro tio li ricevis azilon ĉe la sinjoro de la vilaĝo, Cecey.

La maljunulo fojfoje foriradis tra la arbaro al Pécs por almozpeti. Vintre ili vivis ofte el tio, kion li petricevis. El la domo de la sinjoro same faladis io kaj tio sur ilian tablon.

Nu, ankaŭ tiutage la maljunulo estis alvenanta el la urbo.

– Paŝtu la grizan – li vokis al sia nepeto –, de la mateno nenion ĝi manĝis.

Tiel do ekiris Greĉjo kun la ĉevalo al la arbaro. Dumvoje, ĉe preteriro de la sinjoridomo, la malgranda Eva aperis en la ĝardenpordo kaj petis lin:

– *Gjeĉjo, Gjeĉjo*, lasu min kuniri!

Greĉjo ne kuraĝis diri al la sinjoridino, ke ŝi restu hejme. Li deĉevaliĝis kaj kondukis Evan, kien ŝi deziris. Eva volis iri tien, kien la papilioj flugas. Tiuj flirtis al la arbaro, sekve ankaŭ ili kuris tiudirekte. Fine, kiam ili ekvidis la rivereton, Greĉjo ellasis la ĉevalon paŝtiĝi. Tiel ili venis en la arbaran rivereton kaj el la rivereto malantaŭ la kratagon.

Ili platkuŝas. Timtremas pro la turko.

Kaj ne ombro vekis ilian timon. Post ioma tempo kraketoj aŭdiĝas el la seka vepro kaj baldaŭ aperas strutopluma, blanka kapvesto turka kaj bruna ĉevalkapo sub la frondoj.

La turko de- kaj returnadas la kapon. Ĵetas rigardon al la griza. Sian

¹ La suda mezo de Hungario estis okupita de turkoj, la orienta elektis reĝo Johanon (János) Szapolyai (1526-1540) kaj la okcidenta la Habsburgan Ferdinandon (1526-1564).

² Gvidanto de granda kampula ribelo en 1514.

malhele bejan ĉevaleton li kondukas per la bridrimeno.

Nun jam videblas, ke li estas brunulo kun osteca vizaĝo. Avelkolora mantelo kovras liajn ŝultroj. Blanka kalpako sidas sur lia kapo. Unu okulo estas bendita per blanka tuko. La alia okulo jam celas la grizulon ligitan al la arbo. Ĝi ne plaĉas al li, kiel atestas la grimacoj sur lia vizaĝo. Malgraŭ tio li malligas ĝin.

Li preferus havi la knabon, kiun li vidis sur la ĉevalo. Tiu pli timas ol la ĉevalo. En la Istanbula sklavofoiro oni donus por li eĉ la trioblon. Sed li nenie videblas.

La turko explore rigardas post kelkajn arbojn kaj ĵetas rigardon ankaŭ al la foliario.

Subite li vokas per hungaraj vortoj:

– Kie vi estas, knabeto? Elvenu, kamaradeto! Mi donos al vi figon! Nu, elvenu!

La knabo ne montras sin.

– Elvenu, he! Ne timu, mi faros nenion malbonan al vi! Ĉu vi ne venos? Se vi ne venos, mi forprenos vian ĉevalon!

Kaj vere li kunprenas la kondukilojn de ambaŭ ĉevaloj en unu manon kaj prenas ilin kun si inter la arbojn.

La du infanoj aŭskultis ĝis nun la turkon mutaj kaj palaj. La figoregalo ne malligis ilin el la torporo de la teruro. Ili tro ofte aŭdis hejme kiel riproĉon „turko forportu vin!” kaj harstarigajn rakontojn pri turkoj, por preni kuraĝon malkaŝi sin por ajne dolĉa logo. Sed kiam la turko minacis kunpreni la grizan, knabo Greĉjo ekmovis sin. Li rigardis al Enjo kvazaŭ atende konsilon kun mieno de homo, kies plandon pikas dorno.

“Li forprenos la grizan! Kion oni diros hejme, se li revenos sen ĝi?”

La eta Eva ne respondis al ĉi tiuj pensoj. Mortpala ŝi kaŭris apude. Ŝiaj grandaj, blujaj okuloj humidiĝis pro teruro.

Sed la griza estas foriĝanta. Greĉjo aŭdas la klakojn de ĝiaj hufoj. Ĝi iras per longaj, malviglaj paŝoj. La seka foliaĵo egalritme kraketas sub ĝiaj hufoj. Do la turko kunprenas ĝin, vere kunprenas ĝin!

– La griza... – balbutas Greĉjo kun buŝo tordita al ploro.

Kaj li levas la kapon.

La griza pluiras kaj ĉiam pli malproksimiĝas. Sekaj falfolioj kraketas sub ĝiaj piedoj.

Sed nun Greĉjo jam forgesas pri ĉio en la mondo: li saltleviĝas kaj kurĵetas sin naskonuda post la griza.

– Sinjoro – li treme krias –, turka sinjoro!

Tiu haltas kaj rikanas.

Hu, kiel malbela homo! Li firidetas, kvazaŭ li volus mordi!

– Sinjoro, la griza – plorbalbutas Greĉjo –, la griza estas nia...
 Kaj li haltas en distanco de ĉirkaŭ dudek paŝoj.
 – Venu do, se ĝi estas via – respondas la turko –, jen al vi.
 Kun tio li forĵetas elmane la bridoŝnuron de la griza.
 La infano vidas nenion pli ol nur sian grizan ĉevalon. Apenaŭ la alia malvigle ekiras, li alsaltas kaj kaptas la ŝnuron.
 En la sama momento ankaŭ li estas kaptita. La grandaj, fortaj fingroj de la turko ĉirkaŭkroĉas liajn malfortajn, nudajn braketojn kaj li suprenĵetiĝas sur la alian ĉevalon, en la selon de la beja.
 Greĉjo plorkrias.
 – Ĉit! – minacas lin la turko elpreninte sian ponardon.
 Sed Greĉjo plukrias:
 – Enjo! Enjeto!
 La turko turnas la kapon tien, kien la knabo. Lia mano ripozas sur la ponardo.
 Apenaŭ la alia nuda infaneto leviĝas el la herbo, li tuj remetis la armilon kaj ekridetas.
 – Venu, nu, venu – li vokas –, mi faros al vi nenion malbonan.
 Kaj li ekiras kun la du ĉevaloj al la knabineto.
 Greĉjo volas gliti de sur la ĉevalo. Sur lia dorso laŭte ekklakas la manplato de la turko. Li plorblekas kaj restas sidanta. La turko postlasas la du ĉevalojn, ekkuras post la knabineto.
 La malfeliĉa Enjeto nun preferus forkuri, sed ŝiaj kruroj estas mallongaj kaj la herbo alta. Ŝi falstumblas. Baldaŭ ŝi piedfrapas kaj plorkrias en la sino de la turko.
 – Ĉit! – minacas la turko, ekfrapinte ŝian postrondaĵeton –, ĉit!, mi tuj manĝos vin, se vi ne silentiĝos! Ham-ham!
 La knabino mutiĝas. Nur ŝia koreto bategas kiel tiu de kaptita pasero.
 Sed apenaŭ ili alvenas ĉe la ĉevaloj, ree ŝriko elŝiriĝas el ŝia brusto:
 – Paĉjo! Patro!
 Nu ja, la senesperigo pensas, ke ĝia krio ĝisaŭdiĝas plej malproksime.
 Ankaŭ la knabo plorblekiĝas. Viŝante perpugne la okulojn, li plorbalbutas:
 – Mi hejmeniras, mi volas hejmeniri!
 – Silentu, ĉifona bastardo – alkrias lin la turko –, alie mi tuj dishakos vin!
 Kaj minace li skuas sian pugnon al Greĉjo.
 Ambaŭ geknaboj silentiĝas. La knabineto estas preskaŭ sveninta pro teruro. Greĉjo sidas mallaŭte plorsingultante sur la dorso de la beja.
 Kaj ili ekmarŝas.

Eliras el la arbaro. Greĉjo vidas, ke sur la vojo suprenkondukanta al montaro Mecsek bunte moviĝas ĉiaspecaj turkoj kun ĉaroj. Rajdantaj *akinĝioj*³, marŝantaj *asaboj*⁴, bunte vestitaj libersoldatoj. Sidante sur viglemovaj ĉevaloj, po-arete ili trotas hejmen.

La grupo, kiu marŝas antaŭ ili, eskortas ĉirkaŭ dek plensarĝitajn veturilojn kaj ĉarojn. Sur la ĉaroj estas amasigitaj, en senorda miksaĵo, blankaj littolaĵoj, ŝrankoj, litkadroj, bareloj, feloj, grensakoj. Apud la ĉaroj paŝadas malgajaj kaptitoj kun ĉenitaj kruroj kaj dorse ligitaj manoj.

Nia janiĉaro posedas tri ĉarojn kaj sep kaptitojn. Krom li vidiĝas kvin blupantalonaj, ruĝbotaj, blank-kolpakaj janiĉaroj, tri pliaj estas peltĉapaj *asaboj* kun longaj lancoj. Fronte de la kalpako de l' unuokululo flirtas polvokovrita, blanka strutoplumo subpendanta malantaŭe preskaŭ ĝis lia dorso-mezo.

Dum li pasigis la tempon en la arbaro, la tri ĉaroj flankeniĝis sur la voj-randon preterlasante la aliajn hejmenirantojn.

La janiĉaroj mokridante renkontas la du geknabojn kaj la grizan ĉevalon.

Greĉjo ne komprenas, kion ili turke babilas. La parolo certe iras pri ili kaj la ĉevalo, tio ja videblas. Rigardante al li kaj Enjo, ili ekridadas. Priokulinte la ĉevalon ili mansvingas kiel homo forpelanta muŝojn.

La turko levas la du geknabojn en iun ĉaron sur littolaĵon. Tie sidas pufvanga junulino, same kaptito, kun ĉenitaj kruroj, al ŝi li konfidas ilin. Iu ĉapita turko malligas malpuran sakon, elprenas ĉiaspecajn vestaĵojn. Nurajn porinfanajn. Troviĝas inter ili jupeto, drapjako, metalbutona veŝto, ĉapeto, etaj botoj. La unuokula elprenas du ĉemizetojn kaj drapjaketon kaj ĵetas ilin en la ĉaron.

– Vestu la infanojn! – li ordonas al la junulino.

Ŝi estas ĉirkaŭ dek-sepjara. Kampulino. Vestante la infanojn ŝi brakumas kaj kisas ilin.

– Kiel vi nomiĝas, anĝeleto?

– Enjo.

– Kaj vi, kolombeto?

– Greĉjo.

– Ne ploru, karaj! Vi estos kun mi.

– Sed mi volas hejmeniri – ekploras Greĉjo.

– Ankaŭ mi – ekploras ankaŭ la knabineto.

³ Akinĝioj: bruligantaj, rabantaj terortaĉmentanoj de la turka armeo; ilia tasko estis detruiri per fajro kaj glavono en la konkerotaj teritorioj antaŭ la penetro de la ĉefarmeo.

⁴ Asaboj: infanterianoj.

La kaptita junulino brakumas ilin per ambaŭ manoj.
– La kompatema Dio hejmenkondukos vin, nur ne ploru!

2

Vilaĝaj hundoj ĉirkaŭdancas kun mordema bojado blankbarban kaj tre longharan pilgrimanton. Ili certe detirus lian frokon, se li ne brave batadus ĉirkaŭ si per sia longa, krucokapa bastono.

Unue li paŝis vojmeze, sed kiam la grandaj, vilaj hundoj ĉiam pli multiĝis, li singarde retiris sin al heĝo formanta L-angulon kaj apoginte sian dorson al ĝi, li atendis, ke iu venos kaj liberigos lin de la atakantoj.

Sed eĉ la okuloj de tiuj, kiuj aperis pro la laŭta bojado, estas nun direktitaj al kvin hungaraj soldatoj, kiuj ĵus engalopis la vilaĝon. Ruĝmantela, blonda kavaliro rajdas fronte. Kun grua plumo sur la ĉapo. Antaŭ li kruce metita fusilo. Sub lia malpeza, griotruĝa kuto brilas maŝkiraso. Post li kvar aliaj soldatoj. Alveninte en la vilaĝo, ili turnadas la kapon dekstren-malen, kvazaŭ ĉiu domo de la vilaĝo indus je primiro.

Antaŭ la dompordo de Cecey sidas kampulo kun lanco. Ripozas sur ŝtono, dormetas. Je la hufobruo li ekronke vekigaŝas. Haste li malfermas ankaŭ la alian pordegalon kaj la soldatoj entrotas tra ponteto en la korton.

Cecey kaŭrsidas kvazaŭ maljuna aglo en la ombro de la draŝejo. Proksime, kelkaj liaj servutuloj senlanigas ŝafojn. Ĉiu havas tondilon enmane kaj glavon surflanke. Tiaj cirkonstancoj regis tiutempe en Hungario!

Cecey ekvidis la husarojn. Li stariĝis kaj malrapideme ambliis renkonte al ili. La maljuna sinjoro havis strangan irmanieron: unu lia gambo ne fleksiĝis ĉe la genuo kaj la alia ĉe la maleolo. Kiel ja ili povus fleksiĝi, se ambaŭ estis el ligno. Plie mankis ankaŭ lia dekstra mano: unu maniko de la tola kamizolo malplene balanciĝis ĉe lia artikolo.

La grupluma kavaliro saltis de la ĉevalo kaj ĵetis la kondukilon al soldato. Li rapidis al Cecey.

– Mi estas Stefano Dobó – li salutis depreninte la ĉapon kaj kunfrapante la maleolojn.

Li estis alta, osteca viro, sed ĉiuj liaj movoj ŝvelis de forto.

Cecey kaŝis la brakojn postdorse.

– En kies armeo vi servas?

– Nun de Valentino Török.

– Vi do estas fidelulo de reĝo Ferdinando. Do estu bonvena, filo mia.

Kaj li etendis al li la manon. Per unu alrigardo li traesploris lian ĉevalon, per alia lian glavon.

– Kiu vento vin alblovis?

– Ni venas el Palota, estimata.
– Ĉu el la kastelo de Móré?
– Ĝi ne plu estas de Móré.
– Do de kiu?
– Nun ĝuste de neniuj: se konsideri, eĉ kastelo ĝi ne plu estas, nur ŝtonamaso.

La maljuna lignokrurulo ekmiris.

– Ĉu detruita?

– Ĝis la fundamento.

– Dank’ al Dio! Nu, venu, filo mia, al pli malvarma loko en la galerio! He, edzino, ni havas gaston.

– Ĉu oni detruis ĝin! – li ree ekkriis mirigita.

La malgranda, graseta sinjorino jam diligentis en la galerio: kun servistino ŝi ŝovis tablon en la ombreon. Kaj alia servistino kuris malfermi la kelpordon.

– Kiel propre oni nomas vin, filo mia, ĉu Bodó aŭ Dobó?

– Stefano Dobó.

– Steĉjo Dobó – diris Cecey, prezentante la junulon al sia edzino.

Poste li ordonis, ke ankaŭ la soldatoj ricevu vinon kaj manĝon kaj samtempe kurigis iun por venigi la pastron.

– Antaŭ ol ni sidiĝus, estimata – diris Dobó –, mi devas demandi, ĉu Móré troviĝas ĉi-regione. Mi, nome, volas trovi lin.

– Mi ne vidis tiun prakanajlan friponon. Kaj mi eĉ ne vidu lin, se ne sur pendumilo!

Dobó skuis la kapon.

– Do ni sekvas falsan spuron.

Li petis akvon.

– Havu paciencon, tuj oni portos vinon – senkulpigis sin Cecey.

– Mi trinkas akvon, se mi soifas – rifuzis Dobó.

Kaj li levis al si la grandan bekokruĉon kaj metis ĝin al sia buŝo.

– Ĉu vi permesas al mi, estimata, ripozi ĉe vi ĝis la vespero? – li demandis kun kontenta suspiro elŝirita post la trinko.

– Mi eĉ ne lasas vin foriri dum kelkaj tagoj! Kia ideo!

– Dankon. Sed nun ne estas karnavalo. Vespere ni pluiros. Sed mi ŝatus demeti mian maŝkirason. Ĝi estas infere varma en tia vetero, eĉ se kudrita el nuraj truoj.

Dum Dobó malvestis sin en ĉambro, alvenis ankaŭ la pilgrimanto tra la pordego.

– Vi venas de la monaĥo! – alparolis lin Cecey levinte la kapon.

– De tiu – respondis mire la pilgrimanto. – De kie vi bonvolas scii?

– Ne per magio, kredu min. Via barbo blankas pro melgraso, per la unua alrigardo mi konstatis tion.

– Estas vere – respondis la homo.

– El tio mi vidas, ke vi venas al mi de malproksime.

– Ankaŭ vere.

– Kaj al mi kutimas mesaĝi defore neniu krom la abato de Sajólád, mia boparenco.

– Li jam de longe ne plu estas abato sed amiko de la reĝo.

– Ankaŭ tion mi scias, fulmo trafu lin kune kun lia mastro. Kiel vi nomiĝas?

– Emeriko Varsányi.

– Kiom-jara vi estas?

– Tridek.

– Nu, ni vidu: kion sciindan vi alportis?

La pilgrimanto sidiĝis sur la tero kaj komencis malkudri la substofon de sia froko.

– Infera varmego estas ĉi-regione – li grumbletis bonhumore. – Kaj tiom da turkoj, kiom da muŝoj.

– Danke al la monaĥo kaj via reĝo. Nu en kiun inferon vi enkudris tiun leteron?

Varsányi fine eltiris kaj transdonis ruĝe sigelitan letereton.

– Donu manĝon kaj trinkon kaj ankaŭ tranoktejon al ĉi tiu homo – instrukciis Cecey al sia edzino.

Kaj li rompis la sigelon. Malfaldis la leteron.

– Jes – li okulumis al la letero – la skribo de la monaĥo. Klara kiel presaĵo sed tre etlitera. Mi ne legos ĝin, eĉ se mi mortus pro scivolo.

La pilgrimanto sidiĝis pli ene en la ombron de juglandujo.

– Kvankam li certe skribis ion bonan – li rimarkigis. – Ĉar li ne urĝis min rapidi. Se li sendas grandsigelan leteron, mi devas ĉiam rapidi. Ĉi tiu estas nur etsigela: ne tutlanda afero.

Post kiam tiel saĝe li diferencigis la leterojn, kun kontenta mieno li glutis el vinpoto metita antaŭ li.

Ankaŭ la sinjorino prenis la leteron en la manojn. Rigardis ĝin supre, malsupre, ekzamenis la diseriĝintan sigelon. Ŝi turnis sin al la pilgrimanto:

– Ĉu onklo Georgo estas sana?

Tiu manĝis fromaĝon. Faris profundan gluton.

– Neniam li malsanas.

Bovokapa, larĝŝultra, fortika, maljuna pastro enpaŝis tra la pordego. La nove-veninto stariĝis kaj volis kisi al li la manon.

– Ĉu vi estas papano aŭ novkredulo? – demandis tiu.

Kaj li karesadis sian ĝisbrustomezan barbon, por ke la pilgrimanto ne povu kisi al li la manon.

– Mi estas papano – respondis la pilgrimanto.

Nun la pastro akceptis la mankison.

Ili eniris la ĉambron. La pastro stariĝis proksime al la fenestro kaj traduke legis la latinan leteron:

– *Kara bofrato...*

Li havis neordinaran, obtuzan voĉon. La konsonantojn oni povis nur supozi en lia parolo. Sed kiuj al kutimiĝis, tiuj komprenis lian parolon.

Li daŭrigis:

– *kaj kara Julinjo! De Dio mi deziras al vi ĉiuj fortikan sanon kaj senĝenan vivon. Plue, mi informiĝis, ke en via regiono rabas-detruas jen Móré, jen turkoj kaj nur la servutularo ligita al sia tero restis surloke: kiu povas, forkuras, iuj al Altlando⁵, aliaj al la germanoj. Kaj vi, miaj amatoj, se vi ankoraŭ pluvivas kaj restadas en Keresztes, same savu vin. Mi intervenis ĉe Lia Reĝa Moŝto, ke li rekomencu viajn perdojn.*

– Ne plulegu ĝin – saltleviĝis Cecey –, hundaĉo bezonas favoron de hundaĉo!

– Trankvile, kara – kvietigis lin la sinjorino. – Georgo estas saĝa, Georgo scias, ke ni akceptas nenion de Zápolya⁶: finaŭskultu via moŝto la leteron!

La pastro sulkgis siajn vilajn brovojn kaj plulegis:

– *Kvankam la reĝo ne povas redoni Sásod, sed troviĝas vilaĝo proksime al Nagyvárad...*

– Ĉesu, ĉesu, Valentino! – interrompis lin Cecey arda pro kolero.

– Jen sekvas io alia – respondis la pastro.

Kaj li plulegis:

– *Sed se jam tiom ŝtoniĝis en vi la malamo al li...*

– Ŝtoniĝis ja, ŝtoniĝis... – ekkriis Cecey frapinte la tablon –, ...nek ĉi-, nek transmonde mi volas! Aŭ se transmonde, eĉ tie nur per armiloj!

La pastro plulegis:

– *Ĉi tie en Buda⁷ mia domo staras malplena kaj ni post nelonge transloĝiĝos al Nagyvárad. Nur unu arkfaristo loĝas en la malsupra domparto. La tri etaĝaj ĉambroj vakas.*

– Mi ne bezonas ĝin! – kriis Cecey leviĝinte. – Vi aĉetis ĝin, monaĥo,

⁵ Norda, montara parto de Hungario, la nuna Slovakio.

⁶ Johano de Zápolya aŭ Szapolyai, elektita reĝo de la orienta Hungario.

⁷ Tiam ĉefurbo de Hungario (nun parto de la ĉefurbo Budapeŝto).

per la mono de Zápolya! Ĝi falegu sur mian kapon, se mi enloĝiĝos!

– Kiel vi povus scii, ke liamone! – diris incitite la pastro. – Eble heredita?

Sed Cecey ne plu aŭskultis ilin. Kolerblove li forambliis el la ĉambro kaj frapiris tra la galerio.

Ĝiafine sidis la pilgrimanto nutrante sin sub la juglandarbo. Li haltis antaŭ li kolere pufigante sin.

– Diru al la monaĥo, ke honorosaluton al li: kion li skribis, tio estas por mi, kvazaŭ nenion li estus skribinta.

– Ĉu do mi ne portu respondon?

– Ne.

Dirinte tion li pluambliis al la draŝejo. Tien-reen li tretadis en la suno. De tempo al tempo li svingis sian bastonon dekstren-maldekstren en la aero kaj kolere murmuris:

– Mia kapo ankoraŭ ne ligniĝis!

La kampuloj pli fervore tondis la ŝafojn.

La hundoj retiriĝis pli foren. Kvazaŭ ankaŭ la domo glitus pli foren de sur la monteto antaŭ lia kolero.

La sinjorino staris kun la pastro en la galerio. Li levis la ŝultrojn.

– Ba, eĉ se ne heredita – li insistis –, ĝi estas perlabora akiraĵo de la monaĥo. Li donacas ĝin al tiu, al kiu plaĉas al li. Li donas ĝin nun al Petro. Do ĝi iĝos Cecey-domo kaj eĉ la reĝo ne regos en ĝi.

Dobó elpaŝis el la ĉambro. La sinjorino prezentis lin al la pastro. Ankaŭ Cecey revenis kaj albojis la pastron:

– He vi, pastro, vi turnis la mantelon! Fine vi rekomendos viajn servojn kiel standardisto al reĝo Johano.

– Kaj vi maljunaĝe forĵetos vian hungaran nomon! – regrumblis la pastro.

– Vi faros vin ekzekutisto! – muĝis Cecey.

– Kaj vi germano! – furioziĝis la pastro.

– Ekzekutisto!

– Germano!

– Senfeligisto!

– Patrujperfidulo!

La du blankharuloj jam preskaŭ bluiĝis pro kolero, albojante unu la alian. Dobó atendis la momenton, kiam iĝos necese disigi ilin.

– Ne kverelu, Dio benu viajn moŝtojn – li diris maltrankvile –, aŭ kverelu prefere kun la turkoj!

– Vi ne komprenas tion, filo mia – respondis Cecey falsidiĝinte sur seĝo –, al ĉi tiu pastro Szapolyai⁸ kurtigis la langon kaj al mi la dekstran brakon. Ĉu li ne estas malsaĝulo, ke li defendas Szapolyai per la resto de sia lango?

– Nu se li estus sole-nure mia malamiko – respondis la pastro kun silentiĝinta voĉo –, mi jam delonge pardonus lin. Sed malgraŭ ĉio mi asertas, ke prefere li ol germano regu super la hungaroj.⁹

– Sed prefere germano ol turkoj! – krie rebatis Cecey.

Dobó intervenis, por ke la du maljunuloj ne interhokiĝu denove:

– Bona estas nek unu nek la alia, estas ja vero. Tamen ni devas ĝisatendi, ĉu la germanoj starigos sufiĉajn fortojn kontraŭ la turkoj. Kaj ĉu reĝo Johano efektive volas vendi la landon al la turkoj.

– Jam antaŭ longe li vendis ĝin, filo mia!

– Mi ne kredas – respondis Dobó –, li neniam volis turkojn, li bezonis nur la kronon.

La sinjorino metis pladon da rostita kokinaĵo sur la tablon. Je la vido de la bonodora, ruĝbruna rostaĵo malaperis la kolerruĝo el la vizaĝo de ambaŭ blankharuloj.

– Ho, kiam mi estis tiel juna, kiel vi, filo mia... – diris Cecey bonhumore. – Kiom-jara vi estas?

– Tridek unu – respondis Dobó –, morgaŭ aŭ postmorgaŭ ja ankaŭ min neniu diros juna.

– Dum oni ne estas edziĝinta, oni restas daŭre juna. Sed pro kiu diablo vi ne edziĝis?

– Mi ne havis tempon por tio – respondis Dobó. – Mi, estimata, luktas daŭre depost mia infanaĝo en bataloj post bataloj.

– Tiel ja estas bone. Tiamaniere vivas la hungaroj ekde la eko de la mondo. Ĉu vi kredas eble, ke mi lamiĝis je ambaŭ gamboj pro dancado? Mi ja, amiketo, komencis ĉe Kinizsi. Reĝo Matiaso alparolis min per mia propra nomo. Kaj mi finis kun Dózsa, kiu, kreu min, estis heroo de herooj.

Li levis la ĝisrante plenigitan stanglason kaj deziris bonhumore:

– Dio amu la hungarojn kaj vin, filo mia, eĉ pli. Li donu venkojn al via glavo! Kaj al vi mem belulinon edzine! Ĉu vi scipovas ŝakludi?

– Mi ne scipovas – respondis Dobó ekridetante pro tia pensokapriolo.

⁸ Szapolyai disbatis en 1514 la armeon de la ribelintaj kamparanoj kaj multajn kruele punis.

⁹ Disputo dividinta tiam la hungarojn: kiu povas pli efike defendi la landon kontraŭ la turkoj, la plej poenca hungara barono, Johano Szapolyai aŭ la germana Ferdinando Habsburga.

Kaj li malplenigis sian glason. En ĝi ruĝis tre forta vino. Li pensis en si: nun mi jam komprenas, kial ĉi tiuj maljunuloj tiom koleras.

– Se tiel, vi ja ne fariĝos bona militestro – asertis Cecey.

– Ne, se ni batalus laŭ orienta maniero: armeo kontraŭ armeo. Sed ni batalas nur hungarece: homo kontraŭ homo. Pri tio ŝaktabulo ne instruas.

– Do vi tamen scipovas ludi.

– Ne, mi nur konas la regulojn.

– Se vi kapablos, certe alie vi prijuĝos ĝin. Dum unuhora partio, amiketo, oni travivas ĉiujn turnojn kaj ardojn de vera batalo.

– Ĉu viaj moŝtoj kutimas ludi hejme?

– Ĉu ni? Neniam. Du flamiĝemaj homoj ne devas kunsidiĝi por ŝakludi. Se ni ludus, ni ade kverelus prie. Malgraŭ tio, filo mia, ke ni kune kreskigis niajn plumojn, kune ni vivis, kune ni luktis kun la maljunulo.

– Kaj ankaŭ kune ni mortos – amenis la pastro kapbalance.

La du grizaĝuloj amikeme rigardis unu la alian kaj intertintigis la glasojn.

– Sed vidu – reprenis Cecey la parolon viŝante la lipharojn –, tamen brava homo estis tiu Ferdinando, li ja elsaltigis tiun vulpon Móré el lia kastelo.

– Ne nur Ferdinando. Ambaŭ reĝoj kune. La taĉmentoj de ambaŭ. Ili te-diĝis de liaj friponaĵoj, ĉar laste li prirabis eĉ tombojn.

– Tamen Ferdinando luktis pli kontraŭ li.

– Ne: plie Johano. Ferdinando nur mesaĝis al Valentino Török, ke li helpu al Johano kaj sendis kvindek ministojn.

– Ĉu por murdetruo?

– Por ĝi. Iom da turkoj same kunestis.

– Nu jes. Sub la standardo de Johano.

– Sub ĝi, ke diablo benu tian helpon! Ĉiam rabante ili hejmeniras.

– Tiuj porkoj *akingioj*!

– Tiuj.

– Ĉu facile vi superis la kastelon?

– Mi ne povus diri. Ĝi estas konstruita el fortikaj muroj. Murdetruajn kanonojn neniu el ni kunportis. Kaj kiom utilas etkalibraj kanonoj?

– Mi pasis tie vizite – intermetis la pastro –, ĝi estas fortikigita roko-kastelo, ne palisfortikaĵo. Do oni ne cedis la kastelon?

– Ne. Ni devis starigi kvindek ministojn en laboron kontraŭ la rokoj. Ili havis malfacilan kaj ŝvitigan taskon, mi povas aserti. La pioĉoj frapis fajre- rojn sur la ŝtonoj kaj la ferstangoj penetris post ĉiu svingo apenaŭ fingrodikon en la rokomuron. Sed fine eĉ ŝtono cedas al multaj manoj.

– Ĉu vi eksplodigis ĝin?

– Antaŭ ĉio ni enmesaĝis al Móré, ke la minoj estas jam plenigitaj per pulvo. Li elmesaĝis, ke ni atendu ĝis mateno. Ni atendis. Kion faris dume tiu ruza vulpaĉo? Li kunvokis la defendantojn kaj kuraĝigis ilin teni persiste la kastelon, dum kio li elŝteliĝos kaj kuros por helpo. – Bone – respondis tiuj –, sed kio garantias, ke vi ankaŭ revenos? – Ĉi tie restas ambaŭ miaj filoj – respondis la latrono – kaj ĉiuj or- kaj arĝentohavaĵoj, kion pli vi deziras? – Kaj li ŝnure desupris la kastelmuron. Kaj forvaporiĝis. Ni, kompreneble, ne vidis lin en la profunda mallumo. Kaj kiam la suno leviĝis kaj estis nek blanka flago nek sendito nek malfermo de la pordegoj, ni eksplodigis la minojn. Ĉu tio ne ĝisaŭdiĝis? Estis montotremiga tondrego. La muroj renversiĝis. Kaj ni penetris en la kastelon! Niaj soldatoj estis tre furiozaj: mortigis ĉiujn homojn de Móré.

– Ĉu ankaŭ la infanojn?

– Tiujn ne. Ni trovis ilin en granda volbaĵo. Du belaj, brunaj knaboj. Nun ili jam estas ĉe reĝo Johano.

– Do nun vi serĉas Móré?

– Ni nur faris malgrandan ĉirkaŭvojon post Móré kun miaj kvar homoj. Ĉar dumvoje ni parolis kun kampogardisto, en kies kelo li tranoktis. Tiu diris, ke li prenis la direkton ĉi tien, al Pécs.

– He, Magdaleno – vokis la sinjorino, returninte sin al servistino frotlavanta en la korto –, kie restas Enjo?

– Mi ne vidis ŝin – respondis la knabino. – Post tagmanĝo ŝi ludis en la ĝardeno.

– Kuru do vigle, trovu ŝin!

– Mia filino – klarigis Cecey al Dobó. – Por mia maljunaĝo Dio donacis ŝin al mi. Tuj vi vidos, kia feineto ŝi estas.

– Ĉu filon vi ne havas, estimata?

– Ne – respondis Cecey malgaje. – Se mi havus, amiketo, kredu, eĉ mia mano elkresku kiel de kankro.

Sed la infano ne troviĝis. Dum la vigla babilado, legado de la letero ĉiuj forgesis pri la eta Enjo. La servistinoj tute ne havis zorgon pri ŝi. Ili ĉiuj trovis iajn farendojn en la korto. La soldatoj beltordadis siajn lipharojn. La knabinoj svingadis siajn jupojn. Ĉi tiuj amuziĝis, kvazaŭ tiuj estus venintaj svate al Cecey.

Senprokraste oni traserĉis ĉiujn angulojn ĉirkaŭ la domo. Traesploris ĉiun arbuston, ĉiun ludejon en la vilaĝo. Kie estas onjo Katerino? Ja ŝi gardis ŝin. Povas esti, ŝi dormiĝis kaj dume la infano eliris el la vilaĝo. Kiu vidis ŝin? Neniu vidis ŝin. Knabeto babilis kun ŝi malantaŭ la ĝardeno. Kiu preteriris posttagmeze malantaŭ la ĝardeno? Neniu, nur knabo Greĉjo. Li kondukis la ĉevalon de sia avo al la herbejo. Sed kie nun Greĉjo? Ankaŭ li

troviĝas nenie. Certe li eliris kun la ĉevalo en la arbaron. Ho, infana malprudento! Kiomfoje oni admonis lin ne pluiri ol la rubusaro kun la ĉevalo!

Oni priserĉis la ĉirkaŭvilaĝan arbaron. Jam ankaŭ Dobó helpas kun siaj homoj. Oni ekzamenas ĉiun arbon, ĉiun arbuston, kavon, valon kaj vepron. La patrino de Greĉjo same serĉas veplorante. La maljunan Katarinon oni trafas en la arbaro. Ankaŭ ŝi estas delonge serĉanta, jam kriis raŭka sian gorĝon.

Fine ĉirkaŭ vespero iu servisto haltas kaj laŭte ekkrias:

– Trovitaj!

– Nu dank’ al Dio! Kie ili estas?

– Jen iliaj vestaĵoj!

Iliaj vestaĵoj, ja nur la vestaĵoj: la delikatlina ĉemizeto, karmezinaj ŝuetoj, flava taftojupeto kaj la ĉemizo, vasta pantalonono, ĉapelo de Greĉjo. Videble ili baniĝis. Sur la mola bordosablo de la rivereto efektive videblas iliaj spuroj. La pli grandaj piedsignoj, kies fingroj estas disstreĉitaj, apartenas al knabo Greĉjo. La pli malgrandaj estas de Enjo.

Certe ili dronis en la akvo.

3

– Mia nomo estas Margareto. Nomu min simple onjo Margareto – diris la kaptita junulino sidanta en la ĉaro. – Mi rakontos al vi. Mi konas multajn fabelojn. De kie vi estas, miaj karegaj?

– De la vilaĝo – respondis Greĉjo kun larmoplenaj okuloj.

– De la *bilaĝo* – respondis ankaŭ la knabineto.

– De kiu vilaĝo?

– Ĝi estas ĉi tie, en la arbaro.

– Sed kiel do nomiĝas tiu vilaĝo?

– Kiel ĝi nomiĝas? Mi ne scias ĝian nomon.

Pufvanga estis tiu, kiu nomis sin Margareto, kun ĉiam kisemaj lipoj. Ŝia vizaĝo estis makulita per lentugoj, ĉirkaŭ sia kolo ŝi surhavis perlaron el bluaj vitroj. La turkoj forrabis ŝin de iu stepo en Somogy.

Ŝi iom enpenŝiĝis pri la respondo de la infanoj, poste ŝi ligis pupon el ĉifonoj por Enjo.

– Jen la pupo de Enjo. Ŝi havas kaptukon, ruĝan jupon. Ni vestos, dorlotos, dancigos, luldormigos ŝin.

La ĉaro de la kaptitoj pasas silente.

Apude paŝadas larĝbrusta, juna kampulo kaj variolmakula cigano. Ĉi lasta surhavas multfoje flikitan, bluan pantalonon kaj sam-tian dolmanon. El la interna poŝo de lia dolmano elvidiĝas la funelo de lignofluto. Aliflanke de

la ĉaro paŝadas nigratoga pastro kaj larĝvanga kamparano, kiu jam estas probable kvardekjara. La pastro estas pli juna. Alta homo kun larĝa vizaĝo. Li havas nek barbon nek lipharojn, eĉ brovojn ne. Kaj estas rufa kiel ruĝa beto. Nur la pupiloj de liaj du okuloj estas nigraj. Antaŭ kelkaj tagoj lin priverŝadis turkoj per bolanta akvo, por ke li malkaŝu la trezorojn de la preĝejo.

Kiel povus havi trezorojn lia preĝejo?!

Nu jes: ili ĉiuj estas kaptitoj kompatindaj. Kun ĉenoj sur la piedoj. Iliaj manoj same en fero, ĉe iuj antaŭe, ĉe aliaj malantaŭe. La juna fraŭlo estas ligita al la cigano kaj la pastro al la kamparano. La junulo ne havas piedvestojn. La piedkatenojn li subŝtofis per ĉifonoj.

La ĉifonoj jam saturiĝis de sango.

– Ni haltu – li petegis returninte sin fojfoje –, lasu min reĝustigi la kate-non!

Sed la janiĉaroj eĉ iom ne atentis lin. Ili babilis turke inter si kaj responde pafis al li maksimume koleran rigardon.

La okuloj de Gregorio gluiĝis al la junulo. Kiel fortikajn manojn li havas! Kaj kian ruĝan veston li portas! Li ne timas. Se ambaŭ liaj manoj ne estus ĉenitaj postdorse, eble ĉiuj turkoj time forkurus.

La junulo vere ne timis. Li levis la kapon kaj alkriis la apude rajdantan, kurbadorsan turkon:

– Fajro vin konsumu, paganaj lupoj!

– Gasparo, Gasparo – vokis al li Margareto el la ĉaro –, toleru pace vian sorton, kiom nur eblas. La suno, vi ja vidas, kliniĝas al subiro, ili devos halti.

Kiam ŝi viŝis ĉe tio la okulojn, ankaŭ la du infanoj ekploris.

– Mi volas hejmeniri! – plorblekis Gregorio.

– Al patro! – ekploris la eta Enjo.

La turkoj nun fine haltis. Deĉevaliĝis kaj elprenis kruĉojn. Ili lavis al si la manojn, piedojn kaj vangojn. Poste ili genuiĝis en rekta vico direkte al la sunleviĝo. Kisis la teron kaj preĝis.

Dume regis silento.

La knabino grimpis el la ĉaro kaj ŝiris tukon el sia ĉemizrando. Ĉirkaŭvolvis per ĝi la piedojn de la fraŭlo kaj kun amema atentemo reŝovis la kate-non.

– Dio benu vin, Margareto! – diris la junulo kun suspiro.

– Por la nokto, se eblos, ni pansos ilin per plantago, Gasparo.

Kaj ŝia vizaĝo tordiĝis al ploro. En ĉiu horo ŝi ploris kelkajn minutojn, sed tuj poste ŝi ankaŭ kantis al la infanoj. Ĉar kiam ŝi larmis, ili same ekploris.

– Oj, kiel *malŝata* mi *eŝtaŝ* – ekparolis la cigano sidanta apude en la polvo. – Mi *ŝola manĵuŝ* tri panojn kaj du tabulojn da lardo.

La veturigisto, junulo same kaptita, kun katenitaj piedoj, ekridetis pri la suspiro de la cigano.

– Ankaŭ mi estas malsata – li respondis ĵetante malrespektan rigardon al la turkoj –, sed mi ja kuiras al ili vespere tian paprikan viandaĵon, ke ĝi tuta restos por ni.

– Do vi *eŝtaŝ* ilia *kuiristo*, he?

Je la vorto “he” ektikis la brovoj de la koĉero. Tamen li respondis:

– Nur vespere. Tage ĉi tiuj rabas al si ankaŭ tagmanĝon.

– De kiam vi *ŝervaŝ* ĉe la hartufaj¹⁰ *ŝinjoroj*?

– De tri tagoj.

– Ĉu oni ne *povuŝ* iel *forvaporiji*?

– Ne, de ĉi tiuj neniam. Vidu, kiajn botojn mi havas sur la piedoj.

Li levis unu piedon. Pezaj, dikaj ĉenoj ektintis ĉe tio.

– *Ŝed* eble hodiaŭ vi ne *kuiroŝ*? – meditis zorgoplene la cigano.

– Certe mi kuiras. Hieraŭ mi kuiris al ili ion tian, ke ili lekis poste la lipojn kiel hundoj.

– Ho, *ŝe* ankaŭ mi jam *povuŝ* leki al mi la lipojn! *Ŝed* mi jam eĉ ne *ŝciuŝ*, ke mi *havaŝ buson*, *ŝe* fojfoje mi ne *paroluŝ*.

– Ankaŭ vinon ili rabis tagmeze. Jen ĝi en la postkrado de tiu ĉaro.

– La turkoj ja tute ne *trinkaŝ* vinon, he!

– Nu, neniu el ili turkas, kiam ili vidas vinon.

– Ho, tiam mi *havoŝ feŝton* – jubilis la cigano –, mi *blovoŝ* al ili tian melodion, ke iliaj piedoj mem *movoŝ ŝin* al danco.

Fininte la preĝadon la unuokula janiĉaro ne ekirigis la ĉarojn. De sur la montosupro jam vidiĝis la urbo en la valo, vualita en vesperkrepusko. Ĝi estas hungara nesto. Vespoj loĝas en ĝi.

La turkoj interkonsiliĝis. Fininte la unuokula janiĉaro alvokis la koĉeron:

– Sekvu min! En la arbaron!

Kaj dum kvinminuta marŝado ili kondukis la ĉarojn, veturilojn profunde en la arbaron.

Dume la suno sinkis inter la arboj. Krepusko sidiĝis sur la arbaro. Sur la klara firmamento pompe ekbrilis la unua stelo.

Sur taŭga senarbejo la turkoj ligis la ĉevalojn per paŝtoŝnuroj. La janiĉaro liberigis la manojn de la pastro kaj krie ordonis al li:

– Vi faros fajron!

¹⁰ Turkoj lasis hartufon sur siaj tonditaj kapoj.

– Mi pli bone *kapablaŝ* tion! – ekkriis la cigano. – Via grandeco, turka *mosto*, mi *kiŝaŝ* viajn manojn kaj piedojn, *laŝu* min fari la fajron, tio *eŝtaŝ* mia *profeŝio*!

– Silentu! – elruktis al li la turko.

Ankaŭ la tri virinoj estis liberigitaj, por helpi ĉe la preparado de la fajro. Ili kun la pastro kolektis sekajn herbojn kaj branĉetojn sub la proksimaj arboj. Per ŝtalo kaj tindro ili baldaŭ incitis fajron.

Ankaŭ la koĉero estis liberigita de sur la sidbreto.

– Tian, kiel hieraŭ – instrukciis al li la unuokula turko.

– Vi ricevos – respondis la koĉero.

Li metis akvon en granda ferkaldrono super la fajron, kaj post kiam la pastro kun la cigano rapide senfeligis ŝafidon, per spertaj manoj li haketis ĝin en la kaldronon. Sur la viandon faladis abunde ceperoj kaj kapsikeroj kaj li certe estus haketinta ankaŭ terpomon en la sukon, sed ne faris, ĉefe manke de ĝi. Tiutempe oni ja tute ne sciis, kio estas terpomo! Kvankam sinjoroj gustumadis ĝin kiel maloftan raraĵon, sed ĝi ankoraŭ ne havis nomon. Nur post tagmanĝo oni surtabligis ĝin kiel delikataĵon por moŝtuloj.

Ĉirkaŭ la fajro kuŝiĝis almenaŭ dudek diversaj turkoj. La ĉarojn, veturilojn ili starigis ĉirkaŭbarile. La ĉevalojn ligis per paŝtoŝnuro ekster la veturiloj.

La malliberulojn ili kunpelis en unu grupon. Ĉi lastaj estis sume dek kvar: naŭ viroj kaj kvin virinoj, inkluzive la du infanojn. Ili kompatindaj falsterniĝis sur la herbo. Kelkaj el ili tuj dormiĝis.

Ankaŭ la eta Enjo jam dormis sur la supro de littolaĵo. Ripozigante sian kapon en la sino de Margareto ŝi songis kaj per sia dekstra mano tenis sian mizeran pupeton sur sia brusteto. Greĉjo kuŝis surventre apud ili. Li klinis sian vizaĝon en la manojn kaj dormeme rigardis la turkon. La unuokula janiĉaro kelkfoje ĵetis rigardon al ili. Li lasis ilin kun la knabino en la ĉaro.

La fajro flagris kun altaj flamoj. La turkoj buĉis ŝafidojn, kokinojn, anserojn. La kaptitoj fervore laboris pri la pretigo de la manĝaĵo kaj post apenaŭ kvaronhoro la viando jam vigle bolis en la kaldronoj kaj pendpotoj, ruĝiĝadis la femuraĵoj sur rostiloj. Iu turko malfermis saketojn de pastaĵeroj.

En la arbaran aeron miksiĝis apetitiga manĝodoro.

Ankoraŭ ne pasis horo, kiam koĉero Andreo ricevis tiel sonorane vango-frapon, ke lia ĉapelo deflugis du klaftojn¹¹ for.

– Ke la sepa infero vin konsumu – alblekis lin la unuokula janiĉaro –, kiom da papriko vi ŝutis en ĉi tiun manĝaĵon?!

La paprikaŭca viandaĵo venis al la malliberuloj, por ne malgranda ĝojo de la cigano. La turkoj mem dividis inter si la rostitajn femuraĵojn.

La bareloj ricevis intertempe kranon. El trinkpotoj kaj -kornoj sorbis la turkoj hungaran vinon. La cigano stariĝis. Viŝis la buŝon per la mano kaj la manon per la pantalone kaj jene ekpepis:

– Via grandeco, *ŝinjora mosto Humursako*, mi *kiŝaŝ* viajn manojn kaj piedojn, *laŝu* min iom *flaĵoleti* por la *fojo* de la *eŝtimata* publiko!

La unuokululo nomita Humursako – fakte Jumurĝak – returnis sin kaj moke alokulis lin:

– Vi alkokerikus ĉi tien la hungarojn, he?

La cigano humorperde rekaŭriĝis inter la manĝantojn kaj enpensiĝe turnadis la lignokuleron.

Ankaŭ la turkoj manĝis, trinkis. Dume interŝanĝadis, dividadis la akiraĵon. Iu malafabla *akinĝio* kun pendantaj lipharoj elprenis ferŝranketon el iu ĉaro. Ili rompe malfermis ĝin. Ormoneroj, ringoj, orelpandaĵoj ŝutiĝis el ĝi.

Ili dividis la enhavon ĉe la fajro.

Greĉjo estis dormema, sed ne povis deturni la okulojn for de sia turko. Timiga, neordinara vizaĝo estis por li tiu nurhaŭta kapo. Kiam tiu demetis sian kalpakon, la kalvo de lia kapo kunfandiĝis kun la senhareco de lia vizaĝo. Kaj strange li ridis. Eĉ lia dentokarno elvidiĝis, kiam li ridis.

Post kiam la turkoj dividis la monon, li elprenis dikan, ĉamledan zonon el sub sia dolmano. La zono streĉe pufis de mono. Li stariĝis kaj iris ekster la ĉaroringon, kie la ĉevaloj paŝtadis sin.

Greĉjo sekvis lin per sia rigardo. Li vidis, kiel la turko eltiras malantaŭe lignostifton kaj enŝovas unu post alia monerojn tra apertureto en la selarkon.

– Kaj vi kial ne manĝas? – alparolis la pastro Gasparon.

La fraŭlo sidis rande de la grupo kaj sombre rigardis antaŭ sin.

– Mi ne bezonas – li respondis.

Post kelka tempo li turnis sin al la pastro:

– Se via pastra moŝto finis, mi havus ion por preparoli kun vi, se vi aŭskultos min.

¹¹ 1 klafto = 1,8 – 1 m

La pastro demetis la lignokuleron kaj tiris sin apud Gasparon:

– Kion vi bezonas, mia filo?

– Pastra moŝto – diris serioze la junulo –, prenu mian konfesion!

– Por kio?

– Nur tiel – respondis la junulo –, por ke pura mi iru en la transmondon.

– Vi estas ankoraŭ tre for de ĝi, Gasparo.

– Ne tiom for, kiel vi pensas.

Li ĵetis rigardon al la turkoj kaj daŭrigis:

– Kiam ili finos la vespermanĝon, venos ĉi tien la turko, kiu min kaptis. Venos por remeti la ĉenojn sur niajn manojn. Tiam mi mortigos lin.

– Ne faru tion, mia filo!

– Jes ja mi faros, respektinda moŝto. Kiam li venos ĉi tien, mi forkaptos unu el liaj tranĉiloj kaj enpuŝos ĝin al li! En la ventron de la hundo! Do bonvolu preni mian konfesion!

– Mia filo – diris trankvile la pastro –, mi ne povas preni konfesion, ĉar mi estas luterano.

– Ĉu novkredulo?

– Oni nomas ĝin nova kredo, filo, sed verdire ĉi tiu estas la vera malnova kredo, kiun Jesuo de Nazareto postlasis al ni. Ni ne prenas konfesion, ni nur konfesas. Ni pensas tiel, ke Dio vidas nian animon. Sed kial vi per-eigus vin? Vidu, ni ankoraŭ staras sur hungara tero kaj Pécs troviĝas sub ni. Jam ofte okazis, ke oni liberigis hungarajn kaptitojn.

– Kaj se oni ne liberigos nin?

– La boneco de Dio certe akompanos nin sur nia vojo. Troviĝas ne mal-multe da homoj, kiujn trafis la feliĉo de Dio sur turka tero. Ili iras tien en malliberulaj ĉenoj kaj fariĝas tie sinjoroj. Poste ili iel hejmentrafas. Venu, filo, glutu ion! La manĝado rekvietigos vin.

La junulo rigardis kun ombra mieno antaŭ sin.

La pastro denove ekparolis:

– Por kio vi vokis min, se vi ne konsideras la konsilon?

La malliberuloj estis plejparte junaj kaj fortaj homoj. Inter la virinoj troviĝis ankaŭ maldika, ĉifonvesta ciganino. Ŝiaj manoj kaj piedoj, eĉ la haroj estis laŭ cigana kutimo kampeĉe ruĝigitaj.

De tempo al tempo ŝi ĵetis malantaŭen la harojn, ĉar ili pendiĝis antaŭ la okulojn. Kaj ofte ŝi babilis en la cigana lingvo kun Sárközi, la variolmakula cigano.

– Ĉu eble via edzino? – demandis lin la malliberuloj.

– Ne – respondis la cigano –, eĉ unufoje *si ne eŝtiŝ* tio.

– Pri kio vi babilas cigane?

– Ĉi tiu virino *diraŝ*, ke *ŝe* oni *laŝuŝ sin ŝidiji* apud la fajro, *si antaŭdiruŝ*

nian *eŝtontecon*.

– La estonteco estas en la manoj de Dio – riproĉis ilin la pastro. – Faru nenian farson en Lia nomo!

Inter la viroj sidis ankaŭ du pliaĝuloj. Unu estis senvorta, sinjorforma homo kun cikatra vizaĝo, pri kiu efektive ne eblis scii, ĉu li estas sinjoro aŭ cigano, ĉar li respondis al neniuj demando. Li odoris je brulinta pulvo. La alia estis larĝvanga kamparano ĉenita al la pastro. Li ĉiam rigardis rigide kvazaŭ mirante kaj lasis pendii la kapon, kvazaŭ ĝi estus multe pli peza ol de ajnulo. Nu ja, li havis grandan kapon.

La malliberuloj, dum ili manĝis la paprikan ŝafviandaĵon, mallaŭte interparolis.

Temis antaŭ ĉio kompreneble pri la liberiĝo: kiel ili povus fuĝi de la turkoj.

– Neniuj – diris lakone la grandkapa kamparano.

Li glutis kuleron da viando kaj daŭrigis:

– Mi scias. Mi jam traservis unu sklavecon.

– Ĉu en Konstantinopolo? – demandis tri samtempe.

– Tie – respondis la kamparano profunde ĉerpante per la kulero en la ferkaldrono –, dek jarojn mi balais turkan teron.

– Kaj kiel vi liberiĝis?

– Kiel? Nu, senpage. Sub la ŝirma mantelo de Jesuo. Iufoje oni kondukis min al Beogrado. Tie mi forkuris: tranaĝis Danubon.

– Kaj kia estas la sklaveco? – demandis dek-sesjara junulo kun selaktecaj okuloj.

– Unu afero estas tute certa, amiketo – respondis malĝoje la kamparano –, ne multaj kokinoj ĉesis pro mi kluki.

– Ĉu vi servis ĉe riĉulo? – demandis voĉo el sub iu ĉaro.

– Ĉe la imperiestro mem!

– Ĉu ĉe la imperiestro? Kio vi estis ĉe la imperiestro?

– Ĉefpurigisto.

– Kia ĉefpurigisto? Kion vi purigis?

– Lian stalon.

– Kaj kiel ili traktas virinojn? – demandis nigrahara, juna virino.

La homo levis la ŝultrojn:

– Kiu inter vi estas juna, tiu ankaŭ tie estas nur virino, kvankam turka. Plej ofte servistino.

– Ĉu oni batas virinojn?

– Iuj jes, aliaj ne.

La pastro levis sin.

– Vi do konas la vojon?

– Se mi nur ne konus ĝin! – suspiris la homo.

La pastro metis unu piedon sur radnabon kaj ĉe la aljetiĝanta lumo de la fajro okulstreĉe observis la larĝan, glatan feraĵon seruritan sur lia piedo.

Gravuretoj videblis sur ĝi. Notoj de kaptito: suferoj de longa vojo en dudek vortoj.

La pastro legis ilin:

– De Nándorfejtér¹² al Hizarlik¹³ unu tago. Poste Baratina.

– Ne – respondis la homo –, eĉ kvin marŝoj necesas ĝis tie.

– Sekve ĉi tiuj kvin krucoj signifas kvin etapojn. Do kvin staciojn. Poste sekvas Alponica.

La homo kapjesis.

– Poste Niŝ.

– Tio estas jam Serbio – profunde elspiris la homo, ĉirkaŭbrakante la genuojn. – Tie oni vidas unufoje semi akvotritikon.¹⁴

– Ĉu akvotritikon? – ekmiris iu virino.

La homo ne respondis.

La pastro plulegis la gravurojn de la kateno:

– Poste sekvas Kuri-Kezme.

– Tie estas multaj *korpo-vermoj*¹⁵.

– Sarkövi.

– Tie laboras tri muelejoj. Ke forsekiĝu la akvo al ĉiuj tri!

– Caribrod.

– Tie oni senindulge trabatis min.

– Kial? – oni demandis samtempe eĉ sesope.

– Ĉar mi rompis mian piedferaĵon.

– Dragoman – plulegis la pastro.

– Ĝi estas jam Bulgario – diris la homo –, de tie oni povas veturi en Sofion. Multas tie turoj. Granda urbo. Ke ĝi disbrulu en polvon!

La pastro daŭrigis:

– Iktiman.

La homo kapjesis.

– Kapiderven.

– Tie troviĝas neĝaj montoj. Ankaŭ somere ili estas blanke kovritaj.

¹² Beogrado, tiutempe hungara limfortikaĵo okupita de la turkoj.

¹³ Tiutempaj (parte ankaŭ nun uzataj) urbonomoj en la teritorio de la nunaj Serbio, Bulgario kaj Turkio.

¹⁴ Rizon.

¹⁵ Skorpioj.

- Pozarki aŭ kio.
 - Jes, tiel; ke la tero englutu ĝin! Kuloj svarmas tie, tre multaj.
 - Filippe.
 - Same urbo. Ke ĝi kolapsu!
 - Kaladan.
 - Oni vendis tie iun mian kamaradon. Ke pesto konsumu ilin!
 - Uzonkova.
 - Multaj fruktoĝardenoj. Bona loko.
 - Harmanli.
 - Turka sinjoro aĉetis tie Antonon Dávidka.
 - Mustafa-paŝa-Köpri.
 - Ŝtona ponto troviĝas tie, grandega. Ke ĝi falegu en la akvon!
 - Drinapolo.
 - Granda, fetora urbo. Tie mi vidis *nazlevanton*¹⁶.
 - Kio ĝi estas – demandis samtempe la kaptitoj.
 - Ĝi estas grandega bruto – respondis la kamparano –, nu, kiel ĉi tiu ŝarĝita veturilo, eble eĉ pli granda; kaj senhara kiel bubalo. Ĝia nazo estas tiel longa, ke ĝi kapablas svingi ĝin, kiel aliaj bestoj la voston: kiam muŝoj ĝin turmentas, ĝi gratas per ĝi siajn flankojn.
 - Corli.
 - Tie videblas unuafoje la maro.
- La kaptitoj suspiris. Kelkaj klinis sian vizaĝon en la manojn; aliaj gapis kun larmantaj okuloj antaŭ sin.

5

- La cikatrovanga, pulvodora homo ekparolis.
- Kunfratoj miaj – li diris kun mallaŭta, aspra voĉo –, se vi povus min liberigi, mi elaĉetus vin ĉiujn.
- La kaptitoj interese alokulis lin.
- La homo ĵetis rigardon al la turkoj kaj pli mallaŭte daŭrigis:
- Mi estas sinjoro. Havas kastelon, eĉ du; mi havas monon, soldataron.
- La kamparano, estinta sklavo levis la ŝultrojn.
- Se tiel, vi ja povos liberigi, ĉar oni elaĉetos vin.
 - Kiel vi nomiĝas, estimata? – demandis la pastro.
 - Malliberulo estas mia nomo – respondis agacite la cikatrovangulo.
- Li stariĝis. Lamante faris kelkajn paŝojn al la turkoj. Poste li sidiĝis kaj

¹⁶ Elefanton.

atente esploris la fajre lumigitajn vizaĝojn.

– Ĉi tiu ne estas sinjoro – ekparolis iu kaptito –, sed ia cigano, eble eĉ ekzekutisto.

Greĉjo ektremis pro teruro pro la vorto ekzekutisto. Lia rigardo fiksiĝis tiudirekte. Per sia infanmenso li komprenis tiel, ke li estas efektive cigano ekzekutisto.

– Se nur ni havus ferbenon! – suspiris Gasparo kun frotvundaj piedoj ĉe la rado.

La malliberuloj sidis kun silenta kaj malgaja enpenŝiĝo. Gasparo daŭrigis:

– La ferbeno estas herbo, per kiu ĉenoj falas.

Inter la janiĉaroj eksplodis ĝoja ekkrio. En iu barelo ili trovis glacivinon. Pri tio ili jubilis. Ili rulis la barelon proksimen al la fajro kaj ŝmacante, sorbete trinkadis ĝin.

– Vivu Hungario! – kriis Jumurĝak levante sian pokalon al la kaptitoj. – Vivu Hungario, por ke la turkoj povu dumvive trinki!

– De kie vi konas la hungaran? – demandis la cikatrovanga sinjoro, kiu pli frue nomis sin Malliberulo.

– Kiel tio vin koncernas? – demandis Jumurĝak malŝate.

La ĉielo jam iĝis stelplena, lumbrila. Majskaraboj zumflugadis inter la roskovritaj arbofolioj.

La malliberuloj jam estis diskuŝiĝintaj en la herbo kaj pluserĉis liberiĝon en siaj songoj. Ankaŭ la pastro dormis. Kun brako sub la kapo. Certe li kuŝas kutime sur kuseno. La cigano ronkis surdorse, kun manoj krucigitaj surbruste, gamboj ipsilone disetenditaj. Ĉiuj profunde dormis. Nur Gasparo eksuspiris ankoraŭ unufoje dormeme-plende:

– Mi ne vidus plu la belan urbon Eger!

Greĉjo same jam dormetis. Luliĝis en dormeton, apenaŭ li metis sian sunbrunan, delikatan vizaĝeton en la manojn; lia kapo sinkis ĉiam pli profunden, al elkliniĝanta angulo de plumkovrilo.

Kaj li jam endormiĝus tute, se aŭdinte la nomon Cecey la pordetoj de liaj oreloj ne mem estus malfermiĝintaj.

La raŭka voĉo de la „cigano ekzekutisto” eldiris ĉi tiun nomon kaj la turko ripetis ĝin.

Ili babilis apud veturilo.

– Ĉe li troviĝas la trezoroj de Dózsa, tion mi firme scias – certigadis la hungaro.

– Kaj kiaj trezoroj ili estas?

– Oraj kalikoj kaj pokaloj, diamanto- kaj perlogarnitaj braceletoj, kolĉenoj, koljuveloj. Ĉio, kio prezentas trezoron por sinjoroj. Se ili ne estas

fanditaj en briketojn. Sed tiuokaze ni trovos la orbrikojn ĉe li.

– Ĉu ĉi tie, sub la arbaro?

– Ĝuste. Interalie pro tio li retiriĝis for de la mondo.

– Ĉu li havas ankaŭ armilojn?

– Belegajn, arĝente damaskenitajn glavojn kaj kirasojn. Povas esti, la tuta subtegmento estas plena de ili. Mi scias certe, ke en sia ĉambro li tenas ĉirkaŭ ses grandajn ferkestojn. En ili devas kuŝi la plej valoraj aĵoj.

– Cecey... Neniam mi aŭdis ĉi tiun nomon.

– Ĉar li ne plu uzas sian glavon. Li estis la trezoristo de Dózsa.

La turko skuis la kapon.

– Ni estas malmultaj – li pesis enpenŝiĝe. – Ni devas resti ĉi tie ĝis morgaŭ vespere. Por ĝisatendi pli nombran taĉmenton.

– Por kio necesus tiom da homoj? Se vi iĝos multaj, vi devos dividi multparte. Tiu estas jam maljuna homo. Kaj unu lia mano kaj kruro estas faritaj el ligno.

– Kiam vi preterpasis tie lastafoje?

– Antaŭ ĉirkaŭ unu jaro.

– Jaro estas multa tempo. Estos pli bone, se pli multaj ni iros. Se estas vere, kion vi diras, mi liberigos, eĉ pridonacos vin. Kaj se ne, mi pendigos vin sur la pordego de Cecey.

La turko reiris al la fajro kaj videble rakontis la interbabilon kun la mal-liberulo, ĉar la soldatoj atente lin aŭskultis.

La kapo de Greĉjo peziĝis. Li dormiĝis. Sed sonĝis nurajn teruraĵojn. Fine li sonĝis, ke turkoj kuras kun malingitaj glavoj en lia vilaĝo, kaptas lian patrino kaj puŝas ponardon en ŝian bruston.

Li ekstremis kaj vekigiĝis.

Regis nokta obskuro kaj ĉirkaŭe aŭdiĝis najtingala kanto. Cent najtingaloj! Mil najtingaloj! Kvazaŭ ĉiuj najtingaloj de la mondo estus flugintaj en tiun arbaron, por kanti ravaĵojn en la sonĝojn de la kaptitoj!

Greĉjo suprenrigardis al la ĉielo. Ŝiriĝantaj nuboj. Jen-jen trabrilas ste-loj. Iuloke la blanka lunarko trapendas en nubo.

La fajro sub la arbo jam krustiĝis per cindro. Nur meze ruĝiĝas pugno da ardaĵo. La janiĉaroj kuŝas dise en la herbo ĉirkaŭ la fajrujo.

Ankaŭ Jumurĝak tie kuŝas. Sub lia kapo estas ŝultrosako; apude pokalo aŭ trinkpoto, ne bone videblas en la mallumo.

Oni devus hejmeniri. Estis lia unua penso.

Estas malpermesite. Estis la dua.

Li ĉirkaŭrigardis. Nuraj dormantoj. Se li povus forŝteliĝi inter ili! Jes, li devas forkuri, alie ili ne povos reveni en la vilaĝon.

La eta Eva dormis apud li. Li skuis ŝin ameme kaj flustris al ŝi en la ore-

Ion:

– Enjo! Enjo!

Ŝi vekigis.

– Ni iru hejmen! – flustris Greĉjo.

Por momento la buŝo de Enjo tordiĝis, sed tuj ŝi reĝustigis ĝin kaj sidleviĝis. Gape ŝi rigardis Greĉjon kvazaŭ katido vidanta fremdulon. Poste ŝia rigardo direktiĝis al la pupo en ŝia sino, ŝi levis kaj observis ĝin per katideca rigardo.

– Ni iru! – urĝis Greĉjo.

Li degrimpis sur la ekstera flanko de la ĉaro, ellevis la knabineton.

Asabo sidis tuj apud la veturilo. Kun lanco en la sino. Kapo ĉe la radnabo. Apude lignobotelo.

Li dormis tiel profunde, ke la tuta tendaro povus preterpasi lin – escepte la radon, al kiu li apogis sin.

Greĉjo manprenis la etan Enjon kaj tiris ŝin post si.

Sed apenaŭ li ekvidis la ĉevalojn, li haltis.

– La griza... – li flustris. – Ni devas hejmenkonduki la grizan.

Sed la griza estis ligita al la malgranda turka ĉevalo. La piedŝnuron li povis iel malnodi, sed la disligo de la du kondukiloj superis lian kapablon.

– Diablo ligas tiel! – li grumblis pri la nodo.

En sia kolero li gratis ploreme la kapon.

Li provis ree kaj denove, ankaŭ per dentoj. Sed neniel li povis malligi ĝin. Fine li prenis la grizan kaj ekkondukis ĝin.

Gardanto troviĝis ankaŭ ĉe la ĉevaloj. Sed li same dormis. Sidante li ronkis dorse apogita al kurba arbo. Kun malfermita buŝo li spiregis. Greĉjo preskaŭ kondukis la du bestojn kontraŭ lin.

En la herbo perdiĝis la paŝbruo de la ĉevaloj. Ili pasis kiel ombroj. Nek en la ĉaroj nek ekster ili iu vekigis.

Ĉe taŭga arbostumpo Greĉjo haltigis la grizan kaj grimpis sur ĝian dorson.

– Sidiĝu ankaŭ via moŝto – li invitis la knabineton.

Sed la eta Enjo ne povis grimpi sur la stumpon. Greĉjo deĉevaliĝis. Unue li devis helpi al ŝi supreniĝi sur la stumpon kaj de tie sur la dorson de la ĉevalo.

Ili sidis unu post la alia sur la griza. Antaŭe Greĉjo, malantaŭ li Enjo. Ŝi ankoraŭ tenis la ruĝjupan pupon en la manoj. Al ili eĉ ne venis en la menson, ke ŝi enseliĝu sur la alia ĉevalo. Ĝi ne estis ilia. Ŝi kroĉis sin al liaj ŝultroj. Kaj li ektiris la kondukilojn, la griza ekiris eksteren el la arbaro kun-trenante la turkan ĉevalon.

Baldaŭ ili retroviĝis sur la vojo. Tie la griza jam konis la hejmendirek-

ton. Ĝi trotis oportuneme kaj dormeme.

La vojo estis senhoma. La luno nur malforte prilumis ĝin. La arboj staris kiel nigraj gigantoj laŭlonge de la vojo. Greĉjo ne timis ilin. Ja ĉiuj – hungaraj arboj.

6

Tiunokte neniu dormis en la vilaĝo. Ĝis malheliĝo oni serĉis la infanojn. Por morgaŭ, matenkrepusko oni planis traserĉi a bordojn de la rivereto. Nur la soldatoj kuŝiĝis ripozi.

Pastro Valenteno restis ĉe Cecey kaj konsolis la nekonsoleblan geedzan paron.

La sinjorino estis kiel freneza. Ŝi veploradis, svenadis.

La lignokrura homo nur skuis la kapon pri la konsoloj de la pastro kaj amare ekkriis:

- Ne ekzistas Dio!
- Ekzistas! – kontraŭkriis la pastro.
- Ne! – obstinis Cecey.
- Ekzistas!
- Ne!

La pastro faris gluton, poste daŭrigis per mildigita voĉo:

– Kion Dio donas, Li povas ankaŭ repreni; kaj kion Li prenas, Li povas ankaŭ redoni.

La maljuna kriplulo plorskuiĝis kiel infano.

La pastro adiaŭis ilin nur antaŭ mateniĝo.

Apenaŭ li elpaŝis tra la pordo, la pilgrimanto leviĝis el sia junkolito en la galerio.

- Respektinda moŝto – li diris mallaŭte.
- Kion vi volas, kunfrato?
- Ili dronis ne en akvo.
- Kiel? Kion vi scias pri ili?
- Nur ke turkoj forprenis ilin.

La pastro preskaŭ refalis al la muro.

- De kie vi scias tion?
- Kiam ankaŭ mi laŭiris la bordon de la rivereto kun la serĉantoj, mi vidis piedspuron de turko sur talpa teramaseto.
- Piedspuron de turko?
- Spuron de neferumita boto. Hungaroj ne havas tian.
- Eble ĝi estis de sandalo?
- Sur ĝi ne estas sprono. Bonaj estas miaj okuloj; tiu estis spuro de

turko. Kaj troviĝas tie ankaŭ spuroj de turka ĉevalo. Vi ja certe scias, kiel aspektas turkaj hufumoj?

– Do kial vi ne atentigis nin?

– Post pripenso mi ne atentigis. Kiu scias, kien tiuj kunprenis ilin? La tuta vilaĝo estus tuj diskurinta. Kaj por kio tio utilis? Da turkoj estas multaj kaj ĉiuj armitaj.

La pastro paŝadis tien-reen kun rigidaj okuloj. Poste li ekiris al la pordo, sed haltis antaŭ ol meti la manon sur la klinkon. Kaj revenis.

– Vi diras veron – li diris premante la manon sur la frunton. – Sed kion ni faru?

– Faru, kion mi – respondis ŝultroleve Varsányi –, ne parolu!

– Terure! Terure!

– Turkoj iradas nun la vojojn ĉie. En kiu direkto ili foriris? Orienten? Okcidenten? Rezultus el tio nur interbatiĝo kaj morto.

– Prefere ili estus mortintaj – diris la pastro dolorplene.

– Dio scias, kie ili jam pasis, kiam ni serĉadis iliajn spurojn.

La pastro malgaje staris en la galerio. Oriente la ĉielo ŝanĝiĝis hele roz-kolora. Mateniĝis.

En ĉi tiu momento lanĉiĝis laŭta voko tra la vilaĝo:

– Homoj! Homoj! Ili alvenas!

La pastro streĉis la atenton. Kion tio signifas?

Fore iĝis tumulto. Miksitaj krioj. Post kelkaj minutoj bruaj frapoj sur la pordego:

– Enlasu nin! Malfermu! Alvenis la infanoj!

La pastro enkuris la domon:

– Ekzistas Dio, Petro! Leviĝu, ĉar ekzistas Dio!

La du infanoj atendis antaŭ la pordego. Ili sidis sur la griza ĉevalo, dormemaj kaj palaj.

7

En la korton altumultis la tuta vilaĝo: ĉirkaŭ kvindek viroj kaj sam-tiom da virinoj. Kelkaj virinoj surmetis apenaŭ nur jupon; ankaŭ la viroj estis sen ĉapo, kiel ili elkuris aŭdinte la kriadon.

De mano al mano ili prenadis Greĉjo kaj Enjon kaj kisadis ilin, kie ili atingis.

– Greĉjo estas ekde hodiaŭ mia filo – diris Cecey metinte la manon sur la kapon de la knabo.

La patrino de la knabo sen piedvestoj en subjupo falis antaŭ la piedojn

de Cecey.

Dobó rigardis kun mirantaj okuloj la kamparanan knabeton, kiu forprenis ĉevalon de turkoj.

– Estimata – li diris antaŭenpaŝinte –, donu al mi ĉi tiun infanon. Lasu min kunporti lin al Altlando. Mi edukos el li bravan soldaton.

Kaj li levis Greĉjon.

– Ĉu vi volus fariĝi brava soldato, mia filo?

– Mi volus – respondis la infano kun brilantaj okuloj.

– Ĉevalon vi jam havas – diris Dobó –, ankaŭ glavojn ni prenos for de turkoj.

– Ĉu la ĉevalo do estas mia?

La soldatoj de Dobó kurigis, laŭdadis la ĉevalon sur malplena areo de la korto.

– Jes ja, via – respondis Dobó. – Vi ja akiris ĝin milite.

– Sekve ankaŭ la mono estas nia – fieris la infano.

– Kia mono, he?

– Kiu troviĝas en la selo.

Oni malligis la belan velurselon. Skuis ĝin. Ĝi tintis. Oni trovis la stifton sur la arko, kaj jen torentis orpluvo el ĝia interno.

– Ha, prapraavo de mil diabloj – ekkriis mirgape Cecey –, nun ne plu mi akceptas vin mia filo, prefere vi akceptu min via patro. Kunsrapu ĉion, virino! – li kriis al la patrino de la infano.

Tiu rigardis kun vibrantaj okuloj la ormonerojn resalte falantajn sur la teron.

– Ĉu miaj? – ŝi balbutis rigardante jen al Cecey, jen al Dobó.

– Viaj – konfirmis la pastro. – Dio donis ilin al via filo.

La virino prenis sian antaŭtukon. Sed ĝi malestis. Iu homo etendis al ŝi sian ĉapon. Per tremantaj manoj ŝi kolektis la monerojn.

Ŝia filo rigardis ŝin. Kaj neatendite li ekparolis:

– Bone kaŝu ilin, patrino, ĉar morgaŭ ili venos ĉi tien.

– Kiu venos ĉi tien? – ekgruntis Cecey.

– La turkoj.

– La turkoj?

La knabo kapjesis:

– Mi aŭdis, kiam iu turko diris al la ekzekutisto.

– Al ekzekutisto?

– Al la cigano ekzekutisto. Malbela homo.

– Ke ili venos ĉi tien?

– Ke ili venos ĉi tien kaj forprenos la trezorojn de la sinjoro.

Dirinte tion li montris al Cecey.

– Ĉu miajn trezorojn? – demandis mire Cecey. – Ĉu vi freneziĝis? Ĉu do mi havas trezorojn?

La infano levis la ŝultrojn.

– Oni parolis ankaŭ pri la ferkestoj, ke da ili estas ses.

– Tio estas afero serioza – ekparolis Dobó. – Ni eniru la ĉambron!

Li prenis la manon de la infano kaj enkondukis lin.

Oni pridemandis lin, eltiris el li ĉion, kion la infana menso konservis.

– Cikatrovanga, bruna homo. Kia estas tiu cikatro?

– Ruĝa sulko de la buŝo ĝis la orelo.

Dobó saltleviĝis el la seĝo.

– Móre!

– Kiu alia estus! La fripono volas eskapi, pro tio li kondukos la turkojn kontraŭ min.

– Sed ĉu li konas la vojon?

– Li estis ĉi tie antaŭ ĉirkaŭ ses jaroj. Ili renversis ĉe mi ĉion. Forprenis miajn kvindek forintojn kaj la malgrandan oran krucon de mia edzino, krome miajn sep bovinojn.

Dobó kolere-senpacience paŝadis tra la ĉambro.

– Kiom da homoj vi havas, estimata? Da armilkapablaj?

– Eble kvardek, maksimume. Plejparte maljunaj.

– Malmulte – respondis Dobó. – Kio plej proksimas? Pécs, ĉu ne? Sed tie Johano Szerecsen komandas, johanano; malamiko de ni.

– Ni devas forkuri, forkuri! – krias Cecey ĉagrenite. – Sed kien ni kuru?

– La tuta vilaĝo ja ne povas forkuri! Kiel ni lasus sola la vilaĝon? Hu, estas egale. Se temas pri tio, ke ni defendu nin kontraŭ turkoj, hungaroj estas hungaroj, de kiu ajn partio ili estas!

Kaj li eliris.

– Ĉevalen, homoj! – aŭdiĝis lia komando el la korto.

– Mi iras for, s-ro Cecey, al Szerecsen. Sed dume laboru! Priŝprucigu ĉiujn tegmentojn ĝisgute! La loĝantoj de la vilaĝo kunprenu ĉion sian valoran kaj kolektiĝu ĉi tie en la korto. Laŭlonge de la barilo oni metu ŝtonojn kaj barelojn. Falĉiloj, pioĉoj, ferforkegoj estu en la manoj eĉ de la virinoj! Post du horoj mi revenos.

Li saltis sur la ĉevalon kaj forgalopis kun siaj soldatoj.

8

La Cecey-domo estis konstruita sur granda, kvadrata grundo ĉirkaŭita per ŝtonbarilo. Ĝi estis apenaŭ homalta kaj jam tre kaduka.

Jam antaŭtagmeze instaligis la tuta vilaĝo en la korto. Inter amasoj de littolajoj kaj mebloj vagadis bovinoj, kaproj kaj porkoj, gakis anseroj, ambliis anasoj kaj kuradis kokinoj. Iu homo akriĝis glavojn, tranĉilojn kaj falĉilojn apud la garbejo. La pastro ligis al si larĝegan, rustan glavon kaj frapis meze de la korto ĉirkaŭ sesfoje en la aero. La maljunulo provis, ĉu li ankoraŭ kapablas tion.

Kaj kelkaj virinoj kuiris manĝaĵon en pendpotoj en iu kortoangulo.

Cecey havis ĉirkaŭ ses musronĝitajn pafarkojn en la subtegmento. Li disdonis ilin al la maljunuloj, kiuj batalis kun li en la Dózsa-milito.

Ĉirkaŭ tagmezo revenis Dobó. Li venigis kun si nur tridek soldulojn, sed la vilaĝanoj akceptis lin malgraŭe kun ĝojkrioj.

Li ĉirkaŭiris la korton. Jen li metigis ŝtupetarojn, jen podiojn, kolektigis ŝtonojn. Poste li vokis al si la armitojn de la vilaĝo, laŭnombre kvindek unu homojn kaj grupiginte, dispostenigis ilin laŭ la barilo.

Li mem instaligis kun dek bonaj fusilistoj apud la pordego sur podio.

Ĉe la du enirejoj de la vilaĝo li starigis du kornistojn. Ili devis anonci la proksimiĝon de la malamiko.

Ne longe oni devis atendi.

Ĉirkaŭ la tria horo posttagmeze la korno eksonis ĉe la orienta vilaĝfino kaj post kelkaj minutoj ambaŭ soldatoj galope returniĝis.

– Ĉu ni ĉiuj estas ĉi tie? – demandis Cecey.

Nur la patrino de Gregorio forestis. La malfeliĉa virino konfuziĝis pro la ormoneroj. Ŝi ade-ree enfosadis, kaŝadis ilin. Ne kuraĝis lasi ilin ĉe Cecey, ŝi timis, ke turkoj forprenos ilin.

– Nun jam estas egale – diris Cecey surmetinte la kaskon. – Pordegon fermi! Sakojn, ŝtonojn malantaŭ ĝin! Lasu nur tioman fendon, tra kiu rajdisto povas traŝovi sin!

Dume la soldatoj revenis.

– Ili venas! – kriis unu el ili de malproksime.

– Ĉu multaj? – demandis Dobó.

– Pro la arboj ili ne videblas, nur la antaŭtaĉmento.

– Do reiru – stamfis kolere Dobó – kaj rigardu, kiom-ope ili venas! Kuri vi havos tempon ankaŭ, kiam oni persekutos vin.

La soldulo el Pécs ruĝiĝinte returnis sian ĉevalon kaj regalopis direkte al la malamiko.

– Ĉu tiaj bravuloj vi do estas? – demandis Dobó iun soldulon el Pécs, starantan proksime.

– Tute ne – li respondis honteme. – Tiu dungiĝis al ni nur antaŭ nelonge. Li estis tajlora submajstro. Li ankoraŭ ne gustumis batalon.

Post kelkaj minutoj la tajloro regalopis, sekvata de ĉirkaŭ dek kvin ruĝ-

ĉapaj *akingioj*.

Nun li jam efektive estis persekutata.

– Malfermu la pordegon! – ordonis Dobó.

Samtempe komandis al siaj fusilistoj:

– Pafu!

La dek fusilistoj celis. La pafoj krake ektondris. Unu janiĉaro el la turkoj glitfalis de sia ĉevalo kaj ruliĝis en la vojfoson. La ceteraj retrocedis.

Ili returnis sin kaj fortrotis.

La tajloro enrajdis tra la malfermita pordego.

– Nun kiom ili estas? – demandis Dobó ridetante.

– Mil – respondis la tajloro ŝvitante kaj anhelante –, eble eĉ pli.

– Tiom estas neniom – respondis Dobó –, se ili estas nur cent, hodiaŭ ni eĉ dancos.

– Mi diris mil, sinjoro.

– Mi komprenis vin bone – respondis Dobó. – Se vi vidis mil, tiam ili estas nur cent aŭ eĉ ne tiom.

Fine de la vilaĝo ĝirleviĝis fumo.

La *akingioj* jam bruligadis.

– Ĉu vi sufiĉe priŝprucis la tegmentojn? – demandis Dobó.

– Fojno, pajlo, kio brulas – respondis Cecey.

Kaj li tintigis sian glavon al la pordega lintelo.

En ĉi tiu momento aperis la unuokula janiĉaro sur la vojo. Kun kiraso ĝistalia. En lia zono ponardoj kaj pistoloj. Apud li, same sur ĉevalo, la hungaro, kiun Greĉjo nomis cigano ekzekutisto. Post ili taĉmento de *akingioj* kaj flanke kelkaj piede kurantaj *asaboj*.

Kun flamantaj tufoj en la manoj.

– Ladislao Móré! – ekstentoris Dobó kaj eĉ stamfis per la piedo. – He vi, honto de la lando, matura frukto por la infero!

La janiĉaro konsternite ĵetis rigardon al la apudrajdanto.

– Ne kredu lin! – li diris paliĝinte. – Mi ne estas Móré. Oni volas vin konfuzi.

La janiĉaro haltigis sian ĉevalon, por ke ĝis-aligŭ la postvenantoj.

– Mi konas ankaŭ vin, Jumurĝak! – elkriis Dobó. – Ĉu tio estas ja la turka honoro, prirobi tiujn, apud kiuj hieraŭ vi ankoraŭ batalis? Rabisto vi estas, bandito, same kiel via komplico!

La janiĉaro alrigardis, sed ne respondis.

– Nu venu, venu, vi, sencerbulo! – vokis Dobó. – Kvankam oro ĉi tie ne troviĝas, sed feron vi povos ricevi, el boneta speco.

Kaj li alcelis lin: ekknaligis sian fusilon.

Jumurĝak retrosinkis sur sia ĉevalo. Deglitis, pumfalis en la polvon. Pre-

skaŭ samtempe ekknaris ankaŭ la aliaj fusiloj kaj la turkaj pistoloj.

Móré etendis la manon al la sinkanta janiĉaro, sed nur la ponardon li sukcesis elkapti el lia zono. En la alia minuto li frapis per la klingo la ingvenon de sia ĉevalo. La besto baŭminte ekgalopis. Móré frapegis ĝin, kiom li povis.

– Tie kuras la oro! – kriis Dobó al la turkoj.

Tiuj mirhaltis por momento, sed poste kun kolerega bleko kaj pafknaĵoj ekkuregis post Móré.

Kaj dum ili pretergalopis la domon, Dobó nombris ilin:

– Dek.. dudek... kvardek... kvindek.

Li ankoraŭ atendis minuton, poste desaltis de la podio.

– Ĉevalen, homoj! Ili ne estas eĉ sesdekope!

Ili saltis sur la ĉevalojn. Dobó rekriis el la pordego al Cecey:

– Tiun kirasitan turkon, se li ankoraŭ vivas, ni enfermu! La vilaĝanoj mortbatu la bruligantojn!

Kaj ili forgalopis tra la pordego.

La vilaĝanoj ne atendis multan instigon. La fumo jam serpentumis alĉiele en ĉirkaŭ kvin lokoj de la vilaĝo. Svingante falĉilojn kaj hakilojn ili ĉiuj elkuregis tra la pordego.

Cecey elrapidis kun la pastro kaj du kampuloj sur la vojon. Jumurĝak jam sidis. Li estis duonsvena. La kuglo de Dobó enpremis lian kirason precize super lia koro.

– Ligu – ordonis Cecey – kaj konduku lin en la korton!

La turko senvorte lasis sin ligi.

– Ĉu vi scipovas ŝakludi? – altondris lin Cecey.

La janiĉaro kapjesis kaj diris:

– Ne.

Dum oni ligis liajn manojn, la alia turko levis sian sangokovritan vizaĝon el la foso.

– Ligu lin – diris unu el la kampuloj –, dume mi mortbatos tiun alian.

– Haltu! – vokis Cecey.

Li allamis la sangoŝmiritan janiĉaron kaj metinte sian glavon kontraŭ lia brusto, demandis lin:

– Ĉu vi scipovas ŝakludi?

– Kaplaman¹⁷ – respondis la turko duonsvene.

– Ŝako?

– Ŝako, mato, pato? – redemandis ĝeme la turko.

– Jes, jes, Mahometo piedbatu vin! Portu ankaŭ ĉi tiun en la korton, li

¹⁷ Vorto mistordita de la aŭtoro.

estas mia kaptito!

[...]

Reĝo Johano estas mortinta. Lia filo estas ankoraŭ suĉinfano. La nacio ne havas gvidanton. La lando similas nun al blazonoj, sur kiuj grifoj baŭmantaj unu kontraŭ la alia kolere kaptas por la krono ŝvebanta inter ili.

La pensado de la nacio estas konfuzita. Neniu scias, ĉu timi prefere la regadon de la paganaj turkoj aŭ tiun de la kristanaj germanoj.

La germana Ferdinando sendis sian pezmensan generalon Roggendorf kontraŭ Buda. La turka imperiestro same ekiris, por starigi sian duonlunan flagon sur la hungaran reĝan palacon.

La analoj skribis la jaron 1541.

Sur landvojo tra montaro Mecsek du rajdantoj trotras montosupren en iu Aŭgusta, lunluma nokto. Unu estas magrulo en nigra mantelo kun razitaj vanĝoj, probable pastro. La alia dek-sesjara, longhara sinjorido.

Ilin postsekvas sur la vojo servisto trotanta sur ĉevalo. Li sidas sur du pufplenaj sakoĵoj anstataŭ selo. Ankaŭ surdorse li havas grandan ledsakon, aŭ kiel ni dirus nutrosakon. El la ledsako elstariĝas tri specoj de fustoj. Unu, se fojfoje ĝi ekbrilas, aspektas fusilo.

Maljuna, dika sovaĝpirujo nigras apudvoje. Tie ili devojigas la ĉevalojn.

– Do ĉi tiu? – demandas la pastro observante la arbon.

– Ĉi tiu – respondas la junulo. – En mia infanaĝo nestis en ĝi strigo, de tiam la kavo verŝajne plivastiĝis: se ne pli, almenaŭ unu homo povas eniĝi.

De sur la dorso de la ĉevalo li tuj pendtiris sin sur la pirujon kaj per unu salto svingis sin sur la maljunan trunkon.

Per sia glavito li borserĉis en la putra arbotrunko. Nenio elflugis el-ene.

Li lasis sin malsupren.

– Eĉ ni ambaŭ eniĝus! – li gaje elkriis.

Li elgrimpis kaj desaltis sur la herbon.

– Do ek al laboro – vokis la pastro.

Kaj deĵetis sian mantelon.

Tio estis pastro Gabrielo. Kaj studento Gregorio Bornemissza.

Pasis ok jaroj, dum ni ne vidis ilin. La pastro ne multe ŝanĝiĝis. Nur liaj brovoj elkreskis. La barbon kaj lipharojn li razis certe pro la postsignoj de la varmega akvo. Kaj krome li iom maldikiĝis.

Des pli ŝanĝiĝis la knabo. La ok jaroj preskaŭ maturigis lin viro. Sed nur laŭstature. Lia vizaĝo estis iel nedifinebla: nek bela, nek malbela, kia kutimas esti tiu de dek-kvinjaraj knaboj. Nur la vizaĝkoloro restis: ruĝbruna, de

milda tono. La ĝisŝultre falantaj, ondaj haroj estis vira modo tiutempe.

La servisto elprenis du fosilojn el la ledsako. Unu prenis la pastro, la alian la junulo.

Ili iris sur la landvojon kaj en ĝia mezo komencis fosi tranĉeon al la arbo.

La servisto demetis ambaŭ sakojn apud la fossejo kaj reiris al la ĉevaloj. Deprenis la bridojn. Metis katenojn sur iliajn piedojn. Ili paŝtu sin sur la bona, rosfreŝa arbarherbo.

Poste ankaŭ li eklaboris. Li elpakis ĉion el la dikventra ledsako: panon, trinkujon, armilojn. Li komencis skrap-enigi en la sakon la ŝtonplenan teron, kiun la du fosiloj elkavigis. Poste disŝutis ĝin en la vojfoson. Kaj returne li kunportis fortikajn ŝtonegojn apud la kavon.

Ne pasis horo, la du homoj staris jam ĝistalie en la kavo.

– Sufiĉe – ekparolis tiam la pastro. – Johano, nun la sakojn al mi!

La servisto altrenis ambaŭ.

– Ne metu la fusilon en roson! – atentigis lin la pastro.

Li donis pluajn instrukciojn:

– Prenu ĉi tiun fosilon! Faru interfoson de la kavo ĝis tiu sovaĝa pirujo. Ĝi estu unu ulnon profunda ĉi tie, sur la vojo. Ĉe la herbo sufiĉas duonprofunda. La herbotapiŝon deprenu tiel, ke poste ni povu ĝin remeti. Nenio el la laboroj restu videbla!

Dum la servisto laboris pri la foso, la du sinjoroj mallevis la sakojn en la kavon.

Ambaŭ estis plenŝtopitaj per pafpulvoro.

Ili premtretis kaj kovris ilin per grandaj ŝtonoj. La spacojn inter la ŝtonoj ili ŝtopis per ŝtoneroj, tero.

Dume la servisto plilongigis la foson ĝis la arbo kaj garnis ĝin per ŝtonoj. Meĉo estis kondukita laŭlonge de ĝia fundo. Per plataj ŝtonoj ili kovris ĝin tra la tuta longo, por ke se pluvos, ĝi ne malsekiĝu.

– Nun mi jam scias – rimarkigis gaje la servisto –, kio ĉi tie prepariĝas.

– Nu kio, Johano?

– Iu flugos en la ĉielon.

– Kaj kiel vi opinias, kiu?

– Kiu? Estas ja ne malfacile eltrovi. Morgaŭ preterpasos la turka imperiestro.

– Hodiaŭ – respondis la pastro ĵetante rigardon al la ruĝiĝanta ĉielvolbo.

Kiam la leviĝanta suno prilumis la landvojon, nenia postsigno de kavo plu videblis.

La pastro viŝis sian frunton.

– Nun jam surĉevaliĝu, filo Johano kaj ek al la supro de Mecsek! Iru ĝis

loko, de kie vi povos observi la vojon tute ĝis Pécs.

– Mi komprenas, sinjoro.

– Mi kun la studento kuŝiĝos dudek-tridek paŝojn for de ĉi tie, malantaŭ la arbo. Kaj vi gvatos la alvenon de la turkoj. Apenaŭ vi ekvidos la unuan rajdiston, galopu returne kaj veku nin!

Post tio la pastro eniris la arbaron. Kun la studento li serĉis agrablan, herbokovritan ripozejon. Ili sternis siajn mantelojn kaj ambaŭ senplie dormiĝis.

2

Ĉirkaŭ tagmezo la servisto revenis kun hasta galopo de la montosupro.

– Ili proksimiĝas! – li kriis de fore. – Terure granda armeo torentas!

Kvazaŭ maro!

Kaj alveninte, spirmanke li daŭrigis:

– Ĉiuj hundnaskitoj sidas en veturiloj, kvazaŭ ili estus malsanaj.

La pastro turnis sin al la studento.

– Sekve ni povas foriri por tagmanĝi al tiu alia patro via.

– Ĉu al s-ro Cecey?

– Tien.

La studento demande rigardis la pastron. Ankaŭ la servisto.

Tiu ridetis.

– Ni venis unu tagon pli frue. Ĉu vi ne komprenas? Ĉi tiuj estas la tendaristoj. Ili antaŭiras kaj enbatas la tendofostojn, hisas la tendojn, por ke kiam la kerno de la armeo alvenos en Mohács, ĝi trovu pretaj ripozejon kaj vespermanĝon.

– Do ni iru al s-ro Cecey! – diris gaje la studento.

Ĉe la rivereto ili deĉevaliĝis kaj zorge lavis sin. La studento plukis bukedon da floroj.

– Por kiu ĝi estos, Greĉjo?

– Por mia edzino – respondis tiu ridetante.

– Ĉu por via edzino?

– Be, tiel ni diras. La eta Eva Cecey iam fariĝos mia edzino. Kune ni pasigis la infanaĝon; post kiam ŝia patro akceptis min sia filo, ĉiufoje, se mi vizitas ilin, mi devas kisi ŝin.

– Mi esperas, vi faras tion volonte.

– Ho jes, plej volonte. Ŝiaj vangoj estas kiel blankaj diantoj.

– Sed el tio ne sekvas, ke vi konsideru ŝin via edzino.

– La maljuna pastro malkaŝis, ke al mi oni destinis la knabinon. Laŭ la

testamento de Cecey kune kun la knabino ankaŭ la vilaĝo estos mia.

- Do la maljuna pastro malkaŝis sekreton.
- Ne. Li nur atentigis min, ke mi klopodu elmeriti tiun bonŝancon.
- Sed ĉu vi estos feliĉa kun tiu knabino?

La knabo ekridetis.

– Rigardu ŝin al vi, majstro! Se vi vidos ŝin, vi ne plu demandos, ĉu mi estos kun ŝi feliĉa.

La ĉevalo sub la studento eksaltis kaj antaŭenkuris kelkajn paŝojn.

Li haltigis ĝin kaj kun plezurradiaj okuloj deklaris:

– Ĉi tiu knabino estas kiel blanka kateto!

La pastro ridetis kaj balancis la kapon.

Ili alvenis en la arbardenso. Devis deĉevaliĝi. Greĉjo iris antaŭe. Li sciis, ke ĉi tiu densaĵo kaŝkovras la vilaĝon.

Kiam ili brugalopis valfunden, virinoj elkuris el la domoj.

– Greĉjo! Jes tiu, Greĉjo! – oni ĝoje kriis.

Gregorio svingis dekstren-maldekstren sian ĉapon.

– Bonan tagon, onklino Judito! Bonan tagon, s-ino Anno.

– La gesinjoroj bedaŭrinde ne estas hejme! – kriis iu virino.

Gregorio ekmiris. Haltigis la ĉevalon.

– Kion vi diras, onklina moŝto?

– Ili foriris. Forloĝiĝis.

– Kien?

– Al Buda.

Gregorio restis mirigita.

– Ĉu ĉiuj?

Nevidema esperburĝono! Li kredis, ke oni respondos jene:

– Ne, la fraŭlino restis hejme.

Kvankam estis antaŭvideble, ke oni respondos jene:

– Ĉiuj ja. Eĉ nia pastro kunveturis.

– Kiam?

– Post la tago de Sankta Georgo.

– Iu almenaŭ restis en la domo?

– La turko.

Mishumore Gregorio turnis sin al la pastro.

– Ili forveturis al Buda. Frato Georgo jam antaŭ longe donacis al ili domon. Sed mi ne komprenas, kial ili ne parolis al mi pri tio, mi ja restadis ĉi tie dum la karnavalo.

– Sekve ni ne ricevos tagmanĝon.

– Kial ne, la turko ja plu restas.

– Kia turko?

– De Cecey: Tulipo. Lia hejma ĉionfaristo. Sed ni alvenis la tombejon. Permesu al mi eniri por minuto. Patrino loĝas ĉi tie.

Malantaŭ la domo videblis tombejo ĉirkaŭita de siringoj, apenaŭ pli granda ol domparcelo. Plena de lignokrucoj, preskaŭ ĉiuj el nesenseligita ligno. Nomoj nenie.

Li transdonis la ĉevalon al la servisto kaj li mem enrapidis. Haltis antaŭ bruna lignokruco jam enprofundiĝinta. Metis la kampoflorojn sur la tombon. Kaj genuiĝis.

Ankaŭ la pastro deĉevaliĝis. Li genuiĝis apud la knabo kaj levinte la vizaĝon al la ĉielo, laŭte preĝis:

– Sinjoro de vivantoj kaj mortintoj, Dio loĝanta en la ĉielo, donu pacan sonĝon al la bona patrino polviĝanta ĉi tie, donu feliĉan vivon al ŝia orfo genuanta ĉi tie! Amen.

Kaj li brakumis al si kaj kisis la knabon.

La nobeldomo staris preskaŭ vid-al-vide al la tombejo. La dompordo estis jam malfermita kaj denskorpa, ruĝvanga virino rigardis kun amikema rideto al la alvenintoj.

– Bonan tagon, s-ino Tulipo – salutis ŝin la studento –, kie forestas via edzo?

– Li estas ebria – respondis mishumore la virino.

– Ĉu ebria?

– Nu jes. La hundnaskito ĉiutage ŝtelas la kelŝlosilon, kvankam ĉiufoje mi aliloke kaŝas ĝin. Hodiaŭ mi metis ĝin sub la kalandrilon. Eĉ tie li trovis ĝin.

– Do ne kaŝu ĝin! Se li povus ordinare trinki, li ne drinkus tiom.

– Ho, jes ja. Li drinkas kiel funelo! Ade-ree li drinkaĉas kaj kantaĉas. Ne emas labori la malbenita!

En la malvarmeta ombro de moruso vere sidis bruna kamparano. Sub li mato, antaŭ li verda fajenca kruĉo. Li ankoraŭ ne estis tiom ebria, ke oni povus forpreni de li la ŝlosilon. Li drinkis en la societo de sia filo, sesjara, nudpieda infano, kies okuloj estis ĝuste tiel nigraj kiel de la patro.

Ĉi tiu turko estis indulgita tiutempe de Cecey, ĉar li diris, ke li scipovas ŝakludi. Poste evidentiĝis, ke ne estas ĝuo ludi kun li ŝakon, sed li uzeblas por ĉiuj ĉirkaŭdomaj laboroj. Precipe kuiru li bone scipovis. Lia patro estis kuiristo ĉe iu paŝao. La virinoj ekŝatis lin, ĉar li montris, kiel oni preparas pilafon, risolon, mielaĵojn kaj ŝorbeton kaj multe ili petolis kun li. Cecey ekŝatis lin, ĉar la turko skulptis por li lignan manon kun fingroj, tute ver-similan. Se li surmetis ganton, neniu dirus, ke lia mano estas el ligno. La maljunulo provis unue arkpafi. Li ordonis malsuprenporti el la subtegmento pafarkon grandan kiel li mem. Per la ligna mano li povis streĉi ĝin. Kaj tiam

la maljuna sinjoro promociis la turkon sia ĉionfaristo.

La edzo de iu hungara junedzino falis tiutempe en milito kaj la turko interamikiĝis kun ŝi, pli malfrue edzinigis ŝin. Kompreneble, antaŭe li estis baptita. Li fariĝis tiel bona hungaro, kvazaŭ ĉi tie li estus naskita.

Kiam li ekvidis la studenton kaj la pastron, li leviĝis kaj turkece krucis la brakojn antaŭ la brusto. Li volis ankaŭ riverenci. Sed ĉar tia kliniĝo finiĝus kun surnaza falo, li esprimis sian respekton per nura ŝancelpaŝo antaŭen.

– Ej, Tulipo – alparolis lin Gregorio kapbalance –, ĉu vi daŭre pludrinkas?

– Oni devas trinki – respondis Tulipo serioze. – Esti turko dum dudek kvin jaroj kaj ne vinumi, tion oni povas ripari nur drinkante.

– Sed se vi estas ebria, kiel vi kuiris por ni tagmanĝon?

– Kuiras mia edzino – respondis Tulipo pikante per la dikfingro en la aeron direkte al sia edzino. – Ŝi kuiras ankaŭ kazean nudelaĵon. Ho, kiel bone ĝi gustas!

– Sed ni volus pilafon.

– Ankaŭ ĝin ŝi kuiras. Ja scipovas.

– Kaj kie estas la domsinjoro?

– En Buda. Venis letero. Foriris la moŝto. Ricevis domon. Kaj la bela fraŭlino sidas en la domo kiel rozo en ĝardeneto.

La studento turnis sin kun zorgoplena vizaĝo al la pastro.

– Kio okazos al ili, se la turkoj eventuale okupos la fortikaĵon?

– Ho ne! – respondis la pastro. – Pli frue perdiĝos la tuta lando ol la fortikaĵo de Buda.

Kaj ĉar Gregorio ankoraŭ kun granda antaŭtimo rigardis lin, li daŭrigis:

– La landon gardas la nacio, la fortikigitan Buda Dio mem.

Tulipo malŝlosis la pordojn. El la ĉambroj ŝvebis ŝima lavendodoro. Li malfermis la fenestrojn.

La pastro enpaŝis. Lia rigardo haltis sur la portretoj pendantaj sur la muro.

– Ĉu eble tiu estas Cecey? – li demandis montrante al la portreto de kaskulo.

– Jes – respondis Gregorio. – Sed nun ne plu tiel bruna. Blankhara.

– Kaj ĉi tiu straba fraŭlino?

– Lia edzino. Mi ne scias, ĉu ŝi estis straba, kiam oni portretis ŝin, nun ŝi ne strabas.

– Probable ŝi estas amara virino.

– Ne. Plie dolĉa. Mi nomas ŝin patrino.

La knabo eksentis sin hejmece, li do proponis seĝon al la pastro kaj kun

feliĉa vizaĝo montradis la malnovaĉajn meblojn.

– Rigardu, majstro: kutime ĉi tie sidas Enjo, kiam ŝi kudras. La piedojn ŝi metas sur ĉi tiun skabelon. Ĉi tie, ĉe la fenestro ŝi kutimas rigardi la sunsubiron, kaj fojfoje ŝia kapo konturas ombron sur la muro. Jen tiun bildon desegnis ŝi. Plorsaliko kaj tombo. La papiliojn alpentris mi. Kaj vidu, kiel ŝi sidas sur ĉi tiu seĝo, kutime jen tiel. Ŝi kubutas, flankenklinetas la kapon kaj tiel petole ridetas, tiel petolege, ke ion similan oni ankoraŭ ne vidis!

– Bone, bone – respondis lace la pastro –, prefere urĝu, fileto, la tagmanĝon!

3

Vespere ili kuŝiĝis malfrue.

La pastro diris, ke li devas skribi kelkajn leterojn, li do ne tranoktis en unu ĉambro kun la studento.

Ankaŭ ĉi tiu sidiĝis por skribi leteron. Li skribis al sia “katineto”, kiom surprizis lin la malplena domo; li demandas, kial li ne ricevis leteron pri la transloĝiĝo. Kaj se oni informis lin, la letero ja certe mistrafis.

Ja en tiu tempo ne ekzistis poŝto sur la hungara tero. Nur grandsinjoroj povis korespondi unu kun aliaj. Kiu volis sendi leteron el Buda al Öreglak, tiu devis zorgi ankaŭ pri leterportanto.

Iom post iom la dormo pezigis lin. Li sternis sin sur lufel-kovrila benko kaj dormiĝis.

Kaj eble li dormus ĝis plenluma mateno, se ĉe krepusko bovino ne estus ekmuĝinta sub la fenestro.

Tio jam estis nekutima al li. Nek en Somogyvár nek en Szigetvár nek en la ceteraj kasteloj de Valentino Török muĝis bovinoj sub la fenestroj. Ser-voknaboj vekis lin ĉiam kune kun la filoj de s-ro Valentino kaj la pastro jam atendis ilin kun libro en la ĝardeno.

La studento sidleviĝis kaj frotis la okulojn. Ekmemoris, ke hodiaŭ la leciono estos alia: flugigi la turkan imperiestron en la paradizon.

Li ellitiĝis kaj ekfrapis la pordon de la najbara ĉambro.

– Majstro! – li vokis. – Krepuskas! Ni povas ekiri!

Nenia respondo. En la ĉambro estas malhele.

La studento malfermas unu fenestrotabulon kaj la muskovitan fenestron.

La lito de la pastro estas malplena.

Sur la tablo blankas kelkaj leteroj.

Gregorio miras.

– Kiu diablo? – li murmuris. – La lito estas netuŝita, restis kiel preparita.

Li elrapidas el la ĉambro. En la korto s-ino Tulipo nudpieda, en subjupo estas elpelanta la porkojn.

– S-ino Tulipo! Kie troviĝas mia majstro?

– Li foriris ankoraŭ meznokte, ĉe lunlumo.

– Ĉu ankaŭ Johano kuniris?

– Ne. Li restis. La pastro foiris perpiede, sola.

Kun konfuzita menso la studento reiras en la ĉambron. Li jam konjektas, kion la pastro celas. Li rapidas rekte al la tablo.

Inter la leteroj unu kuŝas nefermita. Kun fortaj, dikaj literoj legeblas la alparolo:

Kara filo Gregorio!

Ĝi estas adresita al li. Li paŝas kun ĝi al la fenestro. La inko estas ankoraŭ preskaŭ malseka sur la papero.

Li legas:

Viaj ideo kaj merito estas, se tiu kronita bestio hodiaŭ flugos inferen. Sed via ideo kaŝas en si ankaŭ danĝeron. Ĉi tiun cedu al mi, filo!

Vi vivas en amo kaj estas juna. Via eltrovemo, konoj kaj kuraĝo povos multe utili al la nacio.

Apud mia letero vi trovos saketon, en ĝi turkan ringon. Ĝi estas mia unusola trezoro. Mi konservis ĝin por tiu, kiun mi plej amas. Ĝi estas via, filo.

Krome estu via ankaŭ mia libraro. Legadu ĝin, se iam la nuboj forpasos de la ĉielo de l' patrujo! Nun la hungaroj bezonas glavojn, ne librojn!

Miajn armilojn transdonu al Valenteno Török, mian mineralkolekton al Johano, la herbarion al Francisko. El la libroj ili elektu po unu volumon por rememoro kaj diru al ili, ke ili estu tiel bravaj patriotoj kiel ilia patro kaj neniam ili adeptiĝu al la paganoj, sed penu per ĉiuj fortoj por la restarigo de la nacia reĝado. Cetere mi skribos ankaŭ al ili, kaj kion mi skribos, tio servu por vi tri kiel mia tripartigita animo.

Kiam mi foriris, vi dormis, filo. Mi kisis vin.

Pastro Gabrielo

Ŝtonigita, Gregorio fiksigardis la leteron.

Ĉu morto? Dek-kvinjara knabo ankoraŭ ne komprenas ĉi tiun vorton. Li pensas nur pri la spektaklo, kiam la turka imperiestro, inter fumoj kaj flamoj, disŝiriĝas en ĉifonojn antaŭ liaj okuloj.

Kaj ĉu li seniĝu je tiu spektaklo?

Li enpoŝigis la saketon kun la ringo kaj letero kaj elpaŝis. Rapidis tra la korto al ge-Tulipoj.

– Tulipo – li alparolis turke la homon streĉantan siajn membrojn sub la tegmentorando –, ĉu vi havas ankoraŭ vian turkan veston?

– Ne – respondis tiu –, la edzino kudris el ĝi veŝton al si kaj la infanoj.

– Kaj vian turbanon?
– El ĝi ŝi kudris ĉemizeton. Ĝi estis delikata lintuko.
La studento senluziigita paŝadis tien-reen sub la tegmentorando.
– Kiel mi faru? Konsilu min! La turka armeo hodiaŭ preterpasos sur la ĉefvojo. Ankaŭ la imperiestro veturos kun ĝi. Mi volas vidi lin.
– Ĉu la imperiestron?
– Jes.
– Bone, lin povos vidi la sinjorido.
La okuloj de Gregorio ekbrilis.
– Ĉu vere? Kiel?
– Troviĝas roko super la vojo. Eĉ ne unu, sed du, unu kontraŭ la alia. Vi grimpos supren. La kapon vi kamuflos per folioj kaj vi vidos la tutan armeon.
– Do vestu vin rapide, Tulipo kaj venu kun mi! La edzino plenigu ŝultrosakon per nutraĵo. Ankaŭ lignobotelon vi povas kunpreni.
Je la vorto lignobotelo Tulipo plivigliĝis. Haste surmetis veston kaj kriis al la edzino manĝiganta kortobirdojn:
– Julinjo, kolombinjo, venu al mi, mia kara lunlumeto!
La virino alĵetis la restintan glumaĵon al la kortobirdoj kaj returniĝis.
– Kion vi deziras?
– La lignobotelon, perleto mia – petis Tulipo –, mi bezonas la lignobotelon.
– Tondrojn kun fulmojn al via moŝto! Ĝis nun nur posttagmeze vi glutaciis ĝis mensoperdo, nun vi jam komencas ĉe mateniĝo?
– Ej nu, mia ŝafideto, Istanbula sukereto – diris Tulipo frapetante la vangojn de la virino –, la sinjorido volas ĝin.
– Estas nevere. La sinjorido ne trinkas vinon.
– Mi ne trinkas – intermetis Gregorio –, sed ni devas foriri kaj ni forestos eble eĉ ĝis vespero, do mi ne volas, ke Tulipo soifu.
– Ĉu vi foriros? Kien vi iros, sinjorida moŝto?
– Ni rigardos la turkan armeon, onklino Julinjo. Hodiaŭ ili trapasos Mecsek.
La virino konsterniĝis.
– Ĉu la turkan armeon? Karega sinjorideto, ne iru tien!
– Jes ja, ni iros. Mi devas vidi ĝin.
– Ho ve, karega sinjorideto mia, en kian danĝeregon vi intencas kuri! Kiel vi povas pensi!
– Ĉu longa, ĉu mallonga parolo – sama valoro – ekardis Gregorio senpacience –, ni devas iri!
Kaj ĉar li eĉ stamfis, la virino enkuris la domon. Sed baldaŭ ŝi revenis.

Ŝia vizaĝo estis spitema.

– Mi ne kontraŭas, iru la sinjorido, kien li volas. Mi ne rajtas ordoni al la sinjorido. Sed Tulipo ne kuniros. Al tiu ordonas mi.

– Neeble – respondis Tulipo.

– Via moŝto restos hejme, ĉu komprenite?!

– Tulipo devas veni kun mi – diris Gregorio mallonge.

– La viktualion povas porti ankaŭ la servisto de la sinjorido. Por kio ja uziĝas servisto, se ne por servi?

Servisto Johano mem tiel pensis. Ĉar li jam estis provizita por la vojo kaj trinkigis la ĉevalojn.

Tulipo, snufinte la maltrankvilon de la edzino, pufigis sin:

– Jes ja, mi iros, koreto mia. Mi blindiĝu, se mi ne kuniros! Vinon vi ja donas nur fojfoje, post longa preĝado. Vi ne estas bona edzino.

Je tio la virino ekplorete:

– Kunprenos vian moŝton la turkoj, se ili ekvidos vin. Ĉu vi havus koron forlasi ĉi tiujn du belajn infanojn kaj ankaŭ min?

– Nur se vi ne donos vinon. Kaj krome vi eĉ batis min la pasintan vendredon.

– Mi donos, mia karega, bona edzo, kiom vi volas, nur ne forlasu min!...

– Do bone, ne forgesu, kion vi ĵurpromesis antaŭ la sinjorido. Mi akompanos la sinjoridon kaj por vespero revenos. Ĉu vi kredas do – li flatis brakumante al si la virinon –, ke la sultano havas tiel grandan diamanton, por kiu mi fordonus vin? Nur lasu min iom trinketi. Vidu, se vi lasas min pace trinki, mi ne ebriiĝas. Kaj mi ebriiĝas ĉiam pro tio, ke mi pensas, morgaŭ vi ne plu donos al mi vinon.

La edzino iel-tiel trankviliĝis. Pretigis la nutropakaĵon. Tamen plorante akompanis sian parulon ĝis la pordo kaj tiel zorgoplene postrigardis ilin, ke Tulipo pufiĝis pro fiera ĝojo.

Johano kuniris ĝis la arbardenso. Tie ili deĉevaliĝis. Li rekondukis la tri ĉevalojn en la vilaĝon kaj ili piede pluiris ĝis la roko.

Ĝi ankaŭ nuntempe pendas super la landvojo. Ĉirkaŭ kvin homojn alta ĝi estas, kaj de ties supro videblas la tuta vojo malsupren ĝis la sovaĝpirujo, kie la pastro jam estis sin kaŝinta.

La turko derompis folirican branĉon de sur arbo kaj ĉirkaŭzonis la rokon per frondoj, por ke ili ambaŭ povu ĉion vidi de tie tiel, ke de sube neniu povu konjekti, ke tie homoj kaŝiĝas.

– Ankaŭ tien ni metu branĉojn – diris Gregorio –, nordoflanke.

– Por kio?

– Kiam la sultano estos preteririnta, ni returnos nin kaj postrigardos lin.
La suno jam leviĝis. La arbaro kovriĝis per roso. Malproksime la unuaj rajdistoj suprenkirlis la vojpolvon.

4

Aperis unu paprikruĝa standardo sur la vojo, poste du, sekvataj de kvin kaj ĉiam pli. Sub kaj post la standardoj pasis alt-turbanaj soldatoj sur arabaj ĉevaloj. La ĉevaloj estis tiel etaj, ke la piedoj de iuj soldatoj preskaŭ tuŝis la teron.

– Tiuj estas *gureboj*¹⁸ – klarigas Tulipo –, ili ĉiam antaŭiras. Ne estas veraj turkoj.

– Do kio?

– Araboj, persoj, egiptoj, ĉiaspeca miksaĵo.

Tio bone videblis. Ankaŭ iliaj vestoj ne estis samformaj. Sur la kasko de unu brilis grandega kupra plumingo, kaj mankis al li la nazo. Tiu jam batalis en Hungario.

La alia regimento postsekvanta flirtigis blankan standardon kun verdaj strioj. Sunbruna ularo en bluj pufpantalonoj. Videblis sur iliaj vizaĝoj, ke nokte ili abunde trinkis-manĝis.

– Ĉi tiuj estas *ulufeĝioj* – klarigas Tulipo. – Solduloj, tendaraj ĝendarmoj. Ili ankaŭ akompanas la militan kason. Ĉu vi vidas tiun pufventran homon kun disbatita frunto? Kun grandaj kuprobutonoj sur la brusto...

– Mi vidas.

– Lia nomo estas Turma. Hungare gru. Sed mi nomus lin prefere Porko.

– Kial?

– Mi vidis lin foje manĝi apron.

Regimento kun flava standardo tumultis post ili. Iliaj armiloj estas pli brilaj. La ĉevalo de iu agao fieris per arĝentbutona brustornamo.

– Ĉi tiuj estas la *silidaroj* – komentis Tulipo. – Ho, vi pendumindaj bandidoj! Du jarojn mi servis inter vi!

– Ĉu ankaŭ ĉi tiuj estas solduloj?

– Jes, solduloj.

Nun sekvis ruĝaj flagoj, spahioj kun pafarkoj, saguoj, la oficiroj kiras-itaj; sur ĉies flanko larĝa, kurba glavono. Poste pintĉapaj tataroj. Nuraj gras-ŝmiritaj uloj en ledaj dolmanoj, sur lignaj seloj.

¹⁸ Soldatoj apartenantaj al iu grupo de la kortega rajdsoldularo.

– Mil... du mil... kvin mil... dek mil – kalkulas Gregorio.

– Ne penu nombri ilin – manreziĝnas Tulipo –, probable ili estas eble eĉ dudek mil.

– Brr, malbela, ost-vangaĉa popolo.

– Ankaŭ la turkoj malŝatas ilin. Ili manĝas ĉevalkapojn.

– Ĉu ĉevalkapojn?

– Eble ne ĉiuj ricevas, sed unu certe oni metas sur la tablomezon.

– Ĉu kuiritan aŭ frititan?

– Se ĝi ja estus fritita aŭ kuirita, eĉ vorton ne kontraŭ, sed kruda. Ĉi tiuj hundoj eĉ ĵusnaskitajn infanojn ne indulgas. Ja vere, ili elŝiras la galon de homoj.

– Ne babilu tiajn teruraĵojn!

– Se estas tiel. Ĉar vidu, ili kredas, ke se ili ŝmiras la dentokarnon de siaj ĉevaloj per homa galo, ili regajnas la forton, kiom ajn ili laciĝis.

Gregorio naŭzita retiris sian kapon el inter la frondoj.

– Mi ne rigardos ilin – li diris –, ili ja ne estas homoj, plie sovaĝbestoj.

Sed Tulipo plu observadas.

– Jam venas la *nisangî bejo* – li ekparolas post kvaronhoro. – Al li taskas desegni la nomon de la *padiŝaho*¹⁹ sur sigelitaj dokumentoj.

Gregorio rigardas malsupren. Li vidas ezok-kapan, dignoplenan turkon kun longaj liparoj; sidante sur malalta ĉevalo kun fiera teniĝo li pasas inter la soldatoj.

Lin postsekvas la *defterdaro*, blankhara, kurbdorsa arabo, financministro de la turkoj. Poste, en alia trupo la *kaziaskero* en longa, flava kaftano kaj alta, blanka kalpako. Li estas la milita ĉefjuĝisto. Lin postiras *ĉaznerigoj*, t.e. la tabloŝerestro kun siaj subalternaj tabloŝervistoj kaj la taĉmento de la kortega gvardio. Sur ili brilas multaj oraĵoj.

Kaj jen eksonas turkaj muzikbandoj. Inter ŝirsonoj de klarionoj kaj klaksonoroj de *ĉinĉaoj*²⁰ aperadas kaj forpasadas buntaj taĉmentoj: kortegaj ĉasistoj sur ĉevaloj kun ruĝe kolorigitaj kolharoj; ili tenas falkojn surbrake.

Post la ĉasistoj trovas la imperiestra ĉevalaro. Dancantaj, fajraj rajdĉevaloj; seloj sur kelkaj. *Solako*²¹ kaj janiĉaroj kondukas ilin.

Sekve al la ĉevalistoj altaj, *bonĉokaj*²² standardoj eksvingiĝas super la

¹⁹ T.e. ŝaho de ŝahoj: sultano, reganto de la imperio.

²⁰ Klakinstrumento.

²¹ 60-70-kapa gvardio apartenanta al la janiĉaroj kaj eskortanta kaj protektanta la sultanon ekster la serajlo.

²² Bonĉoko: 1) pomforma flagokapo, en kiun turkoj fiksas flage servantan ĉevalvoston; 2) ĉevalvosta franĝo servanta ornamaje.

vojo. Tricent *kapuĝioj*²³ proksimiĝas, ĉiu en unuforma, orbrodita, blanka kalpakoj. Hejme ili servas kiel domgardistoj de la sultano.

Tra la polvonuboj ekblankas longa vico de janiĉaroj sur la vojo. Iliaj blankaj kalpakoj faras buntan mikson kun la ruĝaj kapornamoj kaj bluaj drapvestoj de la oficiroj.

– Ĉu la sultano estas ankoraŭ malproksime? – demandas Gregorio.

– Probable sufiĉe malproksime – respondas Tulipo. – La janiĉaroj estas almenaŭ dek mil. Poste venos la *ĉaŭsoj*²⁴ kaj ĉiaspecaj kortegaj dignuloj.

– Do ni retiriĝu – proponas Gregorio – kaj engorĝigu kelkajn glutojn.

La roko kaŝas ilin de sude antaŭ la militistaro. En norda direkto ili povas senĝene observi, kiel ondiĝas malsupren la armea maro al la valo.

– Ni povus eĉ dormeti – aldonas Tulipo.

Kaj li malfermas sian nutrosakon.

En ĝi ektintas ĉeno.

– Kio estas tio? – miras Gregorio.

– Bona kamarado mia – respondas Tulipo. – Sen ĝi mi neniam eliras el la vilaĝo.

Kaj ĉar la studento senkomprene gapas al li, li daŭrigas:

– Tio estas mia kateno. Kiam mi devas eliri el la vilaĝo, mi metas ĝin sur la piedojn. Vidu, tiel mi ne timas turkojn. Ĉar anstataŭ kapti, ili liberigos min. Kaj nokte mi mem liberigas min el ĝi. Sed jam estas tempo surmeti ĝin. Jen ĝia ŝlosilo. Metu ĝin en vian poŝon! Se trafus nin malfeliĉo, ni diros, ke ni estas el la kortego de Valentino Török. Mi malliberulo, vi studento. S-ro Valentino estas turko-inklina, do oni ne tenos nin rigore. Poste nokte mi liberigos vin kaj ni forkuros hejmen.

– Hm, vi estas sagaca homo! – agnoskas la studento kun sincera rekono.

– Jes, prave! – respondas Tulipo. – Mi supersaĝas eĉ la menson de mia edzino.

Kaj li konsideras laŭcele aldoni:

– Kiam mi estas sobra.

Freŝbakita, bruna panbulo, ŝinko kaj lardo aperas el la sakofundo, plus kelkaj kapsikoj. La studento dentatakas la ŝinkon, Tulipo prenas la lardon sub tranĉilon kaj abunde priŝutas ĝin per salo, pipro.

– Se la armeo vidus tion! – diras Tulipo kapsignante flanken.

– Ĉu? Kial?

– La turkoj fojfoje trinkas vinon – respondas Tulipo –, sed malŝategas

²³ Pordostarantoj de la sultana palaco.

²⁴ Kuriero, sendito, ĉefoficiro.

lardon kiel ni, hungaroj ratviandon.

Gregorio ridas.

– Ho, se ili sciuz – daŭrigas Tulipo –, kiel ĉiela manaŭ estas paprikita lardo! Sed, mi kredas, Mahometo neniam gustumis paprikitan lardon.

– Sekve preferindas esti hungaro ol turko.

– Ĉiu stultas, kiu ne estas hungaro!

Li disglatigas siajn nigrajn, silkecajn lipharojn kaj trinkas longe el la lignobotelo. Poste li etendas ĝin al la studento.

– Mi ne bezonas ĝin – respondas la studento. – Eble pli malfrue.

Li enpoŝigas la manon kaj elprenas saketon.

– Ĉu vi konas ĉi tiun ringon, Tulipo?

– Ne – respondas tiu –, sed mi vidas, ke ĝi valoras ĉevalon. Kio estas tio eta? Ĉu diamanto?

– Jes.

– Tiam utilas rigardi ĝin. Plurfoje mi aŭdis, ke rigardi diamanton purigas la okulojn.

– Ĉu vi scipovas legi la skribaĵon?

– Kompreneble. Janiĉaro mi estis. Mi trastudis la janiĉarlernejon.

Kaj li legas:

– *Ila maŝallah la hakk va la kuvvat il a billah el alijel azim.* Hungare: Dio volas: ne ekzistas vero kaj forto krom la majesta kaj glora Dio.

Li kapjesas.

– Prave. Se Dio ne volus, mi ne iĝus hungaro.

Dum minuto ili enpenŝiĝe silentas. Tulipo rompas la silenton:

– Baldaŭ vi vidos la sultanon, ho, kiel brava homo li estas! Lia popolo estas puca, sed li vestas sin pompe, nur kiam festo estas, aŭ kiam li akceptas gastojn. Post la sultano sekvas orbrila arbaro el standardoj, ĉefe *bonĉokaj*. Plue cent klarionistoj. Ĉies klariono estas pendigita per ora ĉeno sur la ŝultro. La klarionistojn paŝsekvas cent tamburegistroj, ducent klakistoj, cent *ĉinĉaistoj* kaj fajfilistoj.

– Bonajn orelojn devas havi la sultano, se li aŭskultas tuttage ĉi tiun kakofonion.

– Nu jes, infera tondrobruo. Ĝi silentiĝas, nur kiam ili ripozas. Sed turkoj bezonas ĝin, precipe en bataloj. Se ne estas muziko, ili ne batalas.

– Kaj ĉu estas vere, ke la janiĉaroj edukiĝas el kristanaj knaboj?

– Eĉ ne la duono. Tamen estas certe, ke el forrabitaj knaboj fariĝas la plej bonaj janiĉaroj. Tiuj havas nek patron nek patrinon. Ili opinias gloro fali en batalo.

– Kio sekvas post la bando?

– Armeo da buntaĉa popolo. Ŝnurdancistoj, iluziistoj, ĉarlatanoj, komer-

cistoj, kiuj avide ĉasas militakiraĵojn kaj vendas bagatelaĵojn. Ankaŭ da akvoportistoj vi vidos multe. Almenaŭ kvincent kameloj venas postarmee. Felsakojn ili portas. Sed la akvo estas plej ofte varmeta.

– Kaj poste, ĉu neniu sekvas?

– Cent karavanoj da ĉifonaj ciganoj kaj hundoj. Ili vivas el forĵetaĵoj. Sed ili videblos nur morgaŭ aŭ postmorgaŭ.

– Kaj poste.

Tulipo levis la ŝultrojn.

– Grifoj.

– Ĉu ŝafgrifoj?

– Ĉiaspecaj kaj agloj, korvoj, frugilegoj. Ĉiujn armeojn akompanas ankaŭ supertere po unu nigra armeo. Kelkfoje pli multnombra ol la homa.

La tagmeza suno varme brilas. La studento demetas sian kamizolon. Denove ili ekkubutas sur la rokorando kaj observas la sube preterpasantajjn blank-kalpakajn janiĉarojn.

Tulipo nomas multajn el ili.

– Tiu bruna vizitis kun mi la lernejon. Sur lia brusto estas pikvundo: tiel granda kavo, ke eĉ infanpugno eniĝus. Tiu ŝvitanta, kiu por momento demetis la turbanon, mortigis almenaŭ cent homojn en la Persiaj militoj. Sur li ne troviĝas eĉ unu tranĉvundo, krom se deposte li vundiĝis. Tiu magra uleto estas mirinda ponardĵetisto. De dudek kvin paŝoj li kapablas ĵetpuŝi ponardon en la bruston de sia malamiko. Li nomiĝas Tjapken. Da tiaj estas cetere ne malmultaj. En la janiĉarlernejo troviĝas herbokovrita teramaso. Tie oni lernas ĵeti ponardon. Ekzistas iuj, kiuj dum unu tago eĉ du-milfoje ĵetas ponardojn ekzerce.

– Kaj tiu maŭro?

– Vidu miraklon! Ĉu vi ankoraŭ vivas, maljuna Keŝkin! Jen diable lerta naĝanto! Li enbuŝigas la glavon kaj tranaĝas la riveron, ajne larĝa ĝi estas.

– Ba, tion kapablas ankaŭ hungaroj.

– Povas esti. Sed ĉi tiu ne laciĝas. Ĉi tiu suprenportas monon eĉ el la plej profunda akvo. La sultano foje amuziĝis pri li sur la bordo de Danubo. Li ĵetis ormonerojn en la akvon kaj multaj saltis por ili, sed ĉi tiu suprenportis la plej multajn. Kaj jen la maljunega Kalen! Tiu kornonaza, longmembra ulo! Ĉu vi vidas tiun larĝan, brunan hakoglavon sur lia flanko? Kvindekfunta! En la batalo ĉe Beogrado li tiel terure hakis iun hungaron, ke ne nur ties kapon sed ankaŭ tiun de lia ĉevalo li fortranĉis. Kvankam ambaŭ estis fere vestitaj.

– Kaj kompreneble tiu hungaro tuj deĉevaliĝis por repreni sian kapon.

– Fakte mi ne vidis, nur aŭdis tion – senkulpigas sin Tulipo.

Kaj subite li retrocedas pro surprizo.

– Ĉu mi sonĝas? – li elbuŝigas terurite. – Jumurĝak!

Efektive, la streĉ-miena, unuokula araba janiĉaro rajdas vid-al-vide al ili sur malalta, fort-brusta beja ĉevalo. Lia vesto estas pli brila ol de la ceteraj. Sur lia alta, blanka kapvesto svingiĝas longega strutoplumo.

– Ha jes, prave! – krias Gregorio mirfrapite.

– Sed oni ja diris, ke la pastro pendumis lin!

– Mi same scias.

– Ĉu la pastro ne parolis pri tio?

– Ne.

– Ha, estas nekompreneble – gapmiras Tulipo.

Kaj li rigardas post la janiĉaroj.

La okuloj de la du mirantoj renkontiĝas, kvazaŭ unu atendus klarigon de la alia. Ili silentas.

Post iomaj kvin minutoj la studento ekparolas:

– Diru al mi sincere, Tulipo, ĉu vi ne deziras reiri inter ilin?

– Ne ja – respondis tiu decideme. – Eĉ se mi ne havus edzinon, infanojn. Sed mia edzino estas bona virino; kaj la du infanojn mi ne fordonus eĉ por ĉiuj trezoroj de Istanbulo²⁵. La pli malgranda estas bela knabeto. Kaj la pli granda estas tre saĝa, eĉ la ĉefmuftio ne havas pli da menso. Jen antaŭ nelonge li demandis min, kial ĉevaloj ne havas kornojn?

– Scias la kukolo – respondas ridante studento Gregorio.

Poste ili ĉesas babilo. La studento rigardas kun ĉiam pli ombra mieno la senfinan fluegon de janiĉaroj sur la monta vojo.

La aero jam fariĝas nura polvonubo. Armilkakado, hufobatoj plenigas la silenton, kiam iu muzikbando mergiĝas en la vala vojkurbo.

La studento subite levas la kapon.

– Tulipo. Ĉi tiuj multegaj homoj venas ne sen celo!

– Sen celo ili ja neniam iras.

– Ili volas okupi Buda!

– Povas esti – opinias Tulipo egalhumore.

La studento gapas al li kun senkorola vizaĝo.

– Kaj se la sultano hazarde mortus dumvoje?

– Li ne mortos.

– Sed se tamen...

Tulipo levas la ŝultrojn.

– Li ĉiam kunveturigas siajn filojn.

– Sekve li estas sepkapa drako.

– Kion vi diras?

²⁵ La turka nomo de Konstantinopolo.

Anstataŭ respondi la studento demandas:

– Kiel vi pensas, dum kiom da tempo ili alvenos sub Buda?

– Ne scieblas.

Tamen, kiel vi opinias?

– Se pluvos, ili ripozos du-tri tagojn; eble eĉ semajnon.

– Sed se ne pluvos.

– Ankaŭ pro la varmego ili ripozos.

La studento maltrankvile agitiĝas sur sia loko.

– Tiam mi povus antaŭi ilin – li murmuras –, se mi vidas, ke ili ne re-
turniĝos.

– Kion vi bonvolas diri?

– Se ĉi tiuj marŝos al Buda, mi devos revenigi Cecey’ojn aŭ devus resti
apud ili.

La akraj tonoj eligataj de la bando subpremas ilian voĉon. La longa mar-
ŝkolono de janiĉaroj finfine ĉesas kaj elaperas pompa taĉmento kun struto-
plumoj kaj flava standardo. Unu dignaspekta, blankhara giganto elstariĝas
el la taĉmento. Antaŭ li oni portas du longajn, ruĝajn *bonĉokajn* flagojn,
kies stangoj brilas pro oro.

– Jen la sultano! – ekkrias frapite la studento.

– Tute ne – respondas Tulipo. – Li estas nur la janiĉaragao. La multaj
puncaj sinjoroj ĉirkaŭ li estas ĉiuj *jajabaŝioj*.

– Kiaj infernaskitoj estas tiuj *jajabaŝioj*?

– Janiĉaroficiroj.

Inter orkoloraj halebardoj sekvas brila grupo.

Du kvietmienaj junuloj rajdas inter ili. Ambaŭ sur grizaj ĉevaloj.

– La filoj de la sultano – klarigas Tulipo kun respekta voĉo –, Maho-
meto kaj Selimo.

Sed baldaŭ li levas la ŝultrojn.

– Diablo prenu ilin!

La sultanidoj estas du brunaj junuloj. Ili ne similas unu la alian, sed
videblas, ke ili amas sin reciproke.

– Jen tie marŝas *jaja* Oglu Mahometo!

– Ĉu tiu fama paŝao?

– Jes.

Digne rigardanta, grizbarba paŝao anseriras post la sultanidoj. Antaŭ li
oni portas sep *bonĉokajn* flagojn. Sur lia kapo tronas grandega turbano.

– Li estas – rimarkigas Tulipo – la patro de Jumurĝak.

– Neeble!

– Jes ja, vere. Antaŭ nelonge preteriris ankaŭ lia alia filo. Bejo²⁶ Arslano.

– Kia nomo do estas ĉi tiu Jumurĝak?

– Moknomo – respondas Tulipo.

Kaj li plukas herbon. Rongĝadas ĝin pro enuo.

Aperas taĉmento kun arĝentaj kaj oraj madzoj en timige altaj turbanoj. La studenton kaptas tutkorpa tremo. Li sentas, ke nun sekvos la sultano.

– Ĉiopova Dio de la hungaroj – li preĝvokas –, estu kun ni!

Multaj oraj kaj arĝentaj armiloj, brilantaj kaftanoj ond-miksiĝas al la vido. Li kovras ambaŭmane la okulojn ripozigante ilin, por poste pli bone vidi.

Tulipo fingropuŝas lian flankon.

– Nu, rigardu! – li ekparolas kun tremanta voĉo. – Tie li venas...

– Kiu?

– Antaŭ kiu turniĝadas derviŝo.

Solece pasas rajdanto en simpla kaftano. Antaŭ li turniĝadas derviŝo kun maŝinece egala ritmo. Sur lia kapo unu kaj duon-ulnon alta, kamlota kalpako. Ambaŭ liaj manoj disetenditaj. Unu manplato al la ĉielo, la alia al la tero. Lia froko disŝvebas sonorilforme pro la turniĝado.

– Turniĝanta derviŝo – klarigas Tulipo.

– Estas mirinde, ke li ne kapturiniĝas, li mem aŭ la ĉevalo!

– Ili ambaŭ al kutimiĝis.

La ĉevalo vere senĝene paŝadas. Aliaj ses derviŝoj pasas ambaŭflanke kaj atendas sian vicon ŝanĝi la turniĝantan.

– Tiuj sep derviŝoj senĉese turniĝadas antaŭ la sultano de Istanbulo ĝis Buda – krias Tulipo en la orelon de la studento.

Pro la bruo de klarionoj, fajfiloj, tamburoj, cimbaloj alie ili ne povus kompreni unu la alian.

La sultano sidas sur belega, araba ĉevaleto beja. Post li du duonnudaj maŭroj klopodas protekti la majestan sinjoron per du longaj pavoplumaj ombriroj kontraŭ la arĉaj sunradioj. La aero estas precipe sufoka en la valkurbo kaj lia moŝto enspiras la polvon tiel same kiel lia plej ĉifona soldato.

Kiam li venas sub la elstarantan rokon, videblas, ke li surhavas ruĝan satendolmanon kaj samspecan pufpantalanon. Lia turbano estas verda. La vizaĝo magra kaj kava. Sub lia longa, maldika, kvazaŭ pendanta nazo mallarĝa, blanka liphararo. Lian makzelon kovras stucita, krispa, blanka barbo. Liaj okuloj estas elstreĉiĝaj globoj.

Apenaŭ Gregorio volas lin pli atente priokuli, kiam abrupte pum!...

²⁶ Bejo: estro, komandanto, alta oficira rango.

aŭdiĝas terskua tondrego. La roko ektermas sub ili.

La ĉevaloj retrocedas. La sultano frapiĝas kontraŭ la kolon de la baŭmanta ĉevalo. La muziko interrompiĝas. Eksplodas freneza tumulto. Polvo kaj ŝtoneroj, korpopartoj, armiloj kaj sangogutoj pluvegas el la ĉielo. Konfuziĝo ekregas kaj vekriegoj aŭdiĝas dise tra la armeo en la tuta valo.

– Fino al ni! – ekkrias studento Gregorio kunfrapante la manojn.

Kaj li streĉas siajn terurplenajn okulojn al la valo.

Tie leviĝas malhela fumkolono al la nuboj. La aeron pezigas pulvodoro.

– Kio okazis? – demandas Tulipo terurita.

– Eraro – respondas la studento kun pendanta kapo –, la janiĉaragao ja ne identas kun la sultano!

15

Antaŭ la reĝa palaco li saltis de la ĉevalo kaj tenis ĝin je la brido.

Sur la muro de la palaco li ekvidis ĉaro-rade larĝan sunhorloĝon. La suno pasis ĝuste malantaŭ nuboj kaj la orita horvergo montris nur kun pala ombroĵeto la romian kvaron.

Gregorio esplorigardis la fenestrojn. Unu post alia li ekzamenis ĉiujn: la teretaĝajn, etaĝajn, poste la turfenestrojn.

Tra la enirejo de la palaco iradis, venadis soldatoj. Iu grizbarba, klin-dorsa, grandaĝa sinjoro estis enpaŝanta en akompano de du skribistoj tra la pordego. Li certe estis moŝtulo, ĉar ĉiu lin salutis, sed li al neniu reciprokis. Liaj skribistoj portis kun si rulitajn dokumentojn. Rande de ilia drapoĉapo estis enpikita anserplumo. De ilia zono pendis kupra inkujo. Laŭ tio, kiel la suno prilumis ilin, ilia ombro pasis digne laŭlonge de la muro.

Plue Gregorio ekvidis magra-kruran, blondan soldaton. Li vidis nur liajn krurojn, la du magrajn krurojn en ruĝaj botoj kaj ruĝa pantalono, sed je tio li rekonis, ke li apartenas al la gardistaro de Szigetvár. Lia nomo estis Valentino Nagy.

Li returnis sin kaj ekrapidis kun sia ĉevalo al placo Sankta Georgo. Li ne volis, ke iu el la homoj de Valentino Török ekvidu lin.

Sed pluirante li denove trafis konaton. Vigla-gestan hometon kun ronda barbo: li estis Emeriko Martonfalvai, skribisto, mastrumisto, leŭtenanto, mallonge: plurutila internulo de Valentino Török.

Gregorio transkuris aliflanken de sia ĉevalo por kaŝi la vizaĝon antaŭ tiu homo. Sed licenciulo Emeriko, ĉi tiu eterne esplotema, viglokula homo ekvidis lin.

– Ho, vidu homoj – li kriis –, amiketo Gregorio!

Ruĝiĝinte ĝisharare levis Gregorio la kapon.

– Kia vento alblovus vin? Ĉu vi venis al la sinjoro? Kaj kie vi prenis ĉi tiun ĉevalkapan bovon? Ĝi ja estas ne el nia grego!

Gregorio estus volonte sinkinta sub la pavimon kune kun la brava besto nomita bovo.

Sed baldaŭ li regajnis la kuraĝon.

– Mi venis al la sinjoro – li palpebrumis honteme. – Kie mi trovos lin?

– Mi ne scias, ĉu li jam revenis. Li akompanis la germanajn kaptitojn al la sultano. Hej, kiel brava homo estas nia sinjoro! Se vi vidus, kiel li falĉis la germanojn! Jen ekzemple antaŭ unu semajno li revenis tiel el la batalo, ke lia dekstra brako ruĝegis pro gutanta sango. La reĝino sidis ĝuste ĉe la fenestro. Kiam li preterrajdis ŝin, li suprenmontris al ŝi la brakon kune kun la glavo. Ĉu ne estas hejme bovopesto?

– Ne – respondis Gregorio.

– Kaj ĉu la malliberuloj purigis la malnovan puton?

– Purigis.

– Ĉu la rikoltantoj ne ŝtelas?

– Ne.

– Ĉu la sinjoridoj estas sanaj?

– Sanaj.

– Kaj nia sinjorino?

– Ankaŭ ŝi.

– Ĉu vi ne preterpasis Remeteudvar?

– Ne.

– Ĉu vi ne scias, ĉu la fojno estas kolektita?

– Ne.

– Kaj – daŭrigis la licenciulo ventumante sin per sia ĉapo –, kie nun vi enloĝiĝos? Ĉu vi havas tranoktejon?

– Ne.

– Do loĝu ĉe mi! Ĉu vi venis kun grava informo? Aŭ vi portas leteron al la sinjoro?

– Ne. Mi alvenis nur iel hazarde.

– Do atendu ĉi tie! Mi baldaŭ revenos el la palaco. Aŭ prefere venu kun mi ĉi tien, en la korton. Poste ni hejmeniros kaj vi transvestos vin. Aŭ ĉu vi ne havas veston? Ne gravas, vi ricevos. Poste vi povos paroli kun la sinjoro.

Li kondukis la studenton en la korton kaj lokis lin en ombro.

Gregorio postrigardis la babileman, viglan homon. Li vidis, kiel li suprenkuras sur la larĝa, ruĝa marmorŝtuparo. Lin ekposedis la penso, ke li prefere forkuros antaŭ la riproĉoj de s-ro Valentino.

Ho, sed oni ne povus forkuri de li! Per sia potenca rigardo li eĉ de mal-

proksime firme fiksas la homon. Li devas diri la veron. Li devas konfesi, ke... ho ve, tion neniel eblas konfesi!...

Li gratis la orelon. Li pensegis, preskaŭ ekbolis lia kapo kaj denove li alokuladis la fenestrojn.

Dum li tiel observadas, li rimarkas, ke tra malfermaĵo de la korto arboj de ĝardeno traverdas. Kio okazus, se li enŝteliĝus? Kaj de malproksime li rigardus sian etan Evan. Nur de malproksime, ĉar liaspeca, ordinara mortemulo ne rajtas alproksimiĝi al la reĝino.

Kie nun ili troviĝas? Certe en la transa, ombra parto; aŭ en la ĝardeno aŭ ĉe iu fenestro. Li rekonas Evan ankaŭ de malproksime. Rekonas ŝian delikatan, blankan vizaĝeton, dolĉe ridetantajn katokulojn. Li svingus al ŝi salute la ĉapon. Poste Eva cerbumadus, eble eĉ tutan semajnon, ĉu Gregorio pasis tie aŭ simila knabo, aŭ nur la animo de Gregorio hantis.

La korta muro estis garnita per grandaj, pezaj ferringoj. Ili servis por aligi la ĉevalojn de la vizitantoj.

Ankaŭ Gregorio alligis sian ĉevalon, poste senfareme promenante pasis inter la soldatoj. Ŝteliris en la strateton, el kiu balanciĝadis la arbokronoj.

Li supozis, ke tie estas la enirejo al la ĝardeno. Estas tro naive ja pensi, ke oni faras ĝuste en tiel mallarĝaj stratetoj enirejojn por grandaj ĝardenoj! Eĉ ombro de pordo ne vidiĝis tie. Unu flankon de la strateto konsistigis alta, fera krado, la alia estis konstruaĵo. Iam loĝis tiuflanke la scienculoj kaj artistoj de reĝo Matiaso, poste, en la tempo de reĝo Vladislavo, polaj pastroj kaj servistoj kaj fine servistinoj.

Sed Gregorio nenion sciis pri tio. Li rigardis nur la kradon. Ĝi estis verda kaj la suproj de la ferstangoj oritaj. La branĉoj kelkloke elkliniĝis tra la krado.

De tempo al tempo Gregorio enrigardis. Ie li vidis gruzan vojon kaj pavilonon kun verda emajla tegmento. Sur la ferstangoj ie kaj tie sidis feraj korvoj, sed el kelkaj restis nur la kruroj. Tra la branĉoj li ekvidis kelkajn rozkolorajn makulojn. Virinaj roboj! La koro de Gregorio bruis kiel fulejo.

Li foje-refoje jetis rigardon enen, irante ĉiam pli malsupren laŭlonge de la barilo.

Fine li ekvidis grupon de virinoj sub maljuna tilio.

Ili sidis ĉirkaŭ lulilo. Surhavis hele rozkolorajn vestojn. Nur unu el ili estis nigre vestita, virino kun oblonga vizaĝo kaj delikataj manoj. Ŝia vizaĝo estis pala kaj malgaja. Ŝi ekridetis, nur kiam ŝi klinis sin kaj rigardis en la lulilon, sed ŝia rideto estis same malgaja.

Gregorio ne povis rigardi en la lulilon. La dorso de blankvesta, dika virino kovris ĝin. La dikulino svingadis tiliajn branĉetojn super la lulilo.

Gregorio serĉis ie kaj tie lokon en la krado por pli bone vidatingi. Li jam

konstatis, ke kvar virinoj ĉirkaŭstaras la lulilon kaj la kvina klinadas sin apud kalikforma marmora vazego.

Laŭlonge de la krado li kuris pli proksimen al tiu. Vere, ŝi estis lia eta Eva. Sed kiel ŝi altkreskis! Ŝi kolektis kaŝtanojn de la tero en korbon.

– Enjo! Feinjo! – li vokis ŝin mallaŭte tra la krado.

La knabino estis eble dudek paŝojn for. Ŝi zumkantis ian kanzonon. Pro tio li ne aŭdis lian voĉon.

– Enjo! Feinjo! – vokis ree Gregorio.

La knabino levis la kapon. Kun serioza miro ŝi rigardis al la krado.

– Feinjo! – ripetis Gregorio preskaŭ rideksplode. – Feinjo, Enjo, venu do al mi!

La knabino ne povis vidi Gregorion pro tamarikbranĉoj, sed rekonis lian voĉon.

Ŝi venis kiel kapreolino. Jen haltante, jen ekimpetante, pro la miro eĉ ne palpebrumante per siaj grandaj, mirantaj okuloj.

– Estas mi, Enjo – reparolis Gregorio.

Tiam la knabino alflugis.

– Greĉjo – ŝi elsuspiris kunfrapante la manojn. – Kiel vi venas ĉi tien?

Ĝojradiado inundis ŝin. Ŝi metis la vizaĝon al aperturo de la krado, por ke Gregorio kisu ĝin. Gregorio sentis dume ian agrablan odoron similan al tiu de Aprile florantaj Ioniceroj.

Poste ili ambaŭ prenis la kradon apud la manoj de la alia. Ĝi estis malvarma. Iliaj manoj varmaj. La vizaĝoj ruĝiĝis.

La knabo mallonge rakontis la historion de sia alveno kaj dume ekzamenis la vizaĝon, manojn kaj veston de la knabino.

Kiel ŝi altkreskis, kiel ŝi beliĝis! Nur ŝiaj okuloj, ĉi tiuj malfermaj, naviĝaj, belaj katokuloj restis senŝanĝaj.

Aliulo eble ne vidus la knabinon bela. Ŝi ja estis en la aĝo, en kiu nur la brakoj kaj kruroj evoluas kaj la vizaĝo estas iel nematura, la brusto ankoraŭ knabeca kaj la haroj mallongaj; sed por Gregorio ŝi estis belega. Plaĉis al li la grandaj manoj de la knabino, li sentis ilin blankaj kaj velurecaj, kaj ĉar ŝiajn piedojn belformis modaj ŝuoj, ankaŭ tien li ĵetis plezurplenan rigardon.

– Mi portis al vi ringon – diris Gregorio.

Kaj li elprenis el sia poŝo la grandan turkan ringon.

– Mia bona majstro postlasis ĝin al mi. Kaj mi donacos ĝin al vi, Enjo.

Ŝi prenis la ringon kaj kun plaĉo rigardis la topazan duonlunon kun diamantaj steloj sur ĝi. Ŝi traŝovis la fingron kaj ridetis.

– Kiel granda ringo! Ho, kiel bela!

Kaj ĉar por unu fingro ĝi tro larĝis, ŝi enŝovis du.

– Ĝi taŭgos, se mi plenkreskos – ŝi diris. – Dume ĝi restu ĉe vi.

- Kun naiva sincero ŝi ankoraŭ aldonis:
- Vi scias, se mi iĝos via edzino.
- La vizaĝo de Gregorio nubigis, liaj okuloj humidigis.
- Vi ne iĝos mia edzino, Enjo.
 - Ĉu ne? – demandis frapite la knabino.
 - Vi jam vivas nur inter reĝoj kaj princoj. Oni ne donos vin al tiel neniula homo kiel mi.
 - Ho, tamen jes! – respondis la knabino. – Ĉu vi kredas, ke mi tro alte taksas ilin? La reĝino foje diris, ke mi amu la malgrandan reĝon, kaj se mi plenkreskos, li akiros por mi tian kaj tian fianĉon. Mi jam havas unu, mi respondis al ŝi. Mi diris al ŝi vian nomon, kaj ke Valentino Török estas via edukpatro.
 - Ĉu vi diris? Kaj kiel ŝi reagis?
 - Tiom ŝi ridis, ke ŝi preskaŭ falis de la seĝo.
 - Ĉu ankaŭ ŝi estas en la ĝardeno?
 - Jes. Tiu nigraroba.
 - Ĉu tiu?
 - Tiu ja. Bela, ĉu?
 - Bela, sed mi imagis ŝin pli bela.
 - Ĉu pli bela? Ĉu ne sufiĉe bela?
 - Mi vidas nenian kronon sur ŝia kapo.
 - Se vi volas, vi povas paroli kun ŝi. Tre bona virino. Hungare ŝi ne parolas.
 - Do kiel?
 - Pole, germane, latine, itale, france, do en ĉiaspecaj lingvoj, nur ne hungare. Vian nomon ŝi elparolas ekzemple kiel *Kreĉjo*.
 - Mi ne volas paroli kun ŝi – diris Gregorio maleme. – Kvankam kelkajn vortojn ankaŭ mi scias germane. Diru prefere, Enjo, kiel mi povos paroli kun vi, se ankaŭ alifoje mi venos al Buda?
 - Kiel, kiel? Mi diros kompreneble al la reĝino, ke oni enlasu vin.
 - Kaj ĉu ŝi ordonos enlasi min?
 - Kiel ne? Ŝi amas min tiom, ke ŝi ĉion permesas. Ŝi donas al mi eĉ el sia odorakvo. Flaru la manikon de mia vesto! Bonodora, ĉu? La reĝinoj estas ĉiuj tiel bonodoraj! Krome ŝi montris al mi ankaŭ sian preĝlibreton. Ho, kiel belaj bildoj estas en ĝi! Enestas Maria inter rozoj en blua silkorobo. Se vi povus ĝin vidi!
 - El sub la tilio aŭdiĝis ŝirploro, kvazaŭ iu estus paŝinta sur katvoston.
 - Eva ektemis.
 - Ho ve! La reĝeto vekigis. Atendu ĉi tie, Greĉjo!
 - Enjo, mi ne povas atendi vin, morgaŭ mi revenos.

– Bone – respondis la knabino. – Ĉiutage estu ĉi tie en ĉi tiu horo!
Kaj ŝi forkuris al la eta reĝo.

16

Nenio tiel okazas, kiel ni antaŭvidas.

[...]

La luno ree elnubiĝis kaj prilumis la vojon al Buda.

La lance armitaj turkoj ĉe la pordego eĉ ne ĵetis rigardon al Gregorio. Tiam oni ankoraŭ povis libere pasi enen kaj elen. Kiu scias, ĉu morgaŭ oni ne elŝlosos la hungarojn definitive el la kastelo?

La hufoj de la ĉevalo brue klakis sur la ŝtonvojo. Gregorio vidis lanchavajn janiĉarojn ankaŭ ĉe la domoj. Unu janiĉaro antaŭ ĉiu domo. Sur ĉiu turo flirtis ĉevalvosta, duonluna flago. Nur sur la preĝejo de Nia Sinjorino staris ankoraŭ la ora kruco.

Gregorio direktis sin al placo Sankta Georgo. Je lia granda miro neniun li vidis tie.

Li ĉirkaŭrajdis la fontanbasenon, la kanonojn. Neniu, neniu viva. Nur unusola lanchava turko, supozeble gardanto de la kanonoj.

Gregorio elseliĝis kaj ligis la ĉevalon al rado de kanonĉaro.

– Kion vi faras ĉi tie – kriis al li la turko.

– Mi atendas – respondis turke Gregorio. – Ĉu vi eble timas, ke mi ŝtelos la kanonojn?

– Nu, nu – respondis la *topĉio* pli amikeme. – Do vi estas turko?

– Mi ne.

– Do iru hejmen!

– Sed hodiaŭ mi havas ĉi tie aferon de honoro. Bonvolu esti pacienca!

Tiam la turko direktis sian lancon al la knabo.

– Forportu vin de ĉi tie!

Gregorio malligis sian ĉevalon kaj enseliĝis.

El la direkto de la Fejérvár'a Pordego iu kure kaj perpiede proksimiĝis. Gregorio rekonis Fŭrjes, kies blondeco preskaŭ lumis en la nokto.

Gregorio paŝigis renkonte sian ĉevalon.

– Mekksey troviĝas en la domo de s-ro Valentino – ekparolis Fŭrjes senspire. – Venu, ĉar surstrate la janiĉaroj ne permesas paroli.

Gregorio saltis de sia ĉevalo kaj perpiede pluiris kun Fŭrjes.

– Kiel okazis ĉi tiu kanajlaĵo? – demandis Gregorio.

Fŭrjes levis la ŝultrojn.

– Estis plej ruze elpensita. Dum ni troviĝis kun la eta reĝo malsupre en la tendaro, la janiĉaroj unu post alia enpromenis tra la pordego, kvazaŭ ili volus rigardi la konstruaĵojn. Ili nur vagadis, gapadis. Sed ĉiam pli multaj. Kiam ĉiuj stratoj jam pleniĝis de ili, je kornosignalo ili eltiris siajn glavojn kaj pelis ĉiujn en la domojn.

– Friponoj!

– Estas facile okupi tiel kastelon.

– Mia sinjoro ja antaŭdiris...

La fenestroj de la palaco estis malfermitaj. En iu etaĝa fenestro vidiĝis du kapoj.

Antaŭ la pordego ĵus interŝanĝis sin postenantoj kaj la eniron baris grandstatura janiĉaro.

– Kion vi volas? – li demandis krude.

– Ni loĝas ĉi tie – respondis seke Gregorio.

– Nun mi ricevis la ordonon – diris la turko –, ke iu ajn eksteren, neniu internen!

– Mi apartenas al la domanaro de Valentino Török – reagis Gregorio ekscitite.

– Iru hejmen, knabo – diris la turko malestime –, al Szigetvár!

– Enlasu min! – kriis Gregorio kolere. Kaj ekfrapis sian sabron.

La turko eltiris sian glavon.

– Ĉu vi forportos vin?!

Gregorio ellasis la bridon de sia ĉevalo kaj same malingis sian sabron. Eble li esperis, ke li ne estas sola.

La giganta turko faris paŝon antaŭen kaj fulmigis sian glavon. Li svingis ĝin al la kapo de Gregorio.

Tiu haltigis la bategon, lia sabro ekfajreris en la malhelo. Sammomente li eksaltis antaŭen kiel kato kaj tranĉis. En lian vangon.

– Alaho! – ekblekis la turko.

Li reŝanceliĝis kontraŭ la muron. Malantaŭ lia dorso krake faladis stukaĵeroj.

El la etaĝo aŭdiĝis krio:

– Mortpiku lin!

Gregorio pikis ĝistenile la sabron en la bruston de la turko.

Mire li rigardis la giganton kaj vidis, ke tiu lasas elfali la glavon kaj sake renversiĝas laŭlonge de la muro.

Gregorio ĉirkaŭrigardis. Li serĉis Fūrjes. Sed tiu jam kuris, impetis plej rapide en la direkto de la reĝa palaco.

Anstataŭ li tri alt-kalpakaj janiĉaroj proksimiĝis kure kun koleraj sakroj.

La knabo vidis, ke li ne havas tempon por perdi. Li saltis al la pordego

kaj ŝirmalfermis ĝin. Poste rapide riglis ĝin de interne.

Ekscitita pro la batalo, kun tremantaj kruroj li ankoraŭ faris kelkajn paŝojn kaj aŭdinte, ke iuj brupaŝe troas malsupren sur la lignoŝtuparo, li lasis sin fali sur benkon sub la pordega volbo kaj peze spiris.

Venis Zoltay. Kun glavo en la mano. Post li Mekksey. Ankaŭ li kun eltirita glavo.

Lanterno lumanta sub la pordega volbo prilumis iliajn konsternitajn vizaĝojn, kiam ili ekvidis lin.

– Ĉu vi jam estas ĉi tie? – kriis Zoltay. – Ĉu nenio malbona okazis al vi?

Gregorio kapneis.

– Ĉu vi mortpikis la turkon?

Li kapjesis.

– Venu al mia koro, vi malgranda heroo – kriis Zoltay entuziasme.

Kaj li verve brakumis al si la dek-kvinjaran knabon, kiu antaŭ nelonge faris la elprovon de braveco.

Oni brue frapegis la pordegon.

– Ni devas fuĝi – diris Mekksey. – Janiĉaroj kunariĝis. Sed antaŭe vian manon, knabo! Ne koleru min pro tio, ke mi ofendis vin!

Gregorio etendis sian manon. Li estis kvazaŭ narkotita. Li eĉ ne sciis, kio okazas al li. Senvorte li lasis sin kuntreni. Li rekonsciiĝis, nur kiam la du junuloj ligis ŝnuron el littukoj. Mekksey vokis lin malsupreniĝi unua tra la fenestro.

Gregorio rigardis suben.

Malsupre, en la lunluma profundo li vidis sub si la reĝan legomĝardonon.

[...]

Matene, kiam la suno komencis leviĝi, la agao elpaŝis tra la pordo kaj longe oscedante ellasis la restintan dormon el sia kapo.

– Banĝal – li alparolis la riverencantan serviston –, kie estas la du *delianoj*?

La servisto turnis sin kun serĉa rigardo al la korto.

Apud la pordo kaŭris la derviŝo. Je la vortoj de la agao li levis sin.

– Ili foriris, sinjoro.

– Foriris? – ekmuĝis la agao. – Ĉu ili foriris?

– For.

– Kiel ili aŭdacis foriri?

– Mi atendas vin ĝuste pro tio, sinjoro. Tiuj du *delianoj* ne iras honestan vojon.

– De kie vi scias tion?
– Nokte mi subaŭskultis ilin.
– Pri kio ili parolis?
– Pri ĉiaspecaj aĵoj. Sed ĉefe pri tio, ke ne estas konsilinde rilati al tia homo kiel vi.

La okuloj de la agao elorbitiĝis.

– Tiam oni devas forpreni de ili la ĉevalojn, kaptitojn, veturilon kaj ĉion.

Kaj laŭgrade, kiel li diris tion, lia voĉo plileviĝis ĉe ĉiu vorto. Ĉe la lasta li jam kriegis.

– Ili havas ankaŭ monon – daŭrigis la derviŝo. – Iu kaptito diris, ke li ne plu povas porti la oron.

– Ĉu oron? He, spahioj! Ĉiuj ĉevalen! Ek post la du *delianoj!* Alportu ilin ĉu vivaj, ĉu mortaj!

En la sekva minuto dudek du spahioj brugalopis tra la pordego de la karavangastejo.

La agao akompane rigardis ilin. Poste li turnis sin al la derviŝo:

– Pri kio alia ili parolis?

– Mi ne komprenis ĉion. Mallaŭte ili babilis. Estas certe, ke ili parolis hungare kaj iu el iliaj kaptitoj estas virino.

– Virino? Tiun mi ne vidis.

– Ili vestigis ŝin viro.

– Ĉu bela?

– Rava.

La okuloj de la agao vigle moviĝis.

– El la predo vi ricevos vian parton.

Kaj li ekiris internen.

– Sinjoro – postkriis lin la derviŝo –, mi estis janiĉaro. Ĉu vi ne permesus al mi surĉevaliĝi?

– Kial ne, ankaŭ mi mem iros – respondis la flamiĝinta agao. – Do seligu ankaŭ por mi!

Li zonis al si glavon kaj baldaŭ enseliĝis.

Sur la landvojo al Istanbulo ili atingis la dudek du armitajn servistojn. Ĉi tiuj ekvidis, ke ilia sinjoro postgalopas. Ili rerigardadis. La agao manordonis al ili plurajdi.

La vojpolvo blanke kirliĝis sub la hufumoj de la ĉevaloj.

Ne forpasis du horoj kaj la jubilanta ekhurlo de la taĉmento sciigis al la agao, ke liaj servistoj jam ekvidis la veturilon.

Ili jam rajdis sur monteta supro, la vojo tie ekdekliviĝis kaj ili malaperis for de la okuloj de l' agao.

Tiu senpacience atendis atingi la supron de la deklivo.

Li spronis sian ĉevalon kaj bolante pro antaŭĝuo de riĉa predo freneze galopis. Post li la derviŝo sidis kvazaŭ vila diablo sur sia ĉevalo. Li premis kaj frapegis la ĉevalon. Liaj haroj liberiĝis el la nodo, lia kapo fariĝis kvazaŭ granda, hirtigita balailo. Li ankoraŭ ne havis tempon alligi la glavon, haste ricevitan de la agao kaj batis per ĝi jen antaŭe, jen malantaŭe la ĉevalon.

Sur la altaĵdorso la agao vidas, ke la persekutatoj ankoraŭ sufiĉe fore antaŭas, sed jam ekflaris la danĝeron.

Kaj jen, ankaŭ la du kaptitoj saltas sur ĉevalojn, elkaptas armilojn el la postkrado de la veturilo. La koĉero haste elprenadas ion kaj tion el la ĉaro: disdonas ilin al la rajdantoj. Tiuj pakas ĉi tiujn sur siajn selarkojn. Poste la koĉero grimpas sub la veturilon. El sub ĝi leviĝas blanka fumo. En ĉi tiu momento ankaŭ li saltas sur ĉevalon kaj forgalopas post la kvar rajdantoj.

La agao gapas kaj miras.

– Kiaj kaptitoj ili estas – li krias malantaŭen al la derviŝo –, ke ili ne volas liberiĝi?

– Mi diris, ke hundoj! – rekrias la derviŝo.

La fajro jam ekposedas la veturilon. La soldatoj konfuzite ĉirkaŭstaras ĝin.

– Estingu ĝin! – krias la agao. – Disbatu la veturilon!

Kaj ree li krias:

– Nur tri restu! La ceteraj post la hundojn!

En ĉi tiu momento fulme ekflamas la ĉaro kaj kun tondrego disĵetas flamojn.

Restis samloke nek veturilo, nek homoj, nur la hirta derviŝo, kiu surdigita de la aerpuŝo kaj eksplodo staris alfiksite kiel sorĉa kato sur kamentubo.

– Kio estis tio? – ekmuĝis la agao en la polvo de la landvojo, kien la ĉevalo deĵetis lin.

La derviŝo volis elseliĝi, sed lia ĉevalo estis konfuzita. Ĝi dancis returnen kaj ekbaŭmis.

Poste kun freneza kurego elpafis sin al la kamparo. Ĵetadante alten la derviŝon, ĝi saltadis tra veproj kaj kavoj ŝprucigante blankan ŝaŭmon el sia buŝo.

La agao pene stariĝis. Elsputis la polvon kaj malpie blasfemante furiozis.

Li ĉirkaŭrigardis.

La landvojo estis kvazaŭ batalkampoj: tordiĝantaj ĉevaloj kaj falĉe sternitaj spahioj; loke de la veturilo faŭkis granda nenio; super la vojo larĝa,

juglandkolora nubo, kiu antaŭ ĵus estis veturilo.

La ĉevalo de la agao forkuris. La korvomiena sinjoro eĉ ne sciis, kien turni sin.

Fine li ekiris lamante al siaj soldatoj.

Ilin la eksplodo senindulge disĵetis. Jen tie kuŝis kapo, jen ĉi tie kruro en la polvo; kaj kiuj restis tutaj, same ne estis rigardindaj.

La agao vidis, ke neniu movas sin, li do sidiĝis sur la fosrando kaj senkomprene rigardis antaŭ sin. Li eble aŭskultis, kie kaj kial oni sonorigas tiel freneze. Kompreneble nenie oni sonorigis, nur la oreloj zumis al li.

En tia stato de surda urogalo trovis lin post duonhoro la derviŝo, kiu returniĝis sur sia gutŝvitanta ĉevalo.

Li ligis la tremetantan beston al vojranda fago kaj rapidis al la agao.

– Ĉu okazis al vi io malbona, sinjoro?

La agao skuis la kapon.

– Nenio.

– Sed io via tamen batiĝis!

– Mia postaĵo.

– Estu benata Alaho, kiu liberigis vin el ĉi tiu dangerego!

– Estu benata! – ripetis maŝinece la agao.

La derviŝo unu post alia priokulis la ĉevalojn kuŝantajn sur kaj apud la vojo: ĉu li ankoraŭ povus iujn surpiedigi. Estis vana espero. Kiuj vivis, estis tiom kripligitaj, ke nur korvoj trovus plaĉon pri ili.

Li revenis al la agao.

– Sinjoro – li proponis –, ĉu vi povus reveni proprapiede? Aŭ ĉu mi metu vin sur ĉi tiun ĉevalon?

La agao frotadis siajn krurojn, genuojn.

– Mi venĝos pro tio! Sed de kie mi prenu ĉevalojn kaj soldatojn?

Kaj senkomprene li rigardis la derviŝon.

– Tiuj damnitaj certe volas vojaĝi al Istanbulo. Tie ni povos ilin trovi – opiniis la derviŝo.

La agao pene stariĝis. Ĝemis. Palpadis sian postaĵon.

– Venu! Helpu min sur la ĉevalon kaj rekonduku min en la gastejon! Dungiĝu al mi kiel servisto. Vi estas bona rajdisto.

– Kiel servisto? – mire demandis la derviŝo.

Sed poste humile klinis la kapon.

– Kiel vi ordonas.

– Kiel oni nomas vin?

– Jumurĝak.

[...]

Gregorio estis pli trankvila. Li jam infanaĝe kutimiĝis vidi sangon. Tio ne tro doloras. Pli konsterne estas – li pensis –, ke ĉi tiuj homoj memvole verŝas sian sangon. Kaj kontraŭ tiaj homoj batalas la hungaroj jam pli ol cent jarojn seninterrompe!

Li rigardis tra la sangoplena amaso al la alia flanko de la strato.

Kiel kurioze: ni eksentas, se iu fikse rigardas nin!

Kaj li estis observata.

Ĉe la torĉolumo li vidis, ke la okuloj de du homoj el la svarmanta homamaso fiksiĝas al li.

Unu estis speco de armeno. La korve nigra agao, kies soldatojn li flugigis en la aeron!

La alia – Jumurĝak...

[...]

Valenteno rigardis tra la fenestro. Li vidis malsupre la verde ondiĝantan maron kaj trans ĝi Skutari, kvazaŭ li transrigardus el sia palaco en Buda al urbo Peŝto.

Eble kvin minutojn li staradis tie, kiam fine la mano de iu negro flankentiris la drapiraĵon de la pordo. En la sekva momento enpaŝis la sultano.

Eskorto nek antaŭ, nek post li, nur dek-sesjara, maldika negreto, kiu haltis apud la gvardiano ĉe la pordo.

La bejo ventrojĉetis sin sur la tapiŝo. Valenteno kunmetis siajn kalkanojn kaj klinis sin. Kiam li levis la kapon, la sultano staris apud la *mangalo* kaj etendis super ĝi ambaŭ siajn magrajn manojn. Li surhavis avelkoloran kaf-tanon garnitan per ermena pelto, tiel longan, ke nur la du ruĝaj babuŝnazoj elvidiĝis sube. Sur la kapo li havis malpezan linturbanon. Liaj vangoj estis razitaj. Liaj maldikaj, blankaj lipharoj pendis longe, ĝis sub la mentono. Unu minuton ili staris senvorte. Poste la sultano ĵetis rigardon al la bejo:

– Iru for!

Tiu levis sin kaj riverencante dorsiris ĝis la pordo. Tie li ree klinis sin kaj malaperis.

– Delonge mi ne vidis vin – komencis trankvile la sultano. – Neniom vi ŝanĝiĝis. Nur viaj haroj griziĝis.

Valenteno pensis en si: ankaŭ vi ne plijuniĝis, Solimano. Ĉar la sultano maldikiĝis, depost kiam ili intervidiĝis, liaj grandaj ŝafokuloj ĉirkaŭsulkigiĝis. Kaj kvazaŭ lia nazo estus plilongiĝinta. Liaj vangoj estis nenature ruĝigitaj.

Sed Valenteno diris nenion, nur atendis scivole, kun premegata koro, kio nun sekvos.

La sultano krucis la brakojn.

– Vi eble scias, ke Hungario ne plu ekzistas. – (S-ro Valentino paliĝas. La spiro haltas en li.) – Tiuj kelkaj ŝafejoj, kiuj ankoraŭ staras, nur portempe restos. En ĉi tiu jaro ankaŭ tiuj submetiĝos. – (S-ro Valentino profunde enspiras.) – Unuvorte, mi bezonas taŭĝan paŝaon en Buda. Paŝaon, kiu ne estas fremda al la hungaroj sed al mi same ne. Vi estas eminenta homo. Mi redonos al vi viajn bienojn. Ĉiujn.

Valentino fikse rigardas. Liaj lipoj moviĝetas. Sed li ankoraŭ nenion diras kaj la sultano daŭrigas:

– Ĉu vi komprenas, kion mi parolas? Vi ja komprenas la turkan.

– *Evet* – respondas Valentino. (Kio signifas: jes.)

– Vin mi farus paŝao de Buda.

La ŝultroj de Valentino ektemas por momento. Sed lia vizaĝo restas serioza kaj malgaja. Lia rigardo glitas de la sultano al la *mangalo*, tra kies arabeskoj traruĝas ardaĵo.

La sultano eksilentis por momento. Eble li atendis, ke Valentino ĵetos sin turkece al liaj piedoj aŭ kisis al li hungarece la manon, aŭ almenaŭ respondos ion. Sed Valentino nur restis staranta. Kaj kvazaŭ li starus tute ne antaŭ la sultano, ankaŭ li krucis la brakojn.

La sultano malsereniĝis. Li iris eble dufoje tien-reen tra la ĉambro. Poste li haltis kaj senpacience demandis:

– Ĉu vi eble ne akceptos tion?

Valentino rekonsciiĝis.

Ĉar kie forestis lia penso dum ĉi tiu minuto da paŭzo! Ĝi trafugis ĉiujn liajn kastelojn, bienojn, arbarojn, kamparojn, li brakumis sian edzinon, kisis siajn infanojn, sidis sur siaj ŝatataj rajdĉevaloj, spiris la aeron de la libereco.

Li rekonsciiĝis je la voĉo kvazaŭ vekiĝinto el sonĝo.

– Via imperiestra moŝto – li ekparolis kun profunda emocio –, se mi bone komprenas viajn vortojn, vi bonvolos meti min en la postenon de Werbóczy.

– Ne. Werbóczy mortis. Ankoraŭ en tiu jaro, kiam vi foriris. Lian oficon ni ne plu funkciigas. Mi volas investi vin kiel ordinaran paŝaon. Mi donos al vi la plej grandan gubernion kaj plej plenan liberecon.

S-ro Valentino nur gapis al la imperiestro kvazaŭ al ia miraklo.

– Sed kiel, via moŝto? – li fine ekparolis. – Ĉu kiel hungaran paŝaon!?

– Ne, kiel turkan paŝaon.

– Kiel turkan paŝaon!?

– Kiel turkan paŝaon. Mi diris: Hungario ne plu ekzistas, do ankaŭ hungaroj malestas.

– Ĉu mi fariĝu turko?

– Paŝao.

La kapo de Valentino Török klinvelkis. Li rigardis en la vizaĝon de la sultano kaj kun profunda, malgaja voĉo li ekparolis:

– Ĉu ne eblas alimaniere?

– Ne.

Valentino Török fermis la okulojn. Lia brusto blovis pro peza spirado.

– Via imperiestra moŝto – li pene ekparolis. – Mi scias, ke vi ne estas kutimiĝinta al sincera parolo. Sed mi maljuniĝis kun ĝi... Mi ne povas diri alion ol mi pensas.

– Kion do vi pensas? – elbuŝigis glacie la sultano.

S-ro Valentino paliĝis, sed respondis en trankvila, decida tono:

– Eĉ se la tuta regno estos via kaj ĉiuj hungaroj fariĝos turkoj, mi ne..., mi ne... mi neniel!

[...]

– Ni fuĝu! – diris Gregorio. – Mi vidis la agaon kaj Jumurĝakon. Ili havis kun si soldatojn.

Kaj rapide ili ekiris en la mallumo. Ili kuris. Antaŭe impetis la cigano, kvankam li eĉ ne sciis, pro kio li devas kuri. Li hazarde stumblis je dormanta hundaro. Iu hundo ekjelpis, la ceteraj timigite dissaltis.

[...]

Tiuj tenis glavojn en la manoj kaj ponardojn interdente. Regis silento. La remiloj laboris kun fortaj plaŭdoj.

La turkoj jam preskaŭ atingis ilin. Gregorio ĵetis la breton antaŭ ilian boaton. Apenaŭ la remanta turko eksentis ŝpruci akvon sur la nukon, li ĉesis remi kaj rigardis returne por vidi, kio plaŭdis.

La boato de si mem naĝis pli proksimen.

Kiam ili distancis apenaŭ dek kvin paŝojn, Gregorio tuŝigis la tindron al la pafpulvoro. La pulvo eksusuris kun ruĝa ardo.

Li atendis nur momenton. Per bone direktita movo li ĵetis ĝin en la turkan boaton.

Apenaŭ la fajra drako transflugis, la turkoj disklinis sin. En la sekva momento la boato transformiĝis kvazaŭ en fajran ŝprucfontanon kaj triklafta flamego suprenĵetiĝis kun tondra bruego inter la ensidantoj.

La boato renversiĝis.

La ses turkoj flugis en ses direktoj plaŭdante fine en la maro.

– Antaŭen! – ekkriis Gregorio.

Sed la okuloj blindiĝis pro la fulminta lumo.

Neniu vidis ion. Pasis kelka tempo, ĝis Gregorio ekvidis la unuan turkon, kiu kaptis la boatrandon kaj per fortega ektilo elsvingis Mekksey.

Gregorio albatis per la glavo. Li sentis, ke ĝi trafis ion malmolan.

– Batu ilin! – li kriis.

Sed ankaŭ liaj kunuloj laboris duonblinde.

Kiam revenis lumo en iliajn okulojn, ili vidis Mekksey en la akvo pene lukti kun larĝŝultra turko.

Gregorio ankaŭ ĉi tiun albatis. Li trafis lin surkape. Je tio la turko turnis sin kontraŭ lin. Per la pugnego li tiel forte batis Gregorion sur la ŝultro, ke tiu preskaŭ falis. Sed tiam Mekksey kroĉis sin al li. Kaptis lian nukon de malantaŭe kaj premis lin en la akvon. Li tenis lin premita, dum tiu bobelis.

[...]

Se ekzistas analoj en la ĉielo, en kiuj estas registrata la historio de la hungaroj, la sekvaj ok jaroj estas jene notitaj:

1545: La turkoj jam okupis Buda, Esztergom, Fejérvár, Szeged, Nógrád, Hatvan, Veszprém, Pécs – preskaŭ la tutan landon.

1546: La turkoj dividis Hungarion en 15 *sanĝakojn*. Al la hungaroj restis nur Altlando kaj kelkaj departementoj laŭ la Aŭstria landlimo.

1547: La hungaroj estas premegataj ne nur de la turkoj, sed ankaŭ de la germanoj.

1548: La religio de Luther kaj Calvin disvastiĝadas en la tuta lando. Ne nur turkoj kaj germanoj estas malamikoj, sed kaŭze de tio ankaŭ hungaroj malamikas inter si.

1549: Turkoj kolektas ĉion pretekste de impostoj, eĉ infanojn.

1550: Kontraŭ Transilvanio ekmarŝis valaĥa kaj turka armeoj. Frato Georgo armis dum kelkaj tagoj kvindek mil homojn. Ili venkobatis la valaĥojn. La turkoj forportis sin.

1551: Reĝino Izabelo forlasis Transilvanion. Atencantoj murdis Fratono Georgo.

Kaj sekvis la jaro 1552.

[...]

Kiu estas ĉi tiu homo?

Kun senkoloriĝinta vizaĝo ŝi gapis al la fermita dompordo kaj streĉis sian menson, por ricevi respondon. Jam ŝajnis al ŝi konata la vizaĝo, ankaŭ la voĉo. Sed ŝi ne sciis, de kie. La ringo saltis en ŝian menson. Gregorio

diris, ke li kunportos ĝin, sed metis ĝin en sian labortagan veŝton. Ĉu li kunportis la veŝton?

La sinjorino rapidis al la vestokesto, elprenis, elĵetis la vestaĵojn. La veŝto enestis. Ŝi palpis ĝin: io malmolis ene. La ringo! Ho, la ringo! Li eĉ ne volvis ĝin en paperon.

Kaj tiam, kiel fulmo tra nuboj, eklumis nomo en ŝia menso. Ŝi frapis sur la frunton:

– Jumurĝak!

[...]

La servistino ĝuste revenas el la ĝardeno. Ŝi vidas sian sinjorinon svenfali inter la disĵetitaj vestaĵoj antaŭ la kesto. Ŝia vizaĝo palas. La okuloj malhele ringumitaj.

– Sinjorina moŝto!

Nenia respondo.

Ŝi ĉirkaŭrigardas. Enkuras en la alian ĉambron. Ŝi konjektas rabon.

Fine ŝi elprenas acetujon, ŝmiras, flarigas ĝin al la sinjorino.

– Mia edzo estas en danĝero! – estis ŝia unua vorto. – Kie estas la infano? Ho jes, mi forsendis lin. Alportu rapide la mantelon, Luciino! Ni iru por Johaĉjo!

– Sed tiel malsana, sinjorino moŝto...

– Mi ne malsanas – respondis la dommastrino.

Kvankam ŝi estis pala kiel mortinto.

Ŝi levis sin kaj en la hejma vesto, en kiu ŝi estis, ŝi elrapidis tra la dompordo. La sento de danĝero ŝtalcigis ŝiajn muskolojn. Ŝi iris, impetis rekte al la preĝejo.

En la stratoj svarmis iranta-venanta amaso de foirumantoj. Veturiloj, bovinoj, ŝnurligite lamantaj porkoj kaj inter la bestoj vilaĝanoj ŝarĝitaj per kestoj, bareloj. Foireca voĉomikso. Polvo, cepodoro.

La servistino atingis ŝin nur ĉe la preĝejo. Ŝi kovris ŝin per mantelo.

Subite elmergiĝis la studento el la homamaso.

Kurante kaj dispuŝante homojn li klopodis atingi ilin kaj kriis:

– Szolnok estas okupita de la paganoj! Antaŭ la preĝejo oni anoncis. Kien nun mi iru?...

– Mia infano! – alkriis lin Eva. – Kie vi lasis lin?

– S-ro Balogh kondukis lin en la preĝejon. Li diris, ke dum li preĝos, mi eksciuj novaĵojn. Ho Dio, ho Dio! La lando estas perdita! Se Szolnok estas en turkaj manoj, Eger ne restos staranta.

– La infano..., la infano! – spiregis Eva. Kaj ŝi kuregis sur la ŝtupoj. In-

ter la homamaso tra la ĉefpordego.

– Mia infano! – ŝi kriadis sufokiĝante. – Mia infano!

Interne oni ĝuste celebris litanion kaj germanaj kamparanoj el la ĉirkaŭaĵo plengorĝe ĉantis:

– *Christus, höre uns! Christus, erhöre uns! Herr, erbarme Dich unser!*²⁷

La patrino freneze kriante kuregis inter ili.

– Johaĉjo! – ŝi kriis. – Filo Johaĉjo!

Sed la malgranda Johaĉjo respondis el neniu benko.

[...]

Sur la preĝeja turo kornisto longe signalis.

– Kio okazis? – suprenkriis Mekksey. – Ni estas ĉi-sube!

– Ili venas!

El ĉi tiuj vortoj la oficiroj ĉion komprenis.

– Venas la avangardo!

Ĝis Maklár staris longa ĉeno de skoltoj jam de unu semajno. Vivanta teleskopo etendiĝanta ĝis la kamparo de Abony, kiu tage-nokte gvtis la alvenon de la turkoj.

Jen kion signifis „Ili venas!”.

Mekksey saltkuris sur la rundvojon kaj haste ekiris al la suda pordego. Ankaŭ Dobó. La oficiroj sekvis ilin. Sur la suda bastiono ili haltis kaj per manombritaj okuloj rigardis al la vojo kondukanta el la malproksima ebenaĵo tra la vilaĝeto Almagyar rekte al la fortikaĵa pordego.

Sur la vojo al Almagyar videblis galopanta rajdisto. Li proksimiĝis sen ĉapo. Lia ruĝa dolmano, ŝnure pendigita flirtis post li.

– Mia soldato! – opiniis Gregorio. – Bakocsai!

Bakocsai estis eminenta rajdisto, sed la sorto faris lin piedsoldato, tial li senĉese petegis, ke li povu sidiĝi sur ĉevalo. Tial li estis envicigita ĉi-tage inter la skoltojn.

Laŭ tio, kiel li pli proksimiĝis, videblis, ke lia vizaĝo ruĝas de nura sango kaj sur la flanko de lia ĉevalo io melone ronda balanciĝas.

– Mia soldato! – ripetis ĝojante Gregorio, nun jam preskaŭ krie. – Bakocsai!

– Li interbatiĝis! – rimarkigis Dobó.

– Knabo el Eger – fieris Mekksey.

– Sed mia soldato – replikis Gregorio. – Mia instruato!

²⁷ Kristo aŭdu nin, Kristo elaŭdu nin! Sinjoro, kompatu nin! (germane)

Post la mesaĝisto ankoraŭ tri skoltoj nubigis la vojpolvon. Eble la ceteraj estas mortigitaj.

Do ĉi tie estas la turkoj.

Kion sentis Dobó aŭdante ĉi tiun novaĵon? Alvenas la turka armeo, kiu somere detruis la du plej ŝirmatajn lokojn de la regno: Temesvár kaj Szolnok, pretere ĝi okupis la malpli grandajn Drégely, Hollókő, Salgó, Buják, Ság, Balassagyarmat, do ĉion, kion ajn ĝi deziris. Ĉar la turka armitaro ekmarŝis kun la intenco, fleksi la restintan Hungarion sub la potencon de la sultano.

Ili do jam atingis ĉi tien. Cent kvindek mil homvizaĝaj bestioj. La pliparton oni edukis ekde frua junaĝo pafi per arko, fusilo, grimpi muron, vivi kampade. Iliaj glavoj pretiĝis en Damasko, iliaj kirasoj estas elfaritaj el Derbenda ŝtalo, iliajn lancojn formis majstroforĝistoj de Hindustano, iliajn kanonojn fandis la plej famaj muldistoj de Eŭropo, da pulvo, kugloj kaj armiloj ili havis nemezureblan amasegon.

Kaj fronte al ili?

Jen staras ĉi tiu fortikaĵeto, en ĝi apenaŭ du mil homoj kaj apenaŭ ses malnovaj kanonaĉoj kaj iaspekaj truitaj ferstangoj: arkebuoj, ankaŭ nomataj kanonoj.

Kion li nun sentis?

La novaĵportanta Stefano Bakocsi suprenalopis en la fortikaĵon kaj saltis de la ĉevalo. Li haltis traŝvitinta, polvoplena antaŭ Dobó. Sur lia selrimeno pendis bruna, turka kapo kun krispaj lipharoj; lia maldekstra vango nigris transverse pro koaguliĝinta sango.

– Permesu al mi raporti, kapitana moŝto – li ekparolis kunfrapante la maleolojn –, jen alvenis la turkoj, ke diablo karesu ilin!

– Ĉu la tuta armeo aŭ nur trupo?

– La antaŭparto de la tuta armeo, s-ro kapitano! Ni ne vidis la tutan pro la arbaro de Abony, sed ili tre pelas la piedojn, ke diablo karesu ilin! Tuj kiam ili ekflaris nin, du el ni ili tuj kaptis kaj ankaŭ min persekutis ne mallonge; kiel lasta ĉi tiu fumfarbita, ke diablo karesu lin!

– Kie estas viaj kamaradoj?

La soldato montris al la pordego.

– Ili lavas sin en la rivereto, ke diablo karesu ilin!

– Do – decidis Dobó –, de hodiaŭ vi estas kaporalo. Kaj nun, ek for, trinku kruĉon da vino, ke diablo karesu vin! – aldonis Dobó ridetante.

En la korto de la fortikaĵo ĉiuj altumultis por vidi la detranĉitan kapon.

La razita kapo havis meze longan bukilon. Per ĝi tenis Bakocsi kaj fiere dismontradis ĝin.

[...]

– S-ro kapitano, lasu min elkuri kontraŭ la turkoj! Mi hontas, ke ni forlasis la pordegojn de la urbo sen sabrofrapo.

Budaházy, fortika, larĝŝultra, puŝbrusta oficiro same petis:

– Vidu la turkoj, s-ro kapitano, ke ni kuraĝas fulmatakaj ilin ne nur nokte sed ankaŭ tage.

Petó same ekgrumblis:

– Eĉ se ni estas malmultaj, ni cent ĵetiĝos kontraŭ cent mil.

– Do bone – respondis Dobó kun gajiĝintaj okuloj. – Sed pro tio ne indas interrompi la tagmanĝon.

Plue ili tute ne parolis pri turkoj, nur post la manĝo:

– Vi fulmatakos la infanterianojn apud la ĉefpreĝejo. Trakuros ilin per unu returno kaj tuj regalopos. Batalo estu nur tiom, kiom al ĉiuj renkontiĝas dumvoje. Viciĝi, aranĝiĝi, atendi signalvokon vi ne devas, alie vi mordos en la teron. Vi povas eliri centope.

Ek do, la oficiroj prenas siajn armilojn, maŝkirasojn. Tuj en selon! La soldatoj volas ĉiuj kuniri, sed licenciulo Gregorio elektas la plej muskolfortajn.

Asaboj, lagumĝioj, kumbaraĝioj²⁸, pijadoj²⁹ tagmanĝas sidante surtere antaŭ la preĝejo, sur herbo. Hodiaŭ ili ricevis nur supon por tagmanĝo, la kuleron ili jam reŝovis en sian zonrimenon, zontukon. Nun ili postmanĝas ruĝajn cepojn kun pano. Kelkaj melonumas, iuj maĉas iom da kukumoj, aliaj legomojn postsupe. Ĉio ĉi bone videblas el la fortikajo. Nur la rivereto kaj la foirplaco de la urbo dividas ilin de la neokupita zono. Apud la domoj de la foirplaco instaligis aro da janiĉaroj. Ili nun gaje amuziĝas. Lerta junulo suprenĵetas cimitaron kaj melonon. Unue li kaptas la cimitaron kaj poste la melonon sur la pinto de la cimitaro.

Videblas, ke ili vete ludas. Jen, nun janiĉaro alportas alian akvo-melonon.

Kelkan tempon ili interparolas, poste la janiĉaro suprenĵetas la akvo-melonon kaj iu alia la cimitaron.

Iu tria de malantaŭe ektiras la lertumanton. La akvomelono terenfalas kaj disŝprucas elvokante gajan amuzon ĉe la soldatoj.

La fortikaĵa pordego estas ankoraŭ malfermita, kamparanoj fuĝintaj en

²⁸ Grenadisto, bombokanona soldato (turke).

²⁹ Infanterianoj (turke).

la fortikaĵon suprenportadas akvon kaj trinkigas la fortikaĵajn ĉevalojn. Kion gajnus la turkoj, se ili kuratakus la pordegon? Kelkajn kuglojn sub la haŭton. Ankaŭ la turkoj bone scias, ke la pordego estas, eĉ se aperta, kvazaŭ malfermita faŭko de leono: dentegoj enestas.

Dum la distriĝo de la janiĉaroj foje ĉesas la trinkigo ĉe la rivereto, haltas la akvoportado.

Tio estas nur du-tri-minuta interrompo, kial ĝi estus suspektinda? La janiĉaroj eĉ tion ne rimarkas, ke plimultiĝas homoj sur la muroj, precipe arkpafistoj kaj fusilistoj. Sed ili vere ektemas aŭdante, ke estiĝas ia obtuza rulbruo. Kiam iliaj okuloj turniĝas al la fortikaĵo, eklekas haŭbizoj sur la muro kaj sputas ĉiaspecajn najlojn, kuglojn, ferrubaĵojn kontraŭ ilin. Tra la fortikaĵa pordego longa vico de husaroj vente elgalopas.

Kiel tempesto ili transsaltas la rivereton, kaj kiam la surprizitoj kaptus por glavoj, hak-frap! – ili iam estas hakataj, buĉataj. Tra kaj sur ili la uragano atingas la portulake prikreskitan placon, sur kiun ĉiu-posttagmeze la episkopa preĝejo ĵetas sian ombron.

La turkaj infanterianoj terurite saltleviĝas kaj rigardas al la foirplaco. Kelkaj ekkuras, kelkaj restas starantaj kaj elingas siajn glavojn.

La galopanta rajdistaro aperas tie kvazaŭ el sub la tero. Kiel fajraj drakoj dancas la spronataj ĉevaloj. Kuregas plurcent turkoj kiel alarmita grego de lupoj. La hungaroj spure al ili.

Sed el la proksimaj stratoj ekmuĝas helpo: alrajdantaj *akinĝioj kaj gonuloj*³⁰, janiĉaroj kun fusiloj kaj lancoj alkuras. Jen ĝuste kontraŭ Gregorio streĉas lancon blank-kalpaka janiĉaro. Li volas pikpuŝe elseligi lin.

Dufoje ekfulmas la glavo de Gregorio. Post la unua rompiĝas la lanco, post la dua dorsenfalas la turko.

– Jesuo! Jesuo! – oni krias de sur la bastiono.

– Allah! Allah! – hurlas la turkoj.

Ĉiam pli disiĝinte la hungaroj turniĝadas inter ili. Iliaj glavoj fulmas-brilas. Tamen la bruston de la ĉevalo de Miĥaelo Horváth trapikas janiĉaro. La ĉevalo renversiĝas. Horváth desaltas kaj mortbatas la janiĉaron kaj ankoraŭ unu. Sur li rompiĝas lia glavo. La trian li batas nur per la pugno sur la nazo kaj ekiras kurante, perpiede tra la placo restinta malplena post la rajdistoj – returne al la fortikaĵo.

La ceteraj ankoraŭ puŝiĝas antaŭen. La ĉevalaj piedoj tretas homojn. Budaházy ĝuste levas sian glavon por terura hako, kiam janiĉaroj premitaj al domflanko ekfajras fusilojn al li. La glavo elfalas el lia mano. Li turnas sian ĉevalon kaj kliniĝinte sur ĝian kolon galopas returne.

³⁰ Volontulaj defendantoj de fortikaĵoj (turke).

En tiu momento ankaŭ la aliaj returnas sin.

Sur la ĉefstrato milo da *akingioj* kuregas malsupren kiel helpanta tempesto. Gregorio ĝustatempe preterglitas ilin. S-litere li turnas sin al la Kapitula strato. Ankaŭ en tiu strato svarmas turkoj. Sed pli da piedsoldatoj ol rajdistoj, kaj dum la infanterianoj kapoperde fuĝas, ili ĝenas la turkajn rajdistojn, kiuj devas atenti ankaŭ siajn proprajn kunsoldatojn. Tamen persaj *gariboj*³¹ en timiga amasego galopas renkonte. Sed vane ili torentas kontraŭ nian furioze galopantan centon! Sanga strato malfermiĝas inter ili kaj ili disfaladas dekstre-maldekstre kiel garboj dispuŝataj de kirlovento.

Nun videblas, kiel malfortaj estas la etstaturaj, orientaj ĉevaloj apud la korpulentaj, fortikaj hungaraj. Dek hungaraj husaroj dispremas eĉ cent turkajn, se ili interpuŝiĝas. Kaj se hungaro ŝetas sin sur turkan rajdiston, el tiu certe ne fariĝos moŝta sinjoro en la fortikaĵo de Eger.

Ili jam galopegas returne.

– For de la pordego!

La krioj de la popolo jubilanta sur la fortikaĵa muro intermiksiĝas kun la bruoj de la returne batalantoj.

Dobó zorgoplene vidas, kiel senĉese alondas ankoraŭ *akingioj* kaj *ĝebegioj* helpe al la aliaj turkoj. Li krias „fajron”. Sur la muro ekkrakas fusiloj kaj ekvibras pafarkoj. La antaŭo de la turka taĉmento subite retenas sin, interpremiĝas.

En ĉi tiu momento eksonas bleka, besteca hurlo sur la muro de la fortikaĵo, bleka kiel azena. Ĉiuj alrigardas. La cigano muĝas tie. Furioze saltante li skuas sian glavon al la turkoj:

– Atendu, friponaj hundoj turkaj! Vi *mortaĉoŝ!*

El ĉi tiu kirlomikso de turkoj niaj rajdistoj vikle elturniĝas kaj galopegas sur siaj ŝaŭm- kaj sangkovritaj, ŝvitegantaj ĉevaloj tra la fortikaĵa pordego inter la jubilkrioj de la defendantoj.

La batalo daŭris ne pli longe ol duonhoron. Sed la Preĝeja placo, la foirplaco kaj la Kapitula strato restis plenaj de mortintoj, vunditoj kaj lamantaj ĉevaloj. La konfuzitaj turkoj retiriĝas kun ŝaŭmanta furiozo kaj turninte sin, de malproksime ili skuas siajn pugnojn.

[...]

³¹ Fremdaj solduloj (turke).

Tiutage kontraŭ vesperkrepusko virino envolvita en nigra *fereĝo*³² rapidis tra la urba foirplaco. Neniu akompanis ŝin, nur ia ĉirkaŭ dek-kvinjara, nigrahara knabo kaj granda, bunta hundo.

Ĉe la rivereto la hundo malsuprenkuris al la akvo kaj la virino, tordante la manojn, iradis tien-reen laŭlonge de la bordo. Ŝi rigardadis al la pordego. Ĉe vesperkrepusko oni kutime suprentiris kaj ŝlosis la pordegon per naŭ pendseruroj. Eble la virino atendis tion. Kaj post kiam oni levis la pordegon, ŝi travadis la rivereton sen levi sian veston.

– *Mi fil!* – ŝi kriis preskaŭ ŝrike antaŭ la pordego. – *Mi fil!*

Oni anoncis al Dobó, ke la patrino de la malgranda turka infano staras antaŭ la pordego.

– Enlasu ŝin, se ŝi volus enveni – instrukciis Dobó.

En la levponto, kiu estas samtempe ankaŭ pordego, troviĝas malgranda ferpordego. Oni malfermis ĝin por la virino.

Sed tiu terurite retrocedis.

La hundo bojis.

– *Mi fil!* – kriis ree la virino.

Kaj ŝi montradis ian monujon. Ŝi tintigis ĝin faligante el ĝi ormonerojn en la alian mankavon.

La pordego refermiĝis.

La virino denove alproksimiĝis. Tordante la manojn ŝi iradis tien-reen antaŭ la pordego. Ŝi levis sian vualon kaj viŝis per blanka tuko siajn fluan-tajn larmojn.

Dume daŭre ŝi ŝrikis:

– *Selimo! Mi fil!*

Fine ŝi frapis la ferpordon.

La pordego ree malfermiĝis, sed la virino ankaŭ ĉi-foje retrocedis.

En ĉi tiu momento Gregorio aperis sur la bastiono super la pordego kondukante la infanon per la mano.

– *Selimo!* – ŝrikis la turkino etendante ambaŭ brakojn al la infano.

– *Anam!*³³ – kriis la infano etendante sian liberan brakon al sia patrino.

La hundo jelpante saltadis kaj fojfoje laŭte ekbojis.

Gregorio ne povis mesaĝi el la fortikaĵo, sed la infano povis paroli eksteren. Kaj la knabeto malsuprenkriis al la patrino:

– Vi povos interŝanĝi min kontraŭ kristana kaptito, patrino, post la sieĝo.

La virino genuiĝis kaj kvazaŭ ŝi volus brakumi lin tra la aero, ŝi etendis

³² Surtuteca vualo de mahometanaj virinoj.

³³ Patrino (turke).

ambaŭ manojn, kaj kiam la infano malaperis, ŝi ĵetis kisojn post lin.

[...]

Kaj la sekvan tagon, la 16an de Septembro la suno leviĝis dum tondrado, muĝado de la kanonoj.

La tero tremis. De la baterioj leviĝis fumo en formo de brunaj nuboj al la ĉielaj nuboj kaj jam en la unua horo forkovris la sunon kaj la bluan maron de la firmamento.

La bastionoj kaj muroj krakegis, knaregis. En la internan fortikaĵon mikse faladis pezaj kaj etaj kugloj. Flugadis brulsagoj kaj brulpilkaj. Ĉie frapiĝadis kaj diskuŝis kanonkugloj. La vivo nek de homoj nek de bestoj plu estis en sekureco.

Sed ĉi tiun danĝeron la fortikaĵanoj atendis jam pretaj. Dobó ankoraŭ nokte kornalarmis la soldataron.

Pluraj el ili altigis la palismurojn en tiuj direktoj, de kie sekvatage atendeblis la kuglopluvo el la domo de preposto Hécey. Al aliaj li ordonis malsuprenporti la ledojn restintajn en la subtegmento kaj mergi ilin en akvoplenajn kuvojn.

Triaj soldatoj portis palisojn, barelojn kaj terplenajn sakojn en la fuorton, al la Karcera bastiono kaj la pordegoj, por ke ĉe murrompiĝo ŝtopmateriale ĝustatempe disponeblu.

Ĉiujn sitelojn kaj potojn, kiom nur troviĝis en la fortikaĵo, oni devis plenigi per akvo. El la teretaĝaj kaj subteraj ejoj oni elportis ĉion superfluan kaj starigis anstataŭe litojn. Karotoj, kukurboj, brasikoj, salo, ĉio, kion kugloj ne damaĝis, venis supren kaj ilian lokon okupis laborantaj kaj ripozantaj homoj.

Ankaŭ la stalon oni prifosis. La ĉevaloj, bovinoj ricevis duon-klafte pli profundajn fakojn.

La nordajn kaj orientajn flankojn de la domoj oni apogis per alŝutita tero. En lokoj, kie kutime faladis kugloj sur la foirplacon, oni profundigis fosojn kaj amasigis la teron antaŭ ili. La kugloj poste faladis en la teramasojn.

En la fortikaĵo jam nenio bruligebla troviĝis, nur la staltegmento, kelkaj fojnamasoj antaŭ la stalo, iom da tritiko kaj amaso da pajlo por substernaĵo.

Dobó igis malkonstrui la staltegmonton. Ordonis kovri la fojnamasojn, tritikamason per malsekigitaj bovledo kaj ŝutigis teron sur la pajlon.

Por la estingo de tio, kio bruligebla ankoraŭ restis, kiel subtegmento kaj

defendpozicioj, li disportigis malsekajn ledojn.

La kanonaj eksplodoj trovis la fortikaĵon ĉe tiu ĉi laboro. La unua duonkvintala kuglo trafis la kuirejon kaj rompis plurajn vazojn.

La virinoj ĝuste tiam faris fajron, preparis farunon, grason, lardon por kuiri al la soldatoj.

Pro la entrafiĝo de la kuglo ili teruriĝis. Amase-ĥaose ili kuregis el la kuirejo, kaj kiu ne povis tra la pordo, elgrimpis tra la fenestro.

Kaj la kuglo pluturniĝadis inter amasoj de rompitaĵoj, lingoteleroj kaj frakasitaĵoj.

Mekcsey vidis la entrafon el la stalo. Li alkuris.

– Kio okazis? – li almuĝis la virinojn disetendante la brakojn por reteni ilin.

– Kuglo entrafis.

– Reen! Reen! Venu post mi!

Kaj li enrapidis en la kuirejon. Prenis tinon per ambaŭ ĝiaj ansoj. Ŝutis el ĝi akvon sur la kuglon.

– Nu – li diris piedpuŝante la kuglon en la angulon –, kuiru plu! La kuglo venis de dekstre, do laboru en la maldekstra flanko de la kuirejo. De la alia flanko transmetu ĉiujn vazojn, kaj neniu iru tiuflanken. Ĉi tie, en la maldekstro de la kuirejo ne estas danĝere.

– Oj ve – lamentis virino –, iu el miaj kokinoj kokerikis nokte. Jen la fino!

– Tio estis virkoko – diris Mekcsey.

– Sed jes ja kokino, s-ro kapitano.

– Do, se estis kokino, kuiru ŝin al mi por tagmanĝo, tiam ŝi ne plu kokerikos!

Kelkajn minutojn la virinoj ankoraŭ krucosignadis. Sed kiam la dua kuglo batpuŝiĝis tra la tegmento, ili mem priverŝis ĝin per akvo kaj rulis apud la alian.

Pro la kuglopluvego konfuziĝis la popolo de la tuta fortikaĵo. Ĝis tiam nur en unu loko bruegis kanonoj, kaj se fojfoje iu kuglo enpafiĝis, oni jam sciis, ke evitindas la muroj, al kiuj nur la matena suno brilas kaj ankaŭ tiuj, al kiuj neniam. Sed de tiam, ke de ĉiuj flankoj ruliĝadis, sibladis kaj knaladis kugloj, laŭ grandeco inter akvomelono kaj juglando, oni ne plu sciis, kie estas sekure.

Sed nun ja fariĝis ege modaj ĉiaj kaskaĉoj, ĉiaspecaj kirasoĵoj! Ĝis nun nur la cigano surhavis kaskon kaj brustkirason, eĉ se nudpieda, sed nun, kiam ĉie saltadis, batadis kaj faladis kugloj kaj la barbiroj jam en la unua horo devis kunkudri kaj aluni la vundojn de dek homoj, ĉiuj rapidis al armil-ejoj por surmeti laŭeble plej rezistajn kirasoĵojn.

La du kapitanoj kaj la ses ĉefleŭtenantoj jam en la unua kvaronhoro ron-
diris ĉiujn partojn de la fortikaĵo.

– Ne timu! – tondris Dobó.

Kaj la voĉo de la leŭtenantoj eĥis ĉie:

– Ne timu! La kugloj ne ŝanĝos sian flugon. Kien unufoje falis kuglo, tie
ne iradu!

Sed ili mem iradis tamen en ĉiuj lokoj.

Kaj fakte, ne pasis unu horo, la kugloj mem montris, kiuj konstruaĵoj,
kiuj muroj estas danĝeraj. Kugloj deskvamigis stukaĵon, kaj kie la konstrua-
ĵoj konsistis el sabloŝtono, tiom da kugloj borfrapiĝis en ilin, ke la muro ni-
gris pro ili.

Male, kelkaj muroj restis netuŝitaj, blankaj. Kaj se tamen falis tien
kugloj, nur refrapitaj de aliaj.

Tiaj muroj servis samtempe ankaŭ kiel ŝirmejo, kie metiistoj povis la-
bori, soldatoj ripozi.

Kvankam estas vere, ne abundis tiaj muroj en la fortikaĵo.

Kaj en ĉi tiu fulmotondra pluvego de la morto Dobó aperis jen sur unu, jen
sur alia bastiono.

Li jam portis brilan ŝtalkingon sur la kapo, kirason sur la brusto, brak-
kaj gamboplatojn sur la membroj. Fergantojn sur la manoj.

Iuloke li alĝustigis la gabiojn, aliloke la kanonojn.

– Pafu nur tion – li instrukciis –, kio certe trafefblas. Ni ŝparu la pulvon,
homoj!

Nur ĉi unu aferon oni ne komprenis en la fortikaĵo.

– Ke diablo dorlotu tiun pulvoron – murmuris la kampuloj –, ĉu ne por
tio ĝi servas, ke ni pafu per ĝi?

Kaj ne troviĝis homo en la fortikaĵo, kies manoj ne jukus por pafi. Ja pi-
kas la okulojn, ke ĉi-sube, sub onia nazo svarmas turkoj: oni devus ekstermi
aŭ almenaŭ fortimigi de la muroj ĉi tiujn pendumindajn friponojn.

Tamen ili ne kuraĝis porpeti al Dobó. Ju pli tempestis la sieĝo, des pli li
enmanigis al si ĉiun ordonpovon.

Tiutempe la turkoj jam invadis ankaŭ la Reĝan Seĝon. Tendoj kaj *bon-
ĉokoj* buntis kaj inter ili ĉiaspeca milita homamaso bolis-svarmis ĉiuflanke
ĉirkaŭ la fortikaĵo.

Turka, tendara muziko eksonis jen tie, jen aliflanke: sono de fajfiloj,
klarionoj kaj cimbaloj akompanis la senĉesan tondradon de la kanonoj.

Kaj kie kanonoj ne rompadis murojn, tie *kumbaraĝioj* ĵetadis grenadojn,
janiĉaroj, arkpafistoj flugigis brulsagojn.

Kuglopluvego kaj fajrotempesto ĉie.

De la sagoj kaj eksplodantaj grenadoj la popolo eĉ pli konfuziĝis ol pro la kugloj.

Sed la multspertaj leŭtenantoj ankaŭ pri tio instruis la fortikaĵan popolon.

Apenaŭ la unuaj grenadoj enfalis kaj siblante, saltante disŝjetis ruĝe diseriĝantajn fajraĵojn, Dobó mem prenis malsekan ledon kaj sternis sin kune kun ĝi sur la bombon.

La homoj gape vidis, ke la grenado ne nur ne disŝjetas la kapitanon, sed ĝi nur iom frapiĝas, moviĝas, poste estingiĝas sub la felo.

La sekvajn bombojn jam la soldatoj senpovigis.

Ili konsistis el argilo kaj vitro.

– Nu, ni montros ion pli taŭgan al la turkoj! – diris Gregorio.

Kaj li ordonis alporti la proprajn grenadojn, pri kiuj li okupiĝis unu tutan semajnon.

Dobó metis la manon sur la ŝultron de Gregorio:

– Ankoraŭ ne!

Kaj de mateno ĝis vespero senĉese tondris la kanonoj kaj faladis la pluvo de la morto. La duon-kvintalaj kuglegoj de la *zarbuzanoj* frakasis pordeglarĝajn breĉojn en la muroj. La pezaj, malgrandaj kugloj de la arkebuzoj kaj haŭbizoj derompadis la belegajn skulptaĵojn de la preĝejo, breĉadis la postmuron de la kapitana palaco.

Kiam la deĵoranta gardistaro frumatene posteniĝis sur la Aleksandra bastiono en la ŝirmo de la palisparapeto, de malantaŭe hajle faladis kugloj sur ilin el turkaj arkebuzoj.

– Vizaĝen! – kriis Gregorio.

La cent kvindek soldatoj ĵetis sin teren.

Gregorio flankiĝis al la muro.

La kugloj siblis super la kapoj kaj enfrapiĝis en la fortikaĵmuron.

La palisaĵo sur la muro fariĝis kiel kribrilo.

Sekvis ioma paŭzo. La turkoj elpafis el ĉiuj kanonoj, nun ili reŝargis.

– Supren! – kriis Gregorio.

Kvin homoj restis kuŝantaj.

– Portu ilin antaŭ la preĝejon! – ordonis Gregorio malgaje. – Ĉu troviĝas ankaŭ vunditoj?

Dek kvin sangokovritaj homoj elpaŝis senvorte el la vico.

– Kaj vi iru al la barbiroj!

Kaj li balancis la kapon. Sakris akompane.

– Knaboj – li diris poste –, ni ne povas kuŝaĉi ĉi tie dum la tuta tago. Alportu fosilojn kaj ni faru tranĉeon!

Ĉirkaŭ dek soldatoj forkuris por fosiloj kaj baldaŭ ili ĉiuj fosis.

Ne forpasis pli ol unu horo, la soldatoj elfosis tian tranĉeon, en kiu ĝis-bruste ili povis stari.

Gregorio atendis, ĝis la turkoj ree pafas, poste elsaltis el la tranĉeo kaj forrapidis en la ĉeffortikaĵon, por raporti pri la tranĉefosado al Dobó.

Apud la muro de la monaĥejo li trafis la turkan knabeton, kiu ludis sub la defluejo. Li estis elfosanta per kulero fumantan kanonkuglon el la muro. Certe li eskapis el la kuirejo kaj staris ĝuste sur loko, kie dense faladis kugloj.

– *Hajde!* (For de ĉi tie!) – kriordonis al li Gregorio.

La infano ekstremis kaj turnis sin al Gregorio. Apogante sin al la muro, pala kaj per timplenaj okuloj li rigardis al li, dum ambaŭ manojn li metis sur la muron kvazaŭ li serĉus la jupon de sia partino.

Novaj kugloj batiĝis en la muron kaj defrapis stukaĵerojn. Pugnogranda, nigra kuglo batiĝis super la ŝultro de la infano en la muron kaj postlasis malpuran ringon ĉirkaŭ si.

Gregorio alsaltis. Forkaptis la infanon kaj enportis lin surbrake en la palacon.

La suno sinkis tiutage inter cindrecaj nuboj direkte al Bakta. Nur por momento ĝi pribrilis oran zonon glimantan ĝis la mezo de la firmamento, poste malaperis inter sangoruĝaj nuboj por plulumi al loĝantoj de pli feliĉa mondoparto, kiuj ĉi-vespere klinas sian kapon sur la kusenon ĉe la paca zumado de aŭtunaj insektoj.

En la fortikaĵo de Eger nur nun komenciĝas la laboro.

Apenaŭ la lasta pafado de la *topĉioj* estas formuĝinta, masonistoj prenas siajn trulojn, kamparanoj alportas ŝtonojn, teron, labojn, akvon, sablon kaj komenciĝas la ŝtopado de murbreĉoj.

Murrande kuŝas fusilistoj, en la breĉoj diligentas laboristoj.

De tempo al tempo aŭdiĝas pafadoj el la bombokanonoj, jen sur tiu, jen sur alia bastiono.

Kugloj flugas supren kaj kreas en la alto, por momento prilumas per ruĝa helo la esplanadon antaŭ la fortikaĵo.

Lumkugloj ili estas. Nun jam bezonataj. Antaŭgardas kontraŭ turkaj insidoj.

– Laboru, homoj, laboru! – aŭdiĝas jen tie, jen aliloke instigoj el la buŝo de oficiroj.

Masonisto ŝnursinkas el la alto, por fiksi ekstere la enbreĉigitan trabon en la muro.

De sube ekflamas fusilaj salvoj. Kugloj pluvigas sur la laboristojn. Kaj

poste ankoraŭ fajroj de pluraj fusiloj ekflamas kaj krakadas.

La flamoj de la turkaj pafiloj prilumas du centojn da kuŝantaj janiĉaroj.

Pafserio respondas al ili de sur la muroj.

Sed la masonisto falas en la eksteran profundon.

– Nur ene laboru! – aŭdiĝas la voĉo de Petó.

Kaj la laboristoj pludiligentas inter la ade ripetiĝantaj pafadoj de la *tufenĝioj*³⁴.

Ĉe noktomezo eksonas la korno de la pordogardisto.

Dobó sidas sur pulvobarelo. Li levas la kapon.

– Nu, alvenis la letero de la reĝo – rimarkigas Petó.

Kaj fakte, ne forpasas pli ol kvin minutoj, du spiregantaj, sangantaj homoj ekstaras antaŭ Dobó.

Ambaŭ en turkaj vestaĵoj. La sangoŝmiritaj glavoj en iliaj manoj atestas, ke ne estas facile eniri la fortikaĵon de Eger.

– Nu – urĝas Dobó –, jam parolu!

Unu estas Varsányi, kiu eliris la pasintan nokton. La alia: Nikolao Vas, kiu estis portinta la leteron de paŝao Ahmedo al la reĝo.

Varsányi pene spiregas:

– Oni preskaŭ mortigis min!

Nikolao Varsányi repuŝas la sangoplenan sabron en la ingon kaj sidiĝas sur la ŝtonpolva tero. Flavajn botojn li surhavas. Li detiras unu. Elprenas poŝtranĉilon. Deprenas la plandumon. Letero enestas. Li etendas ĝin al Dobó.

Kaj nur tiam li kapablas ekparoli:

– Mi staris vid-al-vide al la episkopo. Li sendas honoran saluton al via kapitana moŝto. La episkopa moŝto mem portis la leteron al la reĝo. Jen la respondo.

– La trian oni mortigis – aldonas Varsányi.

– Kiun trian? – almuĝas lin Petó.

– Stefanon Szűrszabó, nian soldaton. Ankaŭ li elfermiĝis el la fortikaĵo. Li volis reveni kun ni. Oni mortpikis lin per lanco jen tie, ĵus antaŭ la pordego.

Li prenis profundan spiron kaj daŭrigis:

– Ni tute ne pensis trafi turkojn ĉe la pordego. Kiam ni ĝisvenis, mi eksonigis mian fajfilon. Apenaŭ mi enblovis, ĉirkaŭ dek turkoj ĵetis sin sur nin de apud la pordego. Bat-frap! Bonŝance, estis mallume kaj la pordego tuj malfermiĝis. Stefanon oni mortpikis antaŭ mi, apenaŭ mi povis ensalti.

Dume Dobó rompis la sigelon, kiu cetere jam dispolviĝis en la boto kaj

³⁴ Fusilistoj (turke).

klinis sin al lanterno. Li legis la leteron.

Lia vizaĝo fariĝas ĉiam pli malserena. Liaj du brovoj jam intertuŝiĝas. Kiam li atingas ĝis la fino de la letero, li skuas la kapon, puŝas la leteron en la poŝon.

Pető volus demandi, kion la reĝo skribis. Sed Dobó ŝetas malhelan rigardon ĉirkaŭ si kaj turnas sin al Varsányi.

– Ĉu vi enmanigis la leteron al s-ro Szalkay?

– Mi enmanigis ĝin, sinjoro. Li sendas sian honorsaluton. Li skribis dum la tuta antaŭtagmezo kaj kiom da leteroj skribiĝis, tiom da rajdkurieroj li dissendis ankoraŭ antaŭtagmeze.

– Ĉu vi havas ankoraŭ ion por raporti?

– Mi ne – diras Nikolao Vas. – La episkopa moŝto akceptis nin tre afable. Ankaŭ ĉe lia reĝa moŝto mi trovis favoran akcepton, sed mi havas hakvundon sur la kapo, mi jam volus iri al barbiro.

– Filo Pető – diris Dobó –, ne forgesu: diru morgaŭ al Sukán, ke la nomojn de ĉi du homoj li registru inter tiuj, por kiuj, post la sieĝo, ni petos premion ĉe la reĝo.

– Sinjoro – ekparolas Varsányi gratante sian nukon –, mi havas ankoraŭ ion por diri.

Dobó alrigardas lin.

– Luko Nagy igas per mi peti vian moŝton starigi kelkajn torĉulojn ĉe la ĉefpordego. Li revenus ĉi-nokte...

– Mi enĉenigos lin! – ekmuĝas Dobó kolere. – Mi instruos al li, kiel ne malfrui!

Homo kun dorskuvo plena de akvo preterrapidas. Dobó flankeniĝas kaj suprenkrias al la masonistoj:

– Kruce metu la trabon, ne laŭlonge!

Kaj li returnas sin al Varsányi:

– Ĉu do Luko eble kredas ... Ba, se iam li venos antaŭ miajn okulojn, mi instruos al li la morojn!

Varsányi gratas la mentonon kaj dubeme rigardas al Dobó:

– Lin ege premas, sinjoro, ke li elfermiĝis. Lin konsumas malĝojo.

Dobó maltrankvile iradas tien-reen sub la lanterno.

– Sensencaĵo! Kion imagas al si tiu homo? Cetere li povas mesaĝi kion ajn, li ne preteros la punon. Ankoraŭ ĉi-nokte vi ambaŭ devos returniĝi. Vi ree portos leteron al la episkopo kaj la reĝo. Ĉu vi povas reiri, Nikolao?

Nikolao altenas tukon al la kapo. Sur lia juna vizaĝo maldekstre abunde fluas sango, lia tuko jam ruĝas pro ĝi.

– Mi povas – li respondas preteme. – Do mi igos kunkudri mian kapon en Szarvaskő.

La detruigo de tago al tago pliampleksiĝas sur la muroj. Ĉiam pli multaj homoj okupiĝas per rekonstruado. Eĉ gardistoj dumnokte. La sekvan tagon, kiam la turkaj kanonoj denove ekmuĝas, la mortero elŝprucas dek klaftojn alten el la muroj kaj la enpafitaj kanonkugloj restas por eterne en la muroj.

– Pafu do, pafu! – krias la maljuna Cecey. – Fortikigu per fero nian muron.

Sed en la deka tago la leviĝantaj turkoj ekvidas jam ankaŭ neŝtopitajn mursekciojn. Nokte oni ne povis ripari ĉiujn.

Fine de la dua semajno maljuna kampulo en drapmantelo anoncis sin ĉe la pordego. Li surhavis mantelon fremdan por tiu regiono. Tamen oni enlasis lin.

Dobó akceptis lin sur la foirplaco. Li sciis, ke la turkoj denove sendis leteron.

– Kie vi enhejmas? – li demandis kolere.

– Mi loĝas en Csábrág, sinjoro.

– Kian aferon vi havas ĉi tie?

– Hm... mi alportis farunon al la turkoj, sinjoro.

– Kiom?

– Hm... dek ses veturilojn.

– Kiu sendis vin?

– La s-ro ekonomo.

– Ne s-ro ekonomo sed fripona renegato!

– Tamen, sinjoro... ni devis subiĝi. Ni ne volis havi la sorton de la najbaraĵo.

– Kiu estas via najbaraĵo?

– Fortikaĵo de Drégely³⁵, sinjoro.

– Vi alportis leteron, ĉu?

– Por diri la veron...jes.

– Ĉu de la turkoj?

– De ili, sinjoro.

– Ĉu ne diris al vi via konscienco, ke vi agos kulpe, se vi alportos la leteron?

– Hm..., kiel mi sciis, kio tekstas en la letero?

– Ĉu povas havi ion bonan tio, kio venas de turkoj?

³⁵ En 1552 paŝao Aljo sieĝis ĝin kun 14 mil homoj kontraŭ 150 hungaroj kaj povis konkeri ĝin, nur post kiam li tute pafuinigis ĝin.

La homo ne respondis.

– Ĉu vi scipovas legi?

– Ne.

Dobó turnis sin al la virinoj.

– Portu al mi poton da ardaĵo.

Ili alportis ĝin. Elŝutis sur la teron.

Dobó ĵetis sur ĝin la leteron.

– Kaptu ĉi tiun maljunan perfidulon kaj tenu lin en ĝia fumo. Flaru ĝin, sentaŭgulo, se legi ĝin vi ne scipovas!

Poste li sidigis lin en punblokon kaj lasis lin sur la foirplaco: vidu la popolo de la fortikaĵo, kiel oni pagas al tiu, kiu akceptas leteron de turkoj.

La scenon okulatestis ankaŭ la leŭtenantoj. La homoj alariĝis. Ili priridis kaj algapis la homon, kiu larmegis pro la fumo kaj agaciĝo.

– Vidu, vi, etcerba! – incitis lin la cigano. – Kial vi *dungijiŝ postiŝto*?

La letero distavoliĝis jen ruĝe, jen nigre sur la ardaĵo. Kiam ĝi estis ruĝa, la litervicoj konturiĝis kiel nigraj ornamaĵoj sur ĝi. Kaj kiam la folioj cindriĝis, la literoj por momento ruĝe trazigzagis ilin.

Ankaŭ Gregorio ĉestaris.

Kiam la kampulo estis enpaŝinta tra la pordego, ĉiuj kanonoj mutiĝis.

La turkoj atendis la respondon.

– S-ro kapitano – diris Gregorio, kiam ili elpaŝis el la homgrupo –, mi nevole legis unu linion de la letero.

– Por kio vi legis ĝin? – respondis Dobó levante la ŝultrojn. – Mi ne legis, tamen mi konas ĝin.

– Vere, ne indus paroli pri ĝi – daŭrigis Gregorio –, sed tiu unu linio estis tiel vere paganeca, ke mi ne povas deteni min konigi ĝin al via moŝto.

Dobó diris, nek ke li ne konigu, nek ke li ne konigu ĝin.

Sekve Gregorio daŭrigis:

– La linio tekstis jene: „Aŭ ĉu jam pretas via ĉerko, Stefano Dobó?”

Dobó hm-hm-is:

– Jes, ĝi pretas. Kaj se ili volis demandi per tio, ĉu mi estas preparita por la morto, al tio ununura mi respondos.

Post kvaronhoro aperis nigra ĉerko sur la mursupro. Du lancoj tenis ĝin per ferĉenoj ĉe ambaŭ ĝiaj ekstremoj. La tenilojn de la lancoj la soldatoj fiksitis en ŝtonfendojn.

Reage denove ektondris la turkaj kanonoj.

Vespere de la tago de Sankta Miĥaelo jam ĉirkaŭ dek kvin grandaj fen-
doj faŭkis en la muroj.

Da ili estis plej multe en la muroj de la fuorto. La dua plej granda rom-
paĵo estis sudoriente, ĉe la angulturo. La tria kaj kvara sudflanke, kie la por-
dego estis enrompita. La alta gvatoturo estis tiom trapafita, ĉefe mezalte, ke
oni ne komprenis, kio ĝin kuntenas, kial ĝi ne kolapsas.

La defendantoj jam ne povis ĉion ŝtopi, rebonigi. Estis antaŭvideble, ke
eĉ se ili ĉiuj laborus, duono de la detruoj restus neriparita.

– Tamen ni laboru, homoj!

Ĉe noktomezo Dobó vokis siajn oficirojn sur la Preĝejan bastionon kaj
elpafigis lumkuglojn.

– Rigardu – li diris –, tiuj ĉiam pli proksimiĝantaj teramasoj similas al
tiuj de talpoj subtere laborantaj. La tranĉeoj apude estas plenaj de turkoj.

Tiunokte la turkoj efektive venis tute proksime al la muroj. Videblis ĉiu-
loke en la proksimeco la flavaj-ruĝaj flagoj de la janiĉaroj, sturmeskaloj
etendiĝantaj inter la saktolaj tendoj, en kiuj po dek-dudek janiĉaroj tranok-
tis.

– Filoj miaj – diris Dobó –, tio signifas, ke morgaŭ okazos sturmo. Ĉiuj
dormu ekstere.

Li starigis haŭbizojn kaj fusilistojn en la breĉojn. Ankaŭ kanonojn li di-
rektigis al la rompaĵoj. Laŭ la muroj estis apogitaj tiom da lancoj, piklancoj,
bomboj, hokstangoj, falĉiloj, rezervoj da armiloj, kiom nur troviĝis en la
fortikaĵo.

Kaj li manpremis al ĉiuj siaj oficiroj.

– Filoj miaj – li komencis –, ĉiu jam scias siajn farendojn. Dormu, kiom
vi povas. Ni devas rebati la atakon.

Tiam aŭdiĝis ia nekutima, obtuza bruado el la urboflanko.

Ĉe la apudrivereta pordego la fajfilo de Varsányi akre eksonis.

– Pordegon malfermi! – krias Dobó.

Plilaŭtiĝanta bruo aŭdiĝas malsupre, en la urbo. Hufobruoj. Armil-
klakado, hakobatoj. Hungarlingvaj krioj:

– Pordegon malfermi! Luko venas!

La pordegan gardon estras leŭtenanto Johano Vajda. Li tuj ordonas
bruligi torĉojn kaj lumigi. Kaj oni vidas, ke la taĉmento de Luko Nagy en
longa linio rompas al si vojon al la fortikaĵo tra *ĝebeĝioj* tranoktantaj sur la
foirplaco.

– Torĉojn malsupren! – krias Vajda. – Sub la pordegon!

Ĉar tuj li komprenis, ke estas pli bone al tiuj veni en mallumo.

Oni tuj mallevas la ponton kaj suprentiras ankaŭ la falkradon.

– Fusilistoj, lancistoj, ĉiuj ĉirkaŭ la pordegon!

Niaj bravuloj saltrajdas unu post alia tra la pordego. Spure al ili tumultas hurlanta turkaro.

Kaj komenciĝas sanga interpuŝiĝo sub la pordega volbo.

Nudpieda *pijado* suprenkuras katolerte sur la pontoĉeno. En lia buŝo kruce tenata cimitaro. Iu torĉotenanta gardisto ekvidas lin. Por momento ili fikse gapas unu al la alia. Poste la gardisto batas la flamaĵon de la torĉo en lian vizaĝon kun tia forto, ke tiu dorse falegas en la malluman profundon.

Dume la ceteraj turkoj, puŝante unu la alian, hurlante *Allahu Akbar* penetras pene lukte sub la pordega volbo.

– Ponton supren! – krias Dobó.

Lian voĉon superbruas la salvo de la fusilistoj.

– Ne eblas suprentiri ĝin! – kriegas la pordisto.

Videblas, ke ĝi estas plenplena de turkoj.

En tiu momento alvenas Gregorio. Li forkaptas la torĉon el la mano de gardisto kaj trabatas al si vojon al bombokanono.

En la sekva minuto, sputante flamojn, ektondras la kanono kaj balaas vojon inter la turkoj svarmantaj sur la ponto.

La ponto knarante kaj grincante leviĝas pere de pulioj ĉarumrade grandaj. Ankaŭ la turkojn ĝi kunlevas.

Ĉi-flanke falegas la stangoj de la falkrado, transe la ponto suprenklapiĝas.

Ĉirkaŭ kvindek turkoj restis en la pordega interspaco. Ili furioze turniĝadas, hakadas en ĉiuj direktoj, dum amase mortfalas sekve de pafoj kaj lancopikoj.

Post kelkaj minutoj restas stertoranta kaj konvulsianta hommonteto sub la malluma pordega volbo.

Dobó jam staras antaŭ la pordego, sur la placo.

Ĉe la torĉolumo viciĝas antaŭ li dudek husaroj kun deprenitaj ĉapoj.

Larĝŝultra hometo elpaŝas kaj stariĝas antaŭ Dobó.

– Permesu al mi raporti – li diras anhelante –, mi alvenis.

– Filo Luko! – respondas Dobó emociite. – Vi meritas ĉenojn sur la piedojn, vagma bubaĉo! Oran ĉenon sur vian kolon, mia brava, bona soldato!

Kaj li ĉirkaŭbrakas, vangokisas sian soldaton.

– Kiel vi sukcesis enveni?

– Ni devis atendi, s-ro kapitano, dum ni povis morthaki tiom da turkoj, por ke ni ĉiuj havu turbanojn kaj mantelojn. Ni eliradis embuski el Szarvaskó kaj hodiaŭ vespere jam mankis nur du turbanoj. Varsányi pruntis al mi sian fajfilon. Kaj ni povus enveni glate-pace, se sur la placo troviĝus rajdistaro. Sed la piedsoldatoj eksnufis, ke ne al ili ni apartenas kaj atakis nin.

– Kiuj mankas?

La soldatoj rigardis sin reciproke. Ĉe la nokta helo estis prilumataj nur iliaj duonvizaĝoj. Ĉiuj sangis. Sur vestaĵoj, ĉevaloj egale ruĝis sango.

– Gabrielo – aŭdiĝis mallaŭte la nomo.

– Bicskei – aŭdiĝis alia.

– Balkányi...

– Geoĉjo Soós...

La okuloj de Dobó haltis sur knabinhara junuleto, kiu staris retiriĝinta en la vico kaŝante sian vizaĝon apud la kolo de sia ĉevalo.

– Blazio! – li alkriis lin frapite. – Ĉu vi?

La knabo elpaŝis. Fleksis sian genuon. Metis sian sangogutan sabron tenatan per ambaŭ manoj antaŭ la piedojn de Dobó kaj klinis senvorte la kapon.

Li estis Blazio Balogh, lia plej malgranda paĝio.

17

El la direkto de la staloj aŭdiĝas nematura, mallarĝa kokeriketo, tuj poste larĝa kokeriku-u-u. La nigran ĉielon apartigas oriente palgriza rubando disde la montetoj.

Mateniĝas.

Kvazaŭ terbuloj moviĝus sube. En larĝa malproksimeco estiĝas obtuza klakado. Kvazaŭ nigraj ondoj, la surfaco de la tero moviĝetus, la klakado, muĝado fariĝas ĉiam pli laŭta. Jam fojfojaj sonorilet-tintoj miksiĝas en la klakadon, re-adaj mallaŭtaj fajfoj. La griza rubando sur la subaĵo de la ĉiellimo iĝas ĉiam pli larĝa, la nigraĵo sur la firmamento ŝanĝiĝas iom post iom en diafanan vualon.

Sube jam videblas la flirtiĝo de standardoj. Konturiĝas aregoj da turbanoj, ĉielen levitaj, maldikaj eskaloj, kiuj ŝanceliĝe proksimiĝas al la fortikaĵo.

La orienta ĉielo rapide heliĝas. La lokon de la grizaĵo okupas rozkoloraĵo kaj el la disiĝanta, malvarma krepusko konturiĝas la sentegmentaj turoj kaj detruitaj muroj de la fortikaĵo.

– Sinjoro – ekparolis Bornemissza.

Kaj li metis la manon sur la ŝultron de Dobó.

Tiu alarmite vekigis.

– Ĉu estas vi, Gregorio?

Li rigardis suben al la ondantaj, turkaj amasoj.

– Sonigu vekigon!

La bastionkorno eksonoris. Ok kornoj tuj respondis. Armiloj ekklakis. Paŝbruoj kaj voĉoj ekaŭdiĝis samtempe ĉiuflanke. Ankaŭ la fosoj de la

fuorto reviviĝis. Sur la bastionoj kaj rundvojoj viciĝis soldatoj.

Dobó saltis sur ĉevalon kaj ĉe la krepuska helo esploris, en kiuj partoj kaj lokoj staras la turkaj brigadoj.

En la palaca flanko ili staris plej multnombre.

– Apenaŭ ili kurrampas sur la murojn, ĵetu malsupren brulpilkojn! – ordonis ĉie Dobó.

Paĝio Kristoforo trafis la kapitanon sur la foirplaco.

Li sidis sur griza, turka ĉevaleto kaj estis envolvita en malhelblua, varma palto.

– Sinjoro – li demandis –, ĉu mi elportu la kirason?

– Ne – respondis Dobó –, tuj mi eniros.

Sed li ne eniris. Dum la heleco de minuto al minuto pliiĝis, li galopis de unu bastiono al la alia por vidi, kio prepariĝas.

– Pafu nur en homdenson! – li instrukiis al la kanonistoj. – Nun plej gravas la brulpilkoj kaj lancoj.

Poste aldone li kriis:

– Ne paŝu sur la murojn, antaŭ ol la turkoj elpafas el siaj kanonoj!

La brulpilkoj staris en altaj piramidoj proksime al la murbreĉoj. Ili pretiĝis dum semajnoj. Gregorio Bornemissza metigis en ilin ankaŭ internan ŝargon. Tiel ili fariĝis duoble detruaj. Unuafoje ili eksplodas, kiam oni forĵetas ilin; duafoje, kiam elfalas iliaj kernoĵoj. Poste dum minutoj disĵetiĝas el ili grandaj, brulantaj, blankaj fajreroj kaj kies vestaĵon, vizaĝon ili tuŝas, tiu saltadas kiel freneza.

La turkoj ne povis tiajn fabriki.

Paĝio Kristoforo atendis sian sinjoron dum kelka tempo antaŭ la palaca pordo, sed kiam li vidis, ke tiu ĉiam pli rapide galopas de unu bastiono al la alia, li eniris la ĉambregon, elportis kaj metis sur sian ĉevalon la brustoplaton, brak- kaj gamboŝirmilojn, subakseligis la kaskon kaj ĉe la angulturo li venis renkonte al Dobó.

Tiu ne deĉevaliĝinte metis sur sin la armaĵojn. Sidante en selo Kristoforo transdonis la brustokirason, la brakŝirmilojn, fergantojn. Poste li desaltis kaj fiksrimenis la gamboŝirmilojn sur sia sinjoro. Fine li etendis al li la oritan kaskon.

– La alian elportu – ordonis Dobó –, la ŝtalan.

En tiu tempo jam tiom helis, ke klare videblis la turkaj trupunuoj. Sub la muroj, en la tranĉeoj ondadis miloj da turbanoj kaj kaskoj. Sed ili ankoraŭ staris. Atendis la signalon, por komenci la sturmon.

Oni devis ne longe atendi. Apenaŭ tiom heliĝis, ke komencis vidiĝi la rompitaĵoj murzonoj, la elstarantaj ŝtonoj kaj trabovicoj, eksonis la devota, preĝalvoka ĉanto de la muezinoj, samtempe el cent lokoj ĉirkaŭ la fortikaĵo.

La giganta tendaro falis kun disaŭdiĝanta bruo survizaĝen kaj releviĝis surgenuen.

Simile al proksimiĝanta tempesto la granda tendaro pagana murmuris la preĝon:

– Alaho... nia profeto Mahometo... kuraĝigu niajn korojn... Disetendu viajn nevenkeblajn brakojn... Ŝtopu la gorĝojn de iliaj fajrosputaj armiloj... Ŝanĝu en hundojn la frenezajn nekredantojn, por ke ili ŝirmordadu unu la aliajn... Sendu kirloventojn al ilia tero, por ke iliaj okuloj pleniĝu per polvo kaj ili batiĝu al tero... Frakasu la ostojn de iliaj kruroj, por ke ili ne povu stari antaŭ ni... Hontigu ilin, nia glora profeto, por ke ni povu brili super ili kaj via lando eterne prosperu!

Kaj en ĉi tiu momento kun laŭta klakado ili saltleviĝas.

– *Bismillah!*³⁶

Samtempe ektondras la turkaj kanonoj kaj fusiloj. La muroj de la fortikaĵo ektemegas, ŝtopaĵoj displitiĝas pro la amasego da eksplodantaj kanonkugloj. Sur la palisparapetojn de la bastionoj pluvege faladas sagoj kaj fusilkugloj. La aero saturiĝas per pulvodorado. En la ter- kaj ĉielskuajn tondrojn enmiksiĝas la bruego de tamburoj, kornoj, klarionoj, Alah-hurloj de centmilo da turkoj.

El la tranĉeoj elsaltadas akridamase *asaboj*, janiĉaroj, *delianoj*, *ĝebeĝioj* kaj ĉiaspecaj piedsoldatoj. Arbaroj da sturmeskaloj flugas al la detruitaj muroj kaj bastionoj kaj el post la eskaloj siblas laŭ altaj trajektorioj ventegoj da sagoj al la muroj.

Kaj kriĉe-obtuze sonegas la turka, tendara orkestro.

Sed ankaŭ de supre torentas la respondo. La malsupren direktitaj kanonoj vomas flamojn, feraĵerojn, plumberojn kaj vitrerojn tien, kie plej dense tumultas turkoj. Centoj kovriĝas per sango, ŝanceliĝas kaj faladas. Sed novaj centoj impetas sammomente super la falintoj.

Sulfura odoraĉo disvastiĝadas en kirliĝantaj nuboj ankaŭ en la fortikaĵo.

Sturmeskaloj frapiĝadas kontraŭ ŝtonon, feron, trabon kaj kvazaŭ kurante leviĝas supren amasegoj sur la muroj. Kun ŝildoj super la kapoj. Hoklanco en unu mano, kruce metita kurba glavo en la buŝo.

Dudek sep turkaj standardoj flirtas-flagras, kondukas la taĉmentojn sur la eskaloj supren malantaŭ la palacoj, tra la detruitejoj.

– *Allahu akbar! La ilaha ill Allah! Ja kerim! Ja rahim! Ja fettah!*³⁷ – tempestas senĉese la fanatikaj hurloj.

³⁶ En la nomo de Dio! (turke)

³⁷ Alaho estas la plej majesta! Ne estas dio krom Dio! Li estas favorkora, indulgema, malfermanto de ĉiuj vojoj.

– Muren! Muren! – aŭdiĝas de ĉiuj flankoj.

Kaj la muroj kovriĝas per homsvarmoj. Nun vere densiĝas la bombofalado. Per nuraj manoj oni ĵetas suben la siblantajn, poste flagrantajn kaj fine dispafiĝantajn grenadojn. Miriadoj da falantaj-tondrantaj-kraketantaj fulmoj. Vokoj, kriegoj, fumo, pafoknaloj, sulfuroodoro. Sur la ferhokoj de la eskaloj frapiĝadas hakiloj, toporoj, pioĉoj. Sur iuj eskaloj kroĉiĝas eĉ dudek homoj, kiam ili rompiĝas. Frakasante unu la aliajn ili falegas en la profun- don disbatante stratojn inter la sube tumultantoj. Sed post minuto anstataŭ ili ŝoviĝas novaj ondoj da armitaj amasoj kaj apud la jam kroĉitaj eskaloj leviĝas novaj.

– *Allah!*

Sur la angulbastiono, kies nomo depost hieraŭ vespere estas bastiono Bolyky, licenciulo Gregorio kaj Zoltay disponadas.

La ŝtormo de la sieĝo tie pli laŭte muĝas ol ĉe la aliaj tri detruoj. Ĉar la rompaĵo estas pli granda. Ankaŭ la suprenstrebantoj estas pli multope.

La bomboj forbatas centojn da grimpantoj, ankaŭ deflanke oni pafas ilin. Sed nenia vivo estas kara por la turkoj, kiam da ili estas tiel multege. Se nur almenaŭ dek homoj povus enpenetri! Spure de ili enŝprucus tuta armeo puŝante sin kiel giganta riverego.

Sekve „homoj bezonatas sur la digo”!

La bomboj jam de unu horo rebatas senĉese la suprengrimpantojn, sed ĉiam restas eskaloj kaj homoj sur la eskaloj, kaj apenaŭ la unua granda eskalo fiksiĝas sur ŝtono, oni pludonadas unu al aliaj la pli malgrandajn, por kroĉi ilin sur la supraj parapetoj.

– Forkaptu la eskalojn! – krias Gregorio.

Kaj je granda konsterniĝo de la turkoj oni tute ne rompas la eskalojn, sed apenaŭ ili estas apogitaj, oni supre kaptas kaj suprentiras ilin.

Jam ĉirkaŭ kvin eskaloj estas forrabitaj, kiam iu en latuno vestita turko suprenkroĉas la sian kaj tuj pezigas sin sur ĝi.

– Tiru ĝin! – krias Gregorio.

Kaj li puŝas la finon de sia lanco inter la rungojn de la eskalo. Li streĉas ĝin.

– Helpu!

La eskalo ekpendas ponte disde la muro. Sur ĝia fino pendolas la latun-vestito. Kun franĝa, longa lanco en la mano. Sed apenaŭ li leviĝas en la aeron, li lasas elfali la ŝildon kaj la lancon kaj per ambaŭ manoj li kroĉas sin sur la malsupra rungo.

Li pendas en la aero.

Sube la amaso blekas.

Gregorio volus entiri la turkon. Sed li ne havas tempon por tio. *Asabo* en

feltoĉapo glitas rapidege sur alia, mallonga eskalo, li devas senpovigi ĉi tiun.

– Deturnu lin suben! – li krias al la kvar soldatoj tiregantaj la eskalon.

Kaj li kaptas sian lancon: pikas ĝin en la ŝultron de la *asabo*. Tiu ŝanceliĝas por momento, dum kiu lia sango traruĝigas lian brakon. Li falegas dorsen, puŝante kun si eble dek el la supreniĝantoj.

Dume la soldatoj obeas la konsilon: forturnas la eskalon. La latunkirasa turko devas elekti inter elartikiĝo de la brakoj aŭ dudek-klafta flugado en la aero.

Ĉi lastan li elektas.

Turka tamburisto, kiu frapas bulforman tamburon malsupre, ĉirkaŭ dek klaftojn for de la muro, ricevas la latunulon ĝuste sur la kapon kaj sterniĝas kun li morta inter la kadavroj.

Sed kiometas ili inter miloj kaj miloj?!

Krokodilleda ŝildo kure leviĝas supren. Sub ĝi ne videblas homo. Sur la glata ŝildo forglitas la lancopinto. La ruza turko certe kroĉis la ŝildomezon sur la kaskopinton. De kie ajn oni pikas ĝin, la ŝildo forkliniĝas kaj la lancoj pikas nuran aeron.

Gregorio subite alsaltas.

– Jen kiel oni devas fari!

Li antaŭenturnas la fuston de la lanco kaj krakfrapas per ĝi la krokodil-ŝildulon. La turko transkapiĝe falegas.

Kaj dume senĉese aŭdiĝas hurlado:

– *Allahu akbar! Ja kerim! Ja fettah!*

De tempo al tempo ankaŭ hungaraj vortoj:

– Cedu la fortikaĵon!

– Jen al vi! – respondas Zoltay.

Per terura pioĉbatego li traboras ŝildon, kaskon kaj kranion.

Li laboras nur per pioĉo en la alia flanko de la murrompaĵo.

La muro kovras lin ĝistalie. La laboron per lanco li cedis al siaj homoj. Li mem staras super trabomuro, kie facile al kroĉeblas eskaloj kaj kie fiksiĝas eskaloj apud eskaloj kaj dense svarmas supren amasoj da armitoj.

Li igis rompi kelkajn eskalojn, sed poste li laŭte ekkrias:

– Nur sur la kapojn, knaboj!

Li mem stariĝas fronte, por akcepti persone la alvenantojn. Lia kiraso estas el ŝtalo. La fusto de lia pioĉo longas, kiel bastono.

– Venu, nu venu, vi fumumita, ho kiel mi ŝatas vian bovsimilan muzelon! – li instigas nigravizaĝan saracanon, kiu glitgrimpas supren kun rotanga, malpeza rondŝildo kaj el post ĝi elbriligas sian okulblankon.

Apenaŭ li atingas unu klafton proksime, li plupasas bule kaŭriĝinte. Li

havas la intencon, disrisortiĝinte sur la supra rungo de la eskalo puŝi sian lancon en Zoltay kaj salti sur la supron.

La paŝaeco de Eger estas promesita al tiu, kiu unua fiksos la flagon de triumfo sur la muron. Tion scias ankaŭ la fortikaĵanoj.

Do saltadas supren la nigra pantero. Spure al li longbarba *gebeĝio* kriegas kun ŝaŭmanta buŝo *Allahu akbar*. Malantaŭe en lia ledzono ĉevalvosta flago kun mallonga tenilo. Li krucmetas sian larĝan, malingitan jataganon en la buŝo.

– *Allahu akbar! Ja kerim! Ja rahim!*³⁸

Per subita movo Zoltay mallevas la vizieron. Ja ĝustatempe. La sara-ceno, risorte rektiĝinte, puŝas sian lancon kaj rompas ties pinton je la mentonrimena buko de la kasko.

En la sama momento frapiĝas sur lin la pioĉo kaj disklinita de la eskalo li falegas kaposube en la abismon.

Tuj aperas la barbulo, kiu venis sub li. Tiu havas ne lancon, sed pikilan draŝilmadzon en la mano. La madzokapo pendas sur ĉeno.

Zoltay forkaptas sian kapon antaŭ la frapo kaj tiel li rebatas per la pioĉo, ke la mano de la barbohava turko rompiĝas, forpendiĝas.

La turko blekas kelkan tempon pendante per unu mano, sed la dua bato mutigas lin. Kaj la korpulenta korpo ruliĝas, forbalaante vivulojn, sur la eskalo malsupren.

– Mi honorsalutas vian profeton! – postkrias lin Zoltay.

Interparoli kun turkoj estas malpermesite, sed en la ardo de la lukto Zoltay forgesas pri tio. Li ja ne povas batali sen akompani ĉiun frapon per kelkaj parolturnoj. Liaj alkrioj grave pliiĝas la fervoron de la apude luktantoj.

– Frapu, filo Johano – li krias al iu apud si –, frapu, kvazaŭ vi estus fajra tondrofulmo! Frap! Ankaŭ ĉi tiu ne fariĝos paŝao de Eger!

– Kial vi gapegas?! – li alkrias iun alian. – Ĉu vi eble atendas, ke li kisu vin? Frap! Ke Dio ne pardonu lin!

Kaj kiam refoje trudas sin antaŭ lin maŝkirasa, turbana *garibo*, li krias al la kunbatalantoj:

– Jen tiel dorlotu ilin!

Li trafis lian kolon. La sango elŝprucis sur la muron kaj la *garibo*, turniĝante flanken, kraŝas en la senfundon.

– Falu funden de la infero! – li krias post li.

La suno jam leviĝis, kvankam ĝi apenaŭ distingeblas pro la fumego de la fortikaĵaj kanonoj. Fojfoje, kiam vento forkaptas la fumon, videblas, kiel

³⁸ Alaho plej majesta! Favorkora! Indulgema!

inundas la malamika armeo kun multaj blindige brilegaj ŝtalŝildoj, orglobaj standardoj.

Dobó hastas surĉevale de unu sturmata loko al alia. Jen ĉi tie li celas kanonon, jen tie li ordonas sekurporti la vunditojn. Li urĝas ŝargi, instigas pafi. Portigas lancojn, pikstangojn tien, kie armiloj tro konsumiĝas. Li kur-aĝiĝas, laŭdas, riproĉas. Senĉese li kurigas ambaŭ siajn paĝiojn al la rezerva armitaro, pri kiu Mekcsey disponas en la ĉeffortikaĵo.

– Cent homojn al la palacoj! Kvindek sur la Bolyky-bastionon! Kvindek al la Malnova pordego!

Kaj la taĉmentoj estas interŝanĝataj post duonhora batalo. Ŝvitoplene, sangoŝmirite, je pulvo odoraĉante, sed entuziasmigite ili retiriĝas antaŭ la du drinkejojn de la fortikaĵo, fanfarone rakontante al la batalontoj siajn heroaĵojn.

Kaj ĉi tiuj ardas de bataldezirego. Mekcsey mem incitiĝas kaŝe, ke li ne povas batali kaj devas staraĉi en la fortikaĵkorto kaj kontentiĝi per tio, ke laŭ mesaĝoj de Dobó li surmurigas taĉmentojn kaj animas ilin per instigaj vortoj:

– La sorto de la patrujo decidiĝas per viaj armiloj!

Kaj ili sinurĝe rapidas kun ruĝiĝintaj vangoj en la inferan tempeston.

La eskaloj iĝas jam glitigaj pro la sango. La muroj ĉirkaŭe koloriĝas purpuraj. Sube la mortintoj, agoniantoj formas konvulsiantajn, sangajn amasegojn. Sed ĉiam pli novaj miloj surgrimpas hurlante la kadavromontojn. Kriĉas kornoj, pum-pum-as tamburoj, ore fendas tendaraj orkestroj kaj en la senĉesan Alah-hurladon enmiksiĝas supre batalkriegoj, sube ordonaj vokegoj de disrajdantaj *jasauĵoj*, kanontondrado, fusilkrakado, grenadeksplodoj, ĉevalhenoj, stertoroj de mortantoj, knarado de eskaloj.

– Venu, paŝao, venu! Puf!...

– Diru al via profeto, ke tion hakis Zoltay! – elaŭdiĝas el la fumnubo de la bastiono alia voko.

Bestecaj hurloj kaj bombokanona muĝado superbruas la kriojn de la bravulo. Sed la rapida turniĝado de la ĉirkaŭ li svarmantaj figuroj kaj armiloj vidigas, ke la personaro tie persiste laboras.

Fumo malheligas la sunon. Ankaŭ la fuorto dronas en nura kirliĝanta fumo, el kiu fojfoje elbriladas ŝtalkaskaj, turkaj trupoj, elbruniĝadas vicoj da pulvotransportaj kameloj, ekflirtadas standardoj kaj *bonĉokoj*.

Ĉe la bastiono de la Malnova pordego interŝanĝiĝas plej multe da homoj. Tie direktas Gasparo Petó. La turkoj rompadas la muron kaj palisparapeton per kvintalaj ŝtonaj kuglegoj ĉiufoje, kiam la arbaro de eskaloj maldensiĝas.

La ŝtopitan pordegon detruas turkoj per hokstangoj kaj pikfosiloj kaj tri

el la falkradaj stangoj ili jam elrompis.

– Kvincent! – krias Dobó al Kristoforo.

Kaj Kristoforo forturnas sian ĉevalon: galopas por kvincent homoj.

Tio estas preskaŭ la tuta rezervo.

Mecsey bukas sian kaskon kaj kun dek aliaj li kuras al la Malnova pordego. Se tie oni rompeniros, taskos al li antaŭ ĉio defendi la internon de la fortikaĵo.

Sube ĉe la pordego kaj sur la pordega bastiono mortfaladas turkoj kiel muŝoj. Vigle pafadante el la turo niaj fusilistoj paffaligas amasojn da ili. Foje kaj refoje aŭdiĝadas la tondra voĉo de Gasparo Petó:

– Post mi, knaboj! Ne retrocedu! Per ambaŭ manoj, mil diabloj!

Kaj li mem, ĝistalie sangobanite, frapegas, hakas, jen per glavo, jen per pioĉo, jen per piklanco.

– Jesuo helpu!

– Alaho! Alaho!

Kiam maldensiĝas la eskaluloj, aŭdiĝas „akvon! akvon” de ĉiuj flankoj.

Virinoj alportadas akvon sub la bastionoj en kruĉoj kaj lignaj pokaloj.

Petó kaptas lignan pokalon. Suprenpuŝas la vizieron. Li trinkas tiel avide, ke ambaŭflanke riverete defluas akvo sur lian kirason; ĝi plugutadas elen el la kiraso tra la kubutoj, genuoj kaj kalkanoj kvazaŭ el putotubo. Sed li ne atentis tion pro sia ardo kaj soifego.

Apenaŭ li apartigas la pokalon de sia buŝo, li vidas, ke turko saltas sur la mursupron. En unu mano li tenas ĉevalvostan flagon. Per la alia li dishakadas freneze. Kaj post li aperas alia turka kapo kaj tria...

– Hej, malbenitaj idaĉoj de viaj patroj!

Kaj li ektiras enen la turkon per ties kruro. Li ruliĝas kun li malsupren sur la ŝtuparo. Li kunpremas lian kolon, kiam ili interkroĉiĝas. Batas lian vizaĝon per sia fergantita mano.

Poste li saltleviĝas. Postlasas la duone sufokitan turkon al la sube laborantaj kamparanoj. Rapidigas returne sur la bastionon. Li hakas, tranĉas rapidmane, eĉ sesflanke preskaŭ samtempe.

– *Allahu akbar!*

Turkoj formikas sur la rundvojo. Iu *akingio* jam atingis eĉ la turon. Li fiksas sian flagon. Sube ŝtormaj triumfokriegoj bonvenigas ĝin. Jesuo, helpu! Ĝi ne flirtas tie eĉ du minutojn. La alkurantaj bravuloj hakfrapadas la kapojn de la pluaj suprenstrebantoj. Rustkaska hungara soldato jam kate grimpas post la *akingio* sur la turkaskon. Li apogas la piedojn sur ŝtono kaj svingas teruran baton sur lin. Li fortranĉas la brakon de la flagportanta turko tiel, ke ĝi salte falas kune kun la flago.

– Kiu vi estas? – kriegas Petó jubile sub la muro.

La bravulo returnas sin kaj fiere rekrias:

– Antono Komlósi.

El la flanko de la palacoj rajde galopas la malgranda paĝio Blazio. Lia duonkapo estas bandaĝita per blanka tuko. Tamen li flugrajddadas, kvazaŭ nenio malbona estus al li okazinta.

– Ĉe la palaco elrompiĝis la ŝtopaĵo! – li krias.

– Cent homojn! – ordonas Dobó.

Kaj dum la knabo forrajdas al Mekksey, li galopas brustokline al la palacoj.

Turkoj elŝiris la ŝtopaĵon. Traboj elstaras el la breĉo kiel ripoj el fiŝfritaĵo. Tiel dense grimpas turkoj sur la muroj kiel ruĝaj formikoj. Dobó saltas sur la mursupron. Dishakas la kapon de turko. Unu li repuŝas per la piedo. Kaj malsuprenvokas:

– Elpuŝu la trabojn!

Ĝis nun oni ĉiufoje entiris ilin per hokstangoj. Laŭ la ordono de Dobó ili puŝadas ilin samtakte eksteren.

La traboj balaas kun si kaj kun la eskaloj ululantajn paganojn. Post ili faŭkas larĝa truo sur la muro. Estas egale: ĉu unu-du klaftojn pli supre aŭ malsupre, oni devas lukti kontraŭ la suprenpuŝiĝantoj.

Kuglo forbatas la hungaran flagon de la muro. Ĝi falas inter la turkojn. Jen, por kio taŭgas larĝa murbreĉo: hungara soldato elsaltas tra ĝi, surprizfrapas turkon kaj kaptas al si la flagon, antaŭ ol oni povus alhaki lin.

– Mi vidas vin, filo, Ladislao Török! – krias ĝoje Dobó.

Kanonkuglo frapiĝas en la muron kaj plenŝutas per ŝtonpulvoro la okulojn de la soldatoj. Antaŭ Dobó renversiĝas denskorpa hometo almure kaj sterniĝas laŭlonge de la muro. La kasko falas de lia kapo kaj ruliĝas al la piedoj de Dobó.

Dobó purviŝas la okulojn kaj rigardas lin: Andreo kuŝas tie, la urbestro de Eger. Kramfe li premas la glavon en la mano. Kaj el lia kolo, kvazaŭ malligita koltuko, kurfluas sango laŭ longa linio.

Sed jen, ambaŭ liaj paĝioj kure proksimiĝas de la Malnova pordego. Ekrigardo al la turo de la Malnova pordego: ĉevalvosta turka flago flirtas supre, unu, du, kvin, jam dek.

Kaj fusiloj knaladas internen tra la fendoj de la turo. Kaj ekstere janiĉaroj surgrimpas la turon. Unu portas grandan, flirtantan, ruĝan standardon inter la dentoj, por fiksi ĝin sur la turpinton.

En la interno de la fortikaĵo tramuĝas teruro. Ĉirkaŭ la fortikaĵo la triumfokriegoj de cent mil gorĝoj tremigas la aeron.

– *Allah! Ja kerim!*

La hungaraj vizaĝoj paliĝas.

Dobó saltas sur ĉevalon kaj galopas al la Preĝeja bastiono. Li direktas la kanonojn al la mezo de la turo. Kaj dum la janiĉaroj, jam ĉirkaŭ tricent, triumfe svarmas sur la turo, li pafigas samtempe tri kanonojn.

La turo ekŝanceliĝas. Kaj kun obtuza eksplodo renversiĝas. Kalkopulvoro nube suprenkiriĝas el la ruinoj kaj el la ŝtonoj ekfluas turka sango, simile al vinbersuko el rikolta premilo.

La aliaj, kiuj tumultis internen tra la pordego kaj sur la muroj, terurite turnas la dorson pro ĉi tiu ĉielskua tertremo kaj ne pasas pli ol kvin minutoj, la sturmeskaloj estas malplenaj.

Nura sanga amaso de mortintoj kaj agoniantoj kovras la teron ene kaj ekstere de la Malnova pordego kaj en ties ĉirkaŭaĵo.

Nemulte antaŭ tagmezo plurloke iom-post-iom ĉesas la batalo. Milope diskuŝas fulgo- kaj sangoŝmiritaj turkoj mortintaj aŭ vunditaj sub la muroj kaj la aero tremas de la senĉese aŭdiĝantaj vokoj *ej va!*³⁹ kaj *meded*⁴⁰ de la vunditoj. Simile al ŝafblekado.

La *jasauĵoj* tiutage ne plu havas povon peli la soldataron al pluaj sturmoj.

Sed ankaŭ la placo de la fortikaĵo estas plena de vunditoj.

Ĉiuj barbiroj kaj multaj virinoj diligentas kun akvopelvoĵoj, lintolaĵoj, ĉarpioj, aluno kaj arnikaĵo super la vunditoj.

Kies gamboj aŭ brakoj estas pafvunditaj, tiuj enlaboriĝas unuaj. Oni bandaĝas ilin laŭeble. La ceteraj devas portempe kontentiĝi per tio, ke la virinoj purlavas iliajn vundojn. La plimulto silente toleras la suferojn kaj pacience atendas sian vicon. Sed kelkaj amare lamentas.

– Dio mia, Dio mia – plendas juna soldato, fusilisto el Eger, nomata Miĥaelo Arany –, unu okulon mian oni forpafis.

Kaj li premas la brulrandan manikon de sia ĉemizo sur sian sangantan vizaĝon.

Petó sidas sur pajloseĝo kovrita per kampula drapmantelo inter la aliaj. Sur lia suro ruĝas tiel granda vundo, ke lia sango kunfluas en flakon sub la seĝo.

– Ne lamentu, Miĉjo! – li alkrias la soldaton. – Vivu prefere kun unu okulo en la fortikaĵo de Eger, ol kun du okuloj pendumu vin turkoj!

Kaj kun kunpremitaj lipoj li toleras, ke barbiro purlavu per arnikaĵo la teruran vundon sur lia kruro.

Kaj la mortintoj kuŝas jam vice ordigitaj antaŭ la preĝeja pordo. San-

³⁹ ho ve!

⁴⁰ helpu!

gokovritaj, ĉifitaj, fulgoŝmiritaj, senmovaj.

Dobó saltas de sia ĉevalo kaj demetas sian kaskon kaj laŭiras inter ili kun larmantaj okuloj.

Ankaŭ la urbestro de Eger kuŝas inter la mortintoj. Liaj grizaj haroj ruĝas de sango. Sur lia polvokovrita, nigra boto videblas la sangmakulo de pafo. Liaj du filoj genustaras apud li.

Parto de la soldatoj sidas fumŝmiritaj, ĉifitaj, ŝvitantaj, sangokovritaj sur la foirplaco. La du standardistoj ambaŭflanke.

Dobó ordonas al paĝio Blazio:

– Alportu la standardon de la urbo!

Kaj li deŝiras la bluan-ruĝan tolon de sur ĝia tenilo kaj sternas ĝin mortotuke sur la urbestron de Eger.

[...]

La okulojn de la demandanto inundis larmoj. Pala kaj kun larmoplenaj okuloj rigardis antaŭ sin.

La kapitano unutire malplenigis sian pokalon. Denove li ek-hm-hm-is. Poste reklininte sin en la apogseĝo kaj rigardante el la okulanguloj, mallaŭte li rimarkigis:

– Ĉu vi aŭdas, Johano Bornemissza! Vi tiel ne estas Johano, kiel mi ne estas Abrahamo. Kaj vi tiel ne estas la frato de Bornemissza, kiel mi ne estas tiu de la episkopo de Eger. Virino vi estas, fratineto, kian ajn dolmanon vi surhavas; miajn okulojn vi ne trompos!

– Pardonu min, s-ro Szalkay – respondis la alveninto stariĝinte. – Mi prisilentis tion antaŭ via moŝto ne pro tio, ke mi volus vin erarigi, sed por ke vi ne retenu min sur mia vojo. Mi estas la edzino de Gregorio Bornemissza.

Szalkay stariĝis kaj klinis sin.

– Mi staras je via servo, junsinjorina moŝto.

– Dankon. Do nun mi jam rakontos, kial mi venis. Mia bona edzo posedas turkan talismanon. Tiu, kiu ĝin havis, ŝtelis nian fileton kaj kunprenis lin al sub Eger. Kredante, ke la talismano troviĝas ĉe mia s-ro edzo. Rigardu, jen ĝi estas.

Kaj la virino etendis la manon sub sian bluzon kaj elprenis belegan, ŝnurpendan, turkan ringon.

Szalkay gapis al la ringo.

Ŝi daŭrigis:

– Dum kelka tempo mi serĉigis la turkon per soldatoj en Sopron kaj ĉar ili ne trovis lin, mi mem venis post lin. Turkoj estas superstiĉaj. Talismanoj pli gravas por ili ol io ajn. Se li povos, li mortigos mian edzon. Se li ne po-

vos, li mortigos mian filon. Nu, se la ringo troviĝus ĉe mia edzo, ili ja povus eble intertrakti. Mia edzo cedus ĝin al li kaj la turko enlasus la infanon en la fortikaĵon.

Szalkay skuis la kapon:

– Kara junsinjorina moŝto: tiuj en Eger ĵuris, ke ili interŝanĝos eĉ ne unu vorton kun la turkoj, nenian mesaĝon ili akceptos de ili. Kaj kiu intertraktos kun la turkoj aŭ interŝanĝos mesaĝojn, ĉu oficiro, ĉu ordinarulo, tiu pagos per sia morto.

Gratante la kapon li daŭrigis:

– Se almenaŭ hieraŭ vi estus alveninta, junsinjorina moŝto. Sed Dio scias, ĉu tiuj sukcesis eniri.

La kapitano pensis pri Luko Nagy.

– Nun jam estas egale – respondis la virino. – Mi devas eniri, ankoraŭ hodiaŭ! Mi ne ĵuris ne paroli kun la turkoj.

– Sed kiel vi pensas? Vi du ja ne volas hake-tranĉe trabarakti la turkan tendaron?

– Ni iros en kaŝvestoj.

– Se vi iros en kaŝvestoj, oni mortpafos vin el la fortikaĵo.

– Ni atentige suprenkrios.

– Tiam vi falos eksterfortikaĵe en turkajn manojn. La pordegoj estas ŝtope blokitaĵ. Povas esti, ke hodiaŭ ili jam estas ŝtone masonfermitaj.

– Kaj kiel eniros la sendito de Dobó post kvin tagoj?

– Riske de sia vivo. Li certe scias, ĉe kiu pordego lin oni atendas. Li havas signalfajfilon, pasvorton. Li komprenas la turkan. Vi devos ĝisatendi lin, se vi ne volas nepre kuri en danĝeron.

– Kaj se mi iros kun blanka tuko? Se mi diros, ke mi serĉas oficiron nomatan Jumurĝak?

– Via moŝto estas bela kaj juna. Se oni rigardos vin knabo, vi same valorus por ili, kiel se ili rekonus vin kiel virinon. La unua soldato, kiu kaptos vin, ligos vin en sia tendo.

– Sed se mi petos venigi la oficiron?

– Ducent mil homoj kunariĝis tie. Ne ĉiuj konas la oficirojn laŭnome. Ili eĉ ne estas samlingvanoj. Persoj, araboj, egiptoj, kurdoj, tataroj, serboj, albanoj, kroatoj, grekoj, armenoj – milspeca miksamaso. La oficirojn oni konas laŭnome nur en la propra brigado. Plie la nomoj ne estas iliaj propraj sed elpensitaĵ de iliaj soldatoj. Se ekzemple oficiro havas longan nazon, li povas esti Ahmedo aŭ Hasano, liaj soldatoj egale nomas lin inter si Nazegulo aŭ Elefanto. Se rufhara, tiam Sciuro aŭ Kupro. Se magra kaj longkrura, do Cikonio li nomiĝas. Kaj simile. Ĉiu havas nomon, per kiu korpe li estas plej facile rekonebla.

La virino lasis pendu la kapon.

– Do konsilu ion, kara s-ro Szalkay.

– Mia konsilo estas ĝisatendi enironon. Ĉu Nikolaon Vas, ĉu iun alian, via moŝto transdonos al li la ringon kaj tiu enigis ĝin en la fortikaĵon. Kaj tiam s-ro Bornemissza elpensos, kiel paroli kun la turko.

Tio estis vere saĝa konsilo. Sed ho ve, baraktanta patrino koro ne konas la vorton „baldaŭ”. Ĝi vidas nur la murdilon, kiu ŝvebas super ŝiaj amatoj. Ŝirme al ili nepras teni ŝildon laŭeble plej urĝe.

Eva dissternis la desegnon de la fortikaĵo kaj daŭre enprofundiĝis en ties observado.

– Kaj se la fortikaĵo estis konstruita ankoraŭ antaŭ la alveno de la hungaroj – ŝi argumentis levante la kapon –, nuntempuloj ne povas scii, kio subestas. Jen, ĉi tie estas la preĝejo kaj de tie disbranĉiĝas tri subteraj vojoj. Ĉi tiujn vere oni pafruiniĝis. Sed jen kvara vojo, ĉi tiu kondukas sub la nunan palacon kaj troviĝas malproksime de la ceteraj. Ĉi tiun oni ne povis trovi, kiam oni konstruis la Aleksandran bastionon. Aŭ oni konis ĝin aŭ ne. Kie estas ties enirejo, Nikolao?

Kaj ŝi ŝovis la folion antaŭ la junulon.

– Ĉe la brikoj – respondis la studento post unuminuta observado.

– Ĉu ekzistas tie tiaj fortoj? – ŝi demandis Szalkay.

– Ekzistas – jesis tiu. – Nord-oriente de la fortikaĵo.

La knabo legis la papavo-grajne etan skribon:

„Nord-okcidente briko. Plata, ronda ŝtono; dek paŝojn for de la juglandujo. Enirejo.”

– Ĉu troviĝas tie juglandujo? – demandis ree la virino.

– Mi ja ne memoras – malcertis Szalkay. – Dum mia vivo nur unufoje mi restadis tie, ankoraŭ dum la ofitado de Perényi.

– Kaj ĉu la briko estas malproksime de la fortikaĵo?

– Ne. Eble je kvaronhora marŝo.

– Sekve ankaŭ tie troviĝas turkoj.

– Certe troviĝas. Se ne aliaj, do akompanuloj: paŝtistoj kaj similaj.

– Ĉu via moŝto povus doni al ni iajn turkajn vestojn?

– Troviĝas kelkaj.

– Ĉu vi havas ankaŭ *delianan* mantelon?

– Ankaŭ tian, sed nur unu. Sed ĝi estas traŝirita.

– Mi kunkudros ĝin – respondis la virino. – Unufoje mi jam veturis vestita kiel *deliano*. Mi ne pensis, ke iam mi profitos de tio.

Ripozigante la frunton sur la mankavo ŝi meditis. Subite ŝi saltleviĝis.

– Ne – ŝi deklaris –, mi ne restos, eĉ ĝis mi kunkudros la mantelon. Jen tiel estos eĉ pli bone. Mi dankas vin por la afabla gastigo.

Kaj ŝi etendis la manon al la kapitano.
– Sed ĉu vi ne volas...
– Ni tuj ekvojos.
La kapitano stariĝis kaj forbaris la pordon.
– Mi ne povas permesi! Tiel blinde kontraŭkuri danĝeron... Eterne mi akuzus min pro tio.
Eva refalis en la seĝon.
– Prave vi parolas – ŝi suspiris. – Ni devos iri alimaniere. Ion ni devos elcerbumi, por ne kaptiĝi.
– Nu, jen prave – konsentis s-ro Blazio same sidiĝinte. – Se montriĝos eĉ nur ombro da eblo, mi lasos foriri vian moŝton.

[...]

La sekvan tagon, la kvaran de Oktobro la leviĝanta suno prilumis freŝe amasigitan digon ĉirkaŭ la fortikaĵo.

La profunda foso, kiu ĉirkaŭis norde la fortikaĵon, estis plurloke ŝtopita. Kio estis foso, nun fariĝis altaĵo.

La freŝe amasigitaj montetoj leviĝis kontraŭ la breĉoj. Sube fasĉinoj, falfolioj, faskigitaj vergoj, supre tero. Ĉi tiun laboron certe daŭrigos la turkoj tiel longe, ĝis la montetoj fariĝos kelkloke tiel altaj, ke oni povas kanone enpafi kaj ankaŭ enkuri sen eskaloj en la fortikaĵon.

Dobó observis la laborojn. Kun trankvila mieno li priokulis ilin de ĉiuj flankoj. Poste li sendis homon por kunvoki la oficirojn. Li invitis la kvar ĉefleŭtenantojn en la kavaliran salonon, krome veniĝis unu leŭtenanton, unu serĝenton, unu kaporalon kaj unu soldaton. Ankaŭ licenciulon Miĥaelo, la pan-disdoniston.

La tablo estis tegita per verda drapo. Sur ĝi staris krucifikso kaj du brulantaj kandeloj ambaŭflanke. En la salonangulo staris la ekzekutisto en ruĝa drapvesto. Apud li ardanta karbo en braĝujo. Blovilo en lia mano. Apud la braĝujo plumberoj kaj tenaĵoj.

Dobó estis vestita en nigra drapaĵo. Lian kaskopinton ornamis agloplumo. Antaŭ li kuŝis folio da pura papero.

– Kamaradoj – li diris kun serioza, preskaŭ malserena mieno. – Ni kunvenis por ekzameni la aferon de leŭtenanto Hegedüs kaj liaj kamaradoj. Iliaj agoj supozigas, ke ili fariĝis perfiduloj. Koscience ni juĝos ilin.

Li mansignis, ke oni alkonduku la malliberiĝitojn.

Gregorio stariĝis.

– Sinjoroj – li diris –, mi ne povas esti juĝisto en ĉi tiu afero. Mi estas ofendito rilate al la akuzato. Liberigu min de la tasko.

Ankaŭ Mekksey stariĝis.

– Mi povas esti nur atestanto – li anoncis. – Juĝisto kaj atestanto en unu persono neniu povas esti.

– Li estu atestanto – respondis la ĉetable sidantoj.

Gregorio foriris.

Mekksey eliris en la antaŭĉambron.

La gardistoj enkondukis Hegedŭs kaj tri liajn komplicojn. Kaj ankaŭ la turkon.

Hegedŭs estis pala. Liajn okulojn ĉirkaŭis bluaj ringoj. Li ne kuraĝis levi la okulojn.

Dobó restigis ene nur lin. La ceterajn li elsendis.

– Ni aŭdu! – li diris. – Kiel ni komprenu la enkondukon de la turkoj?

Hegedŭs kolektis siajn fortojn kaj kun interrompata voĉo senkulpigis sin:

– Mi volis nur logi ilin en la cisternon. Mi ne volis transdoni la fortikaĵon. La cisterno estas granda. Ni trovis mallarĝan enirejon al ĝi. Mi pensis, ke estos mia merito, se mi sola neniigos mil turkojn.

Dobó trankvile finaŭskultis lin. Ankaŭ la oficiroj demandis nenion. Kiam li ĉesis paroli, Dobó starigis lin flanken kaj ordonis voki unu post alia liajn taĉmentanojn.

– Ni povis fari nenion alian – konfesis la unua – ol kion la s-ro leŭtenanto ordonis. Ni devas obei, se oni ordonas al ni.

– Kion li ordonis?

– Li ordonis, ke ni postenu ĉe cisternorando, li enkondukos kelkajn turkojn.

– Kiel li diris, por kio?

– Por preparoli la transdonon de la fortikaĵo.

Dobó rigardis al la leŭtenanto.

Hegedŭs skuis la kapon.

– Malvero. Li mensogas!

– Ĉu mi? – rebatis ofendite la soldato. – Ĉu vi do ne diris, ke la turkoj promesas ĉion bonan? Kaj s-ro Dobó nenion esperigan, eĉ sieĝomonon li ne emas pagi.

– Li mensogas – ripetis Hegedŭs.

Oni enkondukis la alian taĉmentanon.

– Kial vi estis ĉe la akvorezervujo?

– Ni atendis turkojn – li malgaje respondis. – La s-ro leŭtenanto diris, ke la fortikaĵo falos pli-malpli frue en turkan manon, do pli bone, se koste de mono ol de sango. Ni certe mortos, se ni ne kapitulacos.

Dobó enkondukigis ankaŭ la trian soldaton.

– Mi nenion scias – balbutis tiu. – Mi nur estis komandita al la akvujo, sed mi ne scias, kial.

– Ĉu s-ro leŭtenanto Hegedüs ne diris, ke estus bone interkonsenti kun la turkoj?

– Jes ja, li diris.

– Kiam li menciis tion unuafoje?

– Vespere post la granda sturmo.

– Kaj kiel li diris tion?

– Nu, li diris tiel, hm..., kiel mi diru, li klarigis, ke ni estas malmultaj kaj tiuj multegaj kaj jen vidu, ankaŭ la aliajn fortikaĵojn oni ne povis defendi, kvankam tiam la turkoj militiris disparte.

– Ĉu pri sieĝosoldo menciis ion s-ro leŭtenanto Hegedüs?

– Li menciis. Li diris, ke ni devus ricevi duoblan soldon.

– Ĉu li diris ion pri la transdono de la fortikaĵo?

– Nu, kiel diri..., li certigis, ke la turkoj malgraŭ ĉio kaptos ĝin en la manon, do pli bone estas, se ili ankaŭ pagos ol ke ni lasu fortranĉi nian kolon.

– Kaj la taĉmentanoj kiel opiniis?

– Neniel. Ni nur babilis pri tio ĉe la fajro, kiam la turkoj transkriadis.

– Ĉu vi ne kriis respondon?

– Ne. Nur la s-ro leŭtenanto traktis nokte kun ili.

– Kiel ili interparolis?

– Tra fendo en la Malnova pordego. Li aliris kaj elparolis eĉ tri fojojn.

– Ĉu al turkoj?

– Al turkoj.

– Kaj kion li diris, kiam li revenis?

– Ke la turkoj lasos ĉiujn libere foriri, neniun ili tuŝos. Al tiuj de Kassa ili donos po dek dukatojn, kaj ke du paŝaoj sendos sigelitan leteron por konfirmi sian fidelecon al la promesoj.

– Kiom da taĉmentanoj aŭdis tion?

– Ĉirkaŭ dek.

– Kial vi ne anoncis tion al mi? Ĉu vi ne ĵuris, ke vi ne parolos pri kaptulaco?!

La soldato silentis.

Dobó daŭrigis:

– Ĉu ne estus via devo tuj raporti pri tiaj paroloj de la s-ro leŭtenanto?!

– Ni ne kuraĝis.

– Unuvorte: vi decidiĝis venigi la fortikaĵon en turkan manon. Kiuj konsentis pri tio?

La soldato diris ankoraŭ sep nomojn. Poste li senkulpigis sin:

– Ni, altestimata kapitana moŝto, ni ne intertraktis, ni nur obeis. Nur la s-ro leŭtenanto traktis kaj li ordonis.

La muro ekknaris pro alfrapiĝo de kanonkuglo. La kiraso pendigitaj sur stangoj ekklakis. De sur la muro falis tavoloj da stukajo sur la plankon.

Dobó rigardis al la juĝistoj:

– Ĉu iu havas demandon?

La juĝistoj sidis kvazaŭ ŝtonigitaj ĉe la tablo. Fine la juĝisto soldato ekparolis:

– Ĉu la dek taĉmentanoj konsentis pri tio, ke la fortikaĵo estu de la turkoj?

La soldato, pala, levis la ŝultrojn.

– Soldato povas voli nenion alian ol lia oficiro.

Pliaj demandoj ne estis.

– Restis ankoraŭ la turko – diris Dobó. – Enkonduku lin!

La turko trifoje klinis sin, antaŭ ol veni antaŭ la tablon. Tie li restis klinita. Kun brakoj kruce sur la brusto.

– Kiel vi nomiĝas? – demandis Dobó.

– Jusufo.

– Jusufo, tio estas hungare Jozefo. Staru rekta!

La turko rektigis sin. Li estis ĉirkaŭ tridekjara *akingio*. Dikkorpa, fort-muskola homo. Lia platigita nazo kaj la ruĝanta cikatro sur lia kapo atestis pri tio, ke li jam partoprenis batalojn.

Al la demandoj li respondis, ke dek jarojn li vivas en Hungario, kaj ke li troviĝis ĉe la muro, kiam Hegedüs elvokis tra la fendo: „He, turkoj! Kiu komprenas la hungaran?”

– Li mensogas – murmuris Hegedüs. – Ankaŭ Zoltay ĉiam parolas kun turkoj.

– Ĉu mi?! – ekgruntis Zoltay.

– Jes ja, vi parolis. Ĉiufoje, se oni sturmas, vi kriadas al ili.

Paliĝinta pro kolero saltleviĝis Zoltay el la seĝo.

– Mi petas ekzamenon kontraŭ mi – li diris. – Mi ne povas plusidi en la juĝista seĝo. Povas esti, ke mi eligas krion ĉiufoje, kiam mi batas. Sed tio estas nur sakroj. Tio ne estas kulpo! Kia kalumnio?!

Dobó kvietigis lin:

– Ni ĉiuj konas ĉi tiun kutimon vian kaj pro ĝi neniu riproĉas vin. Sed pro tio, ke kolero kaptis vin kontraŭ la akuzato, ni liberigos vin de la juĝado.

Zoltay klinis sin kaj eliris.

Dobó denove rigardis la turkon.

En fuŝa hungara li rakontis, ke Hegedüs parolis ĉe la Malnova pordego

kun agao, poste kun bejo Arslano. De la bejo li postulis garantie honorvorton kaj cent dukatojn. Poste li promesis enlasi nokte la tutan trupon en la fortikaĵon, la bejo nur ordonu fosi ĉe la pordego, kie oni kutimas frapi la kupran tamburegon. Li rakontis (li montris al Hegedüs), ke iun nokton li malsupreniris en la akvuĵon kaj trovis tunelon, kiu tamen estas ruinfalinta ĉe la pordego. Ĉe la enfalaĵo, super sia kapo li aŭdis soni la kupran tamburegon kaj aŭdis ankaŭ la paŝojn de soldatoj, do oni ne bezonas multe fosi. Li atendos ilin nokte je la dudeka horo. Sed ili devos ankaŭ garantii, ke la soldatojn el Kassa, starantaj ĉe la Malnova pordego, ili ne tuŝos. Ili interkonsentis. Noktomeze Hegedüs kondukis ilin kun lanterno. Mikse venis janiĉaroj, *asaboj* kaj *pijadoj*. Tri mil ekiris en la subtera galerio. La cetera parto de la trupo, Dio scias, kiom da miloj, atendis la malfermon de la du pordegoj. Sed okazis, ke ĉe la angulo de la cisterno la lanterno de Hegedüs frapiĝis kontraŭ la muron kaj estingiĝis. En mallumo li plukondukis la antaŭtaĉmenton. Li konis la vojon, sed la rando de la granda cisterno estas mallarĝa. Li orientiĝis tie malgraŭ la mallumo, sed la antaŭtaĉmento tumultis interpuŝiĝe kaj glitis en la akvon.

– Ĉu vi scias ion pri tio – demandis Dobó –, ĉu bejo Derviŝo forrabis la filon de iu el niaj leŭtenantoj?

– Jes, mi scias – respondis la turko. – De du semajnoj oni serĉas la infanon en ĉiuj tendoj. La bejo igas lin serĉi. Oni ŝtelis de li, aŭ li eskapis la trian tagon post la alveno.

Dobó rigardis al Hegedüs.

– Mizerulo! – li diris.

Hegedüs falis sur la genuojn:

– Indulgu min, kompatu min! – li kriis. – Mi eraris, perdis la saĝon.

– Ĉu vi mem konfesas, ke vi volis transigi la fortikaĵon en la manon de la malamiko?

– Mi konfesas.

La proceso daŭris ne pli ol unu horon.

En la sekva horo la leŭtenanto jam balanciĝis meze de la foirplaco sur pendumilo provizorita el la laboroj. Kaj Fügedy diskriis al la fortikaĵa popolo:

– Tiel mortos ĉiu ĵurrompinto, ĉu soldato, ĉu oficiro, kiu volas transigi la fortikaĵon en turkan manon!

Al la tri soldatoj oni fortranĉis la orelojn sub la pendumilo. La ceterajn sep oni komandis kun ĉenitaj piedoj al interna laboro.

La turkon oni elĵetis el la fortikaĵo de sur la alta, okcidenta muro tiel, ke nukrompita li falis inter siajn kunulojn.

La popolo de la fortikaĵo povis vidi, ke Dobó ne ŝercas.

Vi, forto, pli forta ol ĉiuj fortoj: patrina amo! Vi, sunlumo vestita en homa korpo! Vi, sankta flamo fluginta malsupren el la Dia koro, morton ne timanta, forta malforto!

Vi, kiu forlasas vian sekuran neston, viajn molajn kusenajn, ĉion, kio estas al vi kara, por veni kamuflita al viaj pereontaj amatoj! Vi, kiu kaŝe subiras en la profundon de la tero, vi, kiu volas penetri per viaj malfortaj brakoj tra muroj, kontraŭ kiuj centmiloj da armitaj bestioj blekas senpove! Vi, kiu ne konas maleblon, se temas pri viaj amatoj, se vi devas suferi kune kun ili, eĉ morti kun ili – mi admiras vin, virina koro!

Tra du noktoj kaj du tagoj ili fosis al si vojon ree kaj denove tra la falruinoj de la galerio, en la humida malvarmo, sub malfirmaj volboj. Kelkloke la enfalaĵo estis nur kelkajn paŝojn longa; per unuhora laboro ili baraktis trans ĝin. Sed kelkloke ili devis superi ankaŭ ŝtonojn kaj nek la malfortaj virinaj brakoj nek tiuj de la dek-kvinjara, cetere ankoraŭ neviriginta knabo estis kutimintaj al tia laboro.

Vespere de la tria de Oktoboro, apenaŭ la tendaro silentiĝis, ili prenis al sian restintan nutraĵon.

Laŭ iliaj kalkuloj apartigis ilin sole cent paŝoj for de la fortikaĵo. Ili esperis, ke ili ne bezonos ankoraŭfoje returniĝi.

Ili laboris dum la tuta nokto.

Sub la tero ili ne sciis, kiam krepuskas, kiam leviĝas la suno. Tra la tuta nokto ili aŭdis la obtuzan hufobruon de la ĉevaloj portantaj teron kaj fasĉinojn kaj aŭdis ankaŭ la tondradon de la fortikaĵaj pafilegoj kaj bombokanonoj. Ili ankaŭ pensis tie sube, ke okazas nokta sturmo kaj pli intense ili laboris, por eniri.

Sed ekstere krepuskis, mateniĝis kaj la suno leviĝis el post la montoj de Borsod. Vidante la forlasitecon de la tendo la servistoj de la turka ĉevalkomercisto enrigardis. La formovita muelŝtono kaj la larĝa truo mirigis ilin. Ĉar la kavalerianoj denove kolektis ĉiuloke branĉaĵojn, la komercisto kuris al *deliana* agao kaj preskaŭ tremante pro ĝojo anoncis al li:

– Sinjoro! La fortikaĵon mi faligos en la manon de la armeo. Nokte mi malkaŝis subvojon!

Tiuj multaj *delianoj*, *akingioj*, *beŝlio*j kaj *gariboj* tuj lasis surloke branĉaĵojn, ĉevalojn. Fajfiloj, klarionoj ŝrikis kolektiĝon. Ĉiaspecaj soldatoj tumultis intermiksiĝante, klakante, rumorante tra la enirfaŭko en la profundon.

Gvidis ilin la komercisto kun torĉo en la mano.

[...]

Kiam oni mallevis la ĉerkon, Varsányi suprenkriis al la homoj:

– He, homoj!

Je la krio aperis konsternitaj vizaĝoj supre en la pordaperturo de la sepulta kavo. Unu sen kapvesto, la alia en rusta, senornama kasko ligita per rimeno al la mentono.

Varsányi ree suprenkriis:

– Estas mi ĉi tie, Varsányi! Suprentiru min!

Li levis Evan en la brakoj kaj paŝis de ĉerko sur ĉerkon ĝis la ŝnuro. Li kunprenis la du ŝnurojn kaj ensidiĝis.

La homoj suprentiris ilin.

Ĉe la tombokavego troviĝis neniu alia, krom du pastroj kaj du kamparanoj tirantaj la ŝnuron. Ili gape rigardis Evan, kiu kuŝis kvazaŭ mortinto sur la herbo, kien Varsányi demetis ŝin.

– Alportu akvon – ordonis Varsányi al la kamparanoj.

En ĉi tiu momento ruĝa flamkolonego leviĝis supren el la Preĝeja bastiono. Ĝi pafiĝis ĝis la ĉielo; nigraj tabuloj, traboj, ŝtonoj, lignopecoj kaj homoj flugis en ĝi.

La fortikajon skuegis tia tondrego, ke ĉiuj estis surdigitaj kaj terenpuŝitaj.

El la aero faladis ŝtonpluvego, sango, armiloj, lignaĵeroj kaj daŭboj.

Morta silento daŭranta plurajn minutojn sekvis la eksplodegon.

Morta silento en la fortikaĵo kaj ankaŭ ekstere en la turka tendaro...

Ĉiuj duonkonscie gapis antaŭ sin.

Ĉu la ĉielvolbo subrompiĝis? Aŭ la tero malfermiĝis por, fariĝinte fajrosputa infero, inundi la mondon per apokalipsa, terura flamtorento?! Neniu komprenis...

„Turka artifiko!” Jen tio estis la unusola ideo en ĉiuj en la fortikaĵo.

„La fortikaĵo estas perdita!” Jen tio estis la unusola sento ŝtoniganta la korojn haltigitajn en sia pulsado.

Gregorio ŝnuris sube de la Aleksandra bastiono kruĉojn plenigitajn per eksplodaĵoj. La ventego de la eksplodo puŝegis lin kontraŭ la ŝildojn, najle pendigitajn sur la muro.

Kiam li levis la rigardon, supre ruĝis flamkolonego disfuneliĝanta en la alto, en kiu ŝvebis nigra muelrado kaj ĉirkaŭ ĝi dorse kuŝanta homo rondfluganta malsupren kaj aparte unu tuta homa gambo.

Li havis tiom da spiritĉeesto, ke li saltis sub la bastionan volbon, sed en la unua minuto ankaŭ li rigardis kun senpensa, forkonscia mieno antaŭ sin.

En la sekva momento tamen ekmovis sin la popolo de la fortikaĵo. Diskonfuzite kuregantaj homoj, soldatoj forĵetantaj siajn armilojn, veantaj-lamentantaj virinoj, sovaĝiĝintaj ĉevaloj ŝirintaj siajn bridojn videblis ĉie.

Kaj sube, en la turka tendaro triumfa hurleĝo, leviĝo de sturmeskaloj kaj miloj da armitoj ekondiĝantaj al la muroj.

– Fino al ni! – aŭdiĝis dise tra la fortikaĵo.

Virinoj, preninte siajn infanojn per la mano aŭ kaptinte ilin en la sinon, kuradis mise-konfuzite sur la fulgokovritaj ŝtonoj kaj nigriĝintaj traboj, kraketantaj ardaĵoj. Ĉiuj rifuĝis kaj neniu sciis, kien.

El la aero faladis densa, nigra neĝo. Tiel densa, ke oni ne povis vidi dek paŝojn antaŭen. Tio estis flugcindro. Ĝi traŝvebis la tutan fortikaĵon, kvazaŭ ĝi volus funebre kovri ĝin.

Kaj senformiĝintaj kadavroj kaj sangantaj homaj membroj diskuŝis ie kaj tie sur disflugintaj ŝtonoj kaj traboj.

Dobó nudkapa, tiregante la bridon de sia ĉevalo galopis al la eksplodejo kaj komandis la soldatojn sur la murojn.

– Nenio okazis! – li kriadis dekstren-maldekstren. – Nur dudek kvar tunoj da pulvo estis en la sakristio!

La oficiroj saltis ĉiuj sur la ĉevalojn kaj per la vortoj de Dobó ĉie re-trankviligadis la homojn:

– Reen ĉiu al sia loko! Nur dudek kvar tunoj da pulvo...

En sia furiozo Mekcsey bastonis per rompita lancofusto la konsternitajn kaj neobeantajn soldatojn:

– Prenu la armilon, hundnaskita leporido! Sur la muron!

Kaj li mem saltis de la ĉevalo. Li kaptis pezan lancon en la manon kaj kuregis sur la rundvojon. – Post mi, knaboj! Post mi, kiu estas homo!

La turkojn grim pantajn sur la murojn akceptis longa pafserio. La soldatoj el la interna spaco ankaŭ sen komando kuris sur la murojn kaj laboregis la madzoj, lancoj, sabroj kaj batalhakiloj.

La turkoj, same senorde, prempuŝadis unu la aliajn antaŭen-malantaŭen, kaj ekstere, ĉirkaŭ la muroj regis la sama konfuzego, kiel ene, intermure.

Plej multe da homoj tumultis al la eksplodejo.

Gregorio vidis de sia bastiono, kiel torentas la bunta turka armeo en la nigra cindroneĝado al la Preĝeja bastiono.

– Restu ĉi tie! – li kriis al Zoltay kaj li mem kuregis eltirinte sian sabron sur la Preĝejan bastionon.

Dumvoje li preterkuris la kaldronojn. En ili kuirigis supo por tiuj, kiuj tagmeze deĵoris kaj nun sekvis ilia vico tagmanĝi.

Gregorio ĵetis rigardon al la ok grandegaj kaldronoj, en kiuj la suko de haketita viando vaporis kaj susure bolis.

Li puŝis stangon tra la ansoj de la kaldrono kaj kriis al la telerdisdona kampulo:

– Prenu ĝin! Ankaŭ la aliajn portu sur la bastionon!

Kaj kiam ili supreniĝis, li elverŝis la varmegan supon sur la turkojn, dume plioblīgiĝintajn sur la eskaloj.

[...]

Tiutempe Dobó jam marŝis ĉe la Bolyky-turo, kie Gregorio akceptis la sturmon en miksodoraĉo de peĉo, pulvo kaj brulanta sebo.

Tiu talie kaduka turo fariĝis objekto de grandaj esperoj por la turkoj. Ili konsideris ĝin signo de bonŝanco, ĉar ankaŭ Temesvár falis pro turo, kvankam ĉe la unua sturmo ili ne sukcesis loki en ĝi soldatojn.

Ili amasigis teron ĉirkaŭ la turmuro, do de supre la defendantoj ne povis damaĝi ilin.

La turkoj prempuŝadis sin supren sub larĝaj sieĝtegmentoj. Pluvegis sur ilin flamantaj peĉ- kaj sebkronoj, tamen fine ili sukcesis suprenpremiĝi en la turon.

– *Allahu akbar!* Haku, tranĉu!

Kaj el la direkto de la Reĝa Seĝo miloj kaj miloj da armitaj turkoj kuregis al la fortikaĵo.

Ĉe la bazo de la turo hokstangoj kaj lancoj etendiĝis suben. Ili puŝadis, skrapis, hakis, kroĉis la baldakenojn.

Sed ankaŭ la turkoj ne senlaboris. El sub la tegmentoj pafadis *tufenĝioj*. Lancoj, grenadoj kaj sagoj flugadis de sube al la defendantoj.

Kirasita spahio saltis kun mortospito sur la muron kaj falĉante per ambaŭ manoj fergantitaj li disbatis la hokstangojn kaj lancojn. Kaj alia, tria sekvis lin.

Dum oni mortbatis ilin per madzoj, novaj tumultis supren post iliaj dorsoj.

Ne pasis pli ol unu minuto kaj ili jam suprenŝovis bovlede tegitan sieĝtegmenton sur la tursupron kaj el sub ĝi tridek-kvardek janiĉaroj genuante kaj surventre pafis la soldatojn batalantajn sur la bastiono.

– *Alahh! Allahh!* – hurlis sube miloj da gorĝoj.

– La triumfo jam proksimas! – kriaĉis *jasaŭloj*.

La kasko forruliĝis de la kapo de Dobó. Kun nuda kapo li kuregis al la kanonoj.

La hungaraj soldatoj starantaj en la interno de la turo povis neniel damaĝi la janiĉarojn starantajn supre, ĉar tiu turetaĝo jam estis plafonita per tabuloj, kiuj ne povis esti forpuŝataj pro la janiĉaroj starantaj sur ili.

– Tuj elvenu! – krivokis Gregorio, apenaŭ li ekvidis, ke Dobó alternas la kanonojn.

Kaj ne zorgante pro la janiĉaraj fusiloj ankaŭ li prenis hokstangon. Kroĉis ĝin je iu baldakenlanco kaj ektiregis ĝin.

La soldatoj starantaj sur la bastiono konsternite vidis la okupon de la turo. Ili ĉiuj prenis brulĵetaĵojn kaj superŝutis la suprenstrebantajn janiĉarojn per flamrivero.

Dobó vidis, ke la interligo de la janiĉaroj interrompiĝis. Li tuj ordonis direkti malsupren la du kanonojn kaj pafi al la janiĉaroj pliopiĝantaj sur la remparo.

Soldatoj de speco janiĉaro ne tro timas kanonojn. Du kugloj de du kanonoj ne povas multe malutili. Kaj al la tondrado ili jam al kutimiĝis. Sed la kanonoj de Dobó estis ŝargitaj per multaj kugleroj. Proksime pafante ili forbalais dudek-tridek homojn.

Terurite la janiĉaroj retiriĝis.

– Fajraĵojn sur ilin! Fajraĵojn! – eksonis supre ankaŭ la voĉo de Gregorio.

Kaj sur la janiĉarojn kaptitajn sur la tursupro flugadis peĉkronoj. La turkoj kaptadis konfuze, por forpuŝi la brulaĵojn, kaj ĉar ili jam forpafis siajn kuglojn, ili ne plu havis tempon reŝargi ilin. La fajroj kaj flamoj ĉiam pli densiĝis. Hurlante ili malsuprenĵetis sin el la infera turo. Kiu falis eksteren, havis bonŝancon: per unu krako rompiĝis lia nuko. Kiu saltis en la fortikaĵon, ankaŭ tiu ne longe dancis, ĉar tuj oni mortbatis lin tiel, ke apenaŭ restis al li ostoj nerompitaj.

[...]

Tiun vesperon kaj nokton la turkoj daŭrigis la sturmojn ĉe la Terbastiono.

Ĉi tiu granda lignodigo pretiĝis antaŭ la bastiono de Gregorio, ĝia supro leviĝis nur en triklafta distanco de ĝi.

La turkoj lerte laboris: ili metis la trunkojn tiel, ke ili mem estu konstante ŝirmataj kaj el post klaftalta ŝirmaĵo ili transĵetadis dikajn trunkegojn ankaŭ en la foson.

La foso videble ŝtopiĝadis kaj kreskadis la lignomonto laŭlonge de la ŝtonmuro.

Kaj ĉiam pli proksime al la muro!

Gregorio elrigardis jen tra unu, jen tra alia pafotruo por okulsekvi la malamikajn laborojn. Fine li supreniris al la palisparapeto.

Tie li trovis Dobó.

La kapitano staris en la kutima, ĝisgenua palto. Kun malpeza, nigra ŝtal-kasko sur la kapo.

– Sinjoro – alparolis lin Gregorio –, mi petas havigi al mi tiujn staplojn da ŝindoj, kiujn ni deprenis de la tegmentoj.

– Ili estu viaj.

– Krome mi petas sebon, peĉon kaj oleon.

– Mendu, kiom vi volas. Da sebo ne estas multe.

– Do kiom ni havas. Se malmultas sebo, do disponigu al mi lardon, multan.

– Ĉu lardon?

– Dudek-tridek tabulojn. Kiom entute eblas.

Dobó instrukciis returne al Kristoforo:

– Iru, vekigu Sukán. Li eldonu sebon kaj kvardek tabulojn da lardo el la nutraĵejo. Tuj oni alportu ilin!

Kaj nur poste li demandis: por kio?

Dum la turkoj staplis lignaĵon sur lignaĵo sube, la menso de Gregorio ne ripozis: elsaltigis la ideon ĵeti lardon, sebon kaj ŝindon inter la trunkojn kaj branĉaĵojn.

La turkoj ne atentis tion. El la fortikaĵo oni ja kutime elĵetadis ĉiaspecajn aĵojn sur ilin. Ŝtonoj, ostoj, fenditaj kuirvazoj, mortintaj katoj kaj tiaspecaĵoj ĉiuminute flugadis super ilin. La spanlarĝaj lardopecoj tute ne estis okulfrapaj inter la multaj fatrasoj. Se iu eble rigardis ilin pli atente, li aŭ ne konis ilin, aŭ ne sciis, por kio ili servas, aŭ se li konis ilin, kun naŭzo li forturnis sin.

Gregorio distranĉigis la lardotabulojn en spanlarĝajn pecojn kaj ordonis ĵeti ilin de tempo al tempo inter la lignaĵojn. Kaj dume faladis olefarbitaj ŝindoj, sebopecoj, pajlofaskoj. Kaj fojfoje li subĵetigis kelkajn argilpotojn volvitajn en pajlon.

La potoj estis ŝmirfermitaj per argilo kaj ĉirkaŭplektitaj per drato. Ene ili kaŝis pulvon kaj ŝargitajn tubopecojn, krome sulfuron en fingrograndaj pecoj.

Dobó observis malsupren.

– Kiam ili pretiĝos – li rimarkigis –, estos mateno. Kristoforo, rigardu, ĉu Mekcsey jam vekigis. Se jes, diru al li, ke mi nun kuŝiĝos. Se li ne estas vekiginta, lasu lin pludormi. Poste vi laŭiros la postenojn. Vi diros al ĉiuj, ke se ili vidos ian prepariĝon por sturmo, ili venu al mi en la angulturon por fari raporton. Ĉu vi ne kuŝiĝos, Gregorio?

– Hodiaŭ ne – respondis tiu. – Mi ĝisatendos la matenon.

– Kaj Zoltay?

– Mi sendis lin dormi, por ke matene li estu en plena forto sur la basti-

ono.

– Apenaŭ la trunkoremparo estos konstruita, igu veki min!

Li supreniris en la angulturon kaj lasis fali sin sur iun soldatan kuŝilon. Paĝio Kristoforo stariĝis kun eltirita glavo antaŭ la turpordo.

Laŭ paĝia devo. Li gardis la dormantan leonon.

Ĉe matenkrepusko la turka lignoremparo jam estas preskaŭ tiel alta kiel la fortikaĵa muro. Mankas nur unu kaj duono da klaftoj.

Gregorio ordonas ŝtopi ankoraŭ du kalkitajn kanonajn tubopecojn. Fikse batfermigas ilin per ligno.

– Nu, ĉi tiuj kanonoj neniel *pensuŝ*, ke ili ankoraŭfoje *pafoŝ*! – komentas la cigano.

– Novaj kanonoj el malnovaj – rimarkigas iu soldato.

– *Ŝe* novaj, ni donu al ili nomon – proponas la cigano. – Unu *eŝtu* Ciganido kaj la alia Kolombo.

Ĉar ĉiu kanono havas propran nomon.

Gregorio elpoŝigas plumbokuglon kaj skribas sur la pli malgranda kano: „Johano”. Kaj sur la pli granda: „Eva”.

Li subakseligas la du kanonpecojn kaj supreniras la bastionon.

La frua mateno rapide disfluigas sian helon sur la firmamento. Sube moviĝas la tendaro: klakado kaj paŝbruado proksimiĝas de ĉie.

Gregorio ordonas veki Dobó.

La soldatoj jam staras pretaj kun lancoj kaj hokstangoj sur la rundvojo. La fusilistoj tenas sur la prujne blankaj ŝtonoj freŝe pulvoŝargitajn tubojn. Ĉiuj tri kanonoj de la bastiono estas direktitaj malsupren kaj ambaŭ kanonoj de la Malluma pordego supren al la muroj.

– Bruligu la peĉkronojn kaj la fajrokrucojn – ordonas Gregorio – kaj elĵetu ilin!

La homoj metas sin al laboro.

Kiam Dobó aperas, la turkoj jam formike inundas la montetojn. La trunkojn kaj trabojn ili ankoraŭ stapladas kaj klake fiksadas. Ĝi jam estas tiel alta kiel la interna bastiono. Fojfoje ili transpuŝas trunkojn, por ĉie pleniĝi la interspacon de la du muroj. Da lignaĵoj troviĝas amasego. Tuta arbaro. Kaj la lignoremparo estas fortika. Sur ĝia supro ŝanceliĝas sieĝtegmentoj, zorge kovritaj per krudaj bovledoj.

La brulantaj pajlokronoj ne damaĝas la bovledon kaj kiuj faladas aliloken, tiujn la turkoj piede forpuŝadas.

Je akra fajfilsono miloj kaj miloj da *Bismallah*-kriegoj skuas la aeron. Orelŝire eksonas turka muziko. Kaj la giganta lignokonstruaĵo tamburegas de la paŝbruo de suprenkurantaj piedoj.

– *Allah! Allah!*

– Jesuo! Maria!

El sub la sieĝtegmentoj rapide elŝoviĝas mallongaj sturmeskaloj por traponti la lignan remparon al la ŝtonbastiono.

Sed jam ankaŭ la fortikaĵanoj staras pretaj supre. Samtempe cent fajrokronoj flugas super la turkojn. Brulantaj pajlofaskoj kaj sulfuro kovras la eskalojn kaj sur pajlon faladas peĉitaj ŝindoj.

La unua turka trupo, kiu volas enpenetri tra brulanta fajro, renkontas pintojn de lancoj kaj hokstangoj. La ceterajn akceptas sabroj, batalhakiloj, fajrokrucoj kaj pikilaj draŝilmadzoj.

Plenvizaĝa turko aperas levante grandegan ĉevalvostan standardon sur la lignostaplo, tri klaftojn for de Gregorio. Dum lia kapo fariĝas nura buŝo pro la Allah-kriegado, Gregorio kaptas la pli malgrandan kanonpecon kaj jetas ĝin en lian vizaĝon. La pli grandan li svingas en fajron brulantan malsupre.

La turkoj tute invadis la gigantan lignokonstruaĵon kaj ili certe trakuregus eĉ la flamantan fajron, se ne okazus subite insido: fusiloj kaj kanonoj komencas pafi ankaŭ de sube.

La argilaj potoj komencas eksplodadi kaj disjetegas brulantajn sulfurpecojn. Kvazaŭ fajrovoma abismo malfermiĝus sub ili.

– *Ja kerim! Ja rahim! Meded! Ej va! Jetiŝin!* – konfuzite ili kriegas.

Sed la *jasauĵoj* ne lasas ilin malsupreniĝi.

– Ni venkos! Jen la horo de la triumfo! – ili krias responde.

Kaj ili forsendas la malsupre restintojn por akvo.

Kaj per akvo kaj armiloj ili provas savi la gigantan lignokonstruaĵon pregitan ja dum pluraj tagoj kaj noktoj.

Sed tiutempe jam ankaŭ la sebo kaj lardo komencas fandiĝi inter la arbotrunkoj kaj la potoj ĉiam pli ofte dispafadas sulfuron kaj bruligas arbotrunkojn.

– *Ja kerim! Ja rahim!* En la fortikaĵon tra la fajro!

Ili ne volas kredi, ke tiuj grandegaj trunkoj povus bruliĝi.

Oni jam fervore portadas akvon en felsiteloj, akvujoj kaj ĉiaspacaj vazoj. Oni kuregas ĉien, kie flamoj elpafiĝas kiel ruĝaj ĉevalvostoj el la trunkostaploj. Freneze kaj terurite saltadante oni estingadas.

Sed la podio transformiĝis en gigantan brulŝtiparon. Nun komencas ekfajri la ŝargitaj fusiltuboj kaj la graso blufleme kraketante disŝprucadas en la okulojn de la estingantoj. Kun laŭteĝaj tondroj eksplodas unu post la alia ambaŭ kanonpecoj, kaj kie ili ekfajras, ili frakasas trunkojn kaj turkojn.

Infera teruro, frenezo kaj vehurloj! Tra la pontoj el sturmeskaloj tumultas el fumo kaj flamoj, kun nova kaj refoja fortostreĉo tiuj janiĉaroj, kiuj ne povas retiriĝi tra la fajro krakpafanta post ili. Kelkaj el ili svingas sin per senespera salto sur la ŝtonmuron kaj samminute refalas kun frakasita kapo.

La ceteraj frenezdancas sur la supro de la ŝtiparumo kaj frapadas per armilo la flamiĝintajn trunkofinojn.

Sed kiel vana klopodo! Ondegas ŝpruceganta flammaro laŭlonge de la muro kaj tempeste tondradas refojaj eksplodoj. La diablecaj ombroj dissaltantaj kaj kuregantaj inter la flamoj estas turkoj. La vestaĵoj ekflamas, ankaŭ la barbojn kaptas fajro, ekbrulas turbanoj. Ili dancas tra la teruraĵoj de la tera infero en la paradizon de Mahometo.

La varmego estas tiel arda ankaŭ sur la fortikaĵmuro, ke oni devas fortiri la kanonojn kaj la soldatoj devas ŝprucigi per akvo la ŝirmopostenojn, por ke la lignaĵoj ne ekflamu.

En la infera incendio hurlegas nesaveblaj vunditoj kaj trans la flamoj aŭdiĝas la sovaĝa pelblekado de *jasaiĵoj kaj* videblas la ade-ree eksusureganta vaporo, magra rezulto de la lastaj provoj de la fajrestingado.

Flamoj kaj fumo apartigas la du armeojn unu de la alia.

[...]

Kiam frumatene la giganta, turka armeo denove ekmovas sin por sturmo en la valo, la soldataro rigardas ilian ondiĝon kun la kolera ĝuo de bona prepariteco. La ekscito de venĝo kiel streĉita risorto vibras en iliaj muskoloj. Ili apenaŭ povas reteni sin. Dikmalalta junuleto elsaltas tra breĉo sur teramason, kontraŭ la muĝe inundanta turkaro kaj minacas ilin per sia sabro.

La soldatoj ridegas sur la muro.

– Kiu li estas? – demandas Zoltay, ankaŭ mem ridante.

– La malgranda Varga – oni diras. – Johano Varga.

La hometo resaltas, sed kiam li aŭdas la vastajn ridondojn, ankaŭ duafoje li elsaltas tra al breĉo kaj minacas la gigantan, turkan armeon.

Tiufoje *tufenĝioj* jam pafas al li kaj pro la kugloj li nun pli vikle resaltas ol antaŭe. Tio elvokas pli sonorajn ridegojn.

Tion jam ankaŭ Dobó vidis. Laŭde li kapsignis al li.

Vidante la plaĉon de Dobó, Johano Varga ek, ankaŭ triafoje elsaltas kaj ignorante la pluvantajn kuglojn aŭdace li priminacas la furioze suprenstrebantajn turkojn.

Flugas al li kugloj, grenadoj kaj lancoj. Neniu trafas lin. Li saltadas mokante kaj eligas al ili la langon. Eĉ, subite li turnas sin kaj tre nedece, tamen konvene al la okazo frapas certan postparton sian. Kaj vikle li resaltas tra la breĉo.

Kaj tion li faras antaŭ la nazoj de la turkoj! Antaŭ cent mil armitaj turkoj!

– Vi estas homo! – kriais al li Dobó malsupren. – Vi ricevos premion!

Kaj trankviliĝinte, ke tie ĉio estas en ordo, li sidiĝas sur ĉevalo. Li galopas al la Manova pordego. La turkoj ja nun ĉirkaŭprenas la fortikaĵon de oriento kaj sudo. Al ĉi du lokoj koncentriĝas ĉiuj fortoj de la atako.

Gregorio vestita en kiraso staras sur sia bastiono. Ĉirkaŭ li bareloj kaj la radego.

Li staras trankvile kiel rifo sur bordo de furiozanta maro.

Kaj la turkoj venas, inundas. Hurlanta, infera tempesto: *Bismillah! Bismillah!* La batalkriegoj subpremas por minutoj la akregan, fajfan muzikon de la tendara orkestro. Ĝi haltas poste kontraŭ la fortikaĵo sur la Reĝa Seĝo kaj ludas seninterrompe.

– Nu, baldaŭ vi dancos! – krias Zoltay.

La melodio estas vere ekscite ritma, instiga muziko.

Svarmas la turka armeo. Flirtas la ĉevalvostaj, lunornamitaj flagoj. Antaŭe la flava-ruĝa standardo de la janiĉaroj. Pli malantaŭe la blanke striita, verda flago de la *ulufeĝioj*. Ŝirmataj per ĝisgenuaj ŝildoj, vestitaj en kirasoj brue-klake antaŭenmarŝas la spahioj.

– *Allah! Allah!*

En la manoj ili tenas lancojn aŭ pikarmilojn. Sur ĉies artikoj pendas nuda glavo sur rimeno. Ĉe la talio alia glavo. Kure ili ekiras en densa amaso el la foso kontraŭ la bastiono.

– *Allahu akbar! La illah! Il Allah! Ja fettah!*

Responde malsuprenflugas nigra barelo kaj sputante fajron, saltadante ruliĝas kontraŭ ili. Spahio pikas antaŭ ĝi sian lancon en la teron, la dua, tria apude.

– *Allah! Allah.*

La kvara prenas ĝin por forĵeti en la foson. En tiu momento disŝprucas la barelo kaj kun flamvomaĵo disĵetas la antaŭtaĉmenton.

– *Allahu akbar!*

Kiam ili jam povus suprenrigardi, aperas la dua barelo inter ili. Ĝi sputas, pafas fajron en ĉiuj ĉieldirektoj. Ĝi haltas antaŭ homoj vestitaj en fero kaj disĵetas ilin.

– *Allah! Allah!*

Sed neniuj povas returniĝi. De sube miloj kaj miloj da suprenstrebantoj puŝpremas ilin. La antaŭirantoj dissaltas, alpremas sin al la muro, la posteirantoj retrocedas antaŭ la fajraĵoj elpafiĝantaj dek klaftojn longe.

Antaŭen, paganaro, antaŭen! Eĉ tra la fajro! Kaj torentas supren la densaj aroj de spahioj.

Sed jen tiam malfermiĝas la palisparapeto sur la bastiono kaj aperas en la alto giganta, fumanta tabulrado.

La mezo de la radego fumas; fumas kaj siblas. Ĝi ŝanceliĝas kaj skufalas

de la ŝtonmuro. Kaj ruliĝas kontraŭ la armeo de densaj miloj.

– *Ileri, ileri!*⁴¹ – aŭdiĝas ĉiufanke la krioj de agaoj kaj *jasauĵoj*.

Ĉe la apero de la radego eĉ la antaŭirantaj aŭdaculoj retrocedas.

Ĝi ankoraŭ ne atingas ilin, kiam eksplodas el ĝi la unua fulmo kaj kvindek-klafta fajroŝprucego, kies ĉiuj gutoj plubrulas kun blujaj flamoj post la elpafiĝo, ĉu ili falas sur vivanton, ĉu sur mortinton.

– *Gozunu aĉ! Sakin!*⁴²

La antaŭo de la turka armeo terurite ĵetas sin vizaĝen, kvazaŭ ili volus lasi pluruliĝi tiun diabloraĝon sur la propra dorso. Sed ĝi ŝanĝiĝas inter ili en dissparkantan flamradegon. Ĝi vomas fajron, sputas brulantan oleon, disŝutas violkolorajn fajrotulipojn sur nudajn kapojn, soldatajn mantelojn. Siblante, krakante, pif-paf-ante ĝi plusaltadas sur ili. El siaj spokoj ĝi kraĉas, ŝprucigas, pafas ruĝajn, blujajn kaj flavajn stelojn en serpentumantaj radioj.

– *Meded Allah!*

Eĉ la plej bravaj trupoj terurite retiriĝas, tretante unu sur aliaj rifuĝas antaŭ ĉi tiu infera miraklo.

Kaj la radego, kvazaŭ ĝi havus menson kaj volon, spursekvas la kurantojn, forbatas, priŝprucas ilin per vivanta fajro: flamanta oleo, brulanta sulfuro. Tiuj malŝargas siajn fusilojn pafante blinde unu la aliajn. Ĝi plensputas al ili la okulojn, buŝojn, orelojn, kolojn per fajro tiel, ke eĉ mortantoj transkapiĝas. Kaj la fajroradego ruliĝas plu. Longaj, flagraj fulmoj flugadas el ĝi kaj forbalaas la *jasauĵojn* kune kun iliaj ĉevaloj. Ĝiaj longaj flamoj bruligas ĝisoste, ĝia fumo sufokas. Ĝia tondrado surdigas. Ĝi vestas en flamojn la trupojn, preter kiuj ĝi amokas. Kaj spure de ĝi postrestas nur brulantaj mortintoj skuataj en fajroinfero kaj frenezule saltadantaj, flamantaj vivantoj.

Kaj vestita en fumnubo, la radego pluruliĝas dispafante centojn da fulmoj.

– *Jetiŝin! Jetiŝin! Allah!*

Estas tute vana la furiozado de la jasaŭloj, la najloskurĝoj, la vipado en la vizaĝojn de la kurantoj: ne plu troviĝas vivanto, kiu sturmus la fuorton.

Kaj aldone al ĉio ĉi la hungaroj kuratakas tra la breĉo kaj kiuj restis kuŝantaj survoje de la radego aŭ en la torporo de sia teruro, estas senindulge hakataj, tranĉataj, falĉataj.

– *Reen! Reen!* – aŭdiĝas la klarionvoko.

Gregorio apenaŭ povas rekomandi siajn homojn.

– *Barelojn surmuren! Barelojn!*

⁴¹ Antaŭen! Antaŭen! (turke)

⁴² Atentu! Atentu! (turke)

Kaj oni rulas, starigas novajn barelojn. Ankaŭ la resto de la turkoj diskuras de tie kun brua klakado, muĝado. Nur la kanonoj restas kaj la mire gápantaj *topĉioj*.

[...]

Dum la tempestoj de la sturmoj ambaŭ virinoj staris plorante, tremante ĉe la fenestro. Tra malgranda aperturo ili povis vidi nenion alian ol tien-reen kurantaj homojn, fumon kaj ekruĝantajn fajrojn, poste barbirojn, dum ili elportis ĉarpiojn, vazojn por akvo, stapligis kaj plenigis ilin per pura akvo. Kaj baldaŭ poste oni komencis porti vunditojn, unu post alia, ĉiam pli ofte kaj pli sangoplenajn.

Kaj tiam ilia tuta atento turniĝis al la vunditoj. Ho ve, denove oni portas unu! Ne Blazion. Ne Gregorion. Dank' al Dio! Ree oni portas... Sed eble tial oni ne portas ilin, ĉar ili estas jam deponitaj en la kadavrejo...

Kaj ili eĉ ne povis diri: „Dio estu kun vi!”

Krome Eva havas ĉi tie ankaŭ sian grandaĝan, duone kriplan patron. Ofte ŝi vidas lin ambli sur la vojo preter la palaco. Kun tiel granda pafarko surŝultre kiel li mem. Lia sagujo estas jen malplena, jen plena de sagoj. Ho kiom ŝi volus eliri:

– Patro! Patro mia! Gardu vin bone, via moŝto!

Kiam ĉi-tage la kanonoj ektondris, ambaŭ virinoj larmante ĵetis sin sur la kolon de la alia:

– Ni preĝu, kara!

– Ni preĝu, estimata!

Kaj ili genuiĝis, kun vizaĝo surtere. Ili preĝis.

Kaj kune kun ili preĝis ĉiutage, ĉiunokte unu kaj duono da miloj da virinoj fore, dise en ĉiuj regionoj de Supra Hungario. Kaj infanmanetoj kunkroĉiĝis en malproksimaj rifuĝejoj: senpekuloj preĝis por siaj patroj batalantaj en Eger.

– Bona Dio, konservu la vivon de mia patro! Rekonduku al ni la karegan paĉjon!

Inferaj tondroj-bruegoj, kanonpafado, trumpetado, Jesu-krioj, Alah-hurlado. Penetrantaj, pezaj fumnuboj...

Oni jam komencas porti vunditojn. La unua venas metita sur sangonigra brankardo. Juna, pala soldato. Lia gambo estas forpafita ĉe la genuo. La barbiroj iel-tiel bandaĝas ĝin. Kial ili pli klopodus, ĉu pansi por kelkhora espero, poste li ja certe mortos pro sangoperdo.

Kaj estas alportata la dua, tria kaj kvara. Ĉe iu la tuta vizaĝo estas sanga

ruinaĵo. Ambaŭ liaj okuloj mankas. La dentoj elvidiĝas el la vizaĝo. La kolon de la alia traboris sago. Oni devas eltranĉi ĝin. La tria premas la manon sur la dekstran flankon. La mano ruĝas pro la vundo. Inter liaj fingroj dikflue elŝprucas sango. Li sidiĝas sur la tero kaj atendas senvorte, ĝis liajn okulojn priombras la morto.

Dobó hufoklake pretergalopas la palacon. Sekvante lin, longe post-restante kuras paĝio Kristoforo.

– Kie estas la alia? – demandas la suferantaj okuloj de la patrino.

Tie kuras ankaŭ li direkte al la Aleksandra bastiono: li portas mesaĝon. Dank’ al Dio! Ho ve!

Jam tiom multas vunditoj, ke ili donas laboron al ĉiuj dek tri barbiroj. Nun oni alportas la trian turkan flagon. La kriado de la turkoj iĝas ĉiam pli furioza; la pulvofumo tute vualas la orientajn kaj nordajn bastionojn, la fumo sedimentiĝas ankaŭ sur la palaco. Kvazaŭ vintre, kiam la nebulo tiom densas, ke oni vidas ne plu ol tri paŝojn.

– Dio de indulgo – suspiras s-ino Balogh –, kio okazos al ni, se la turkoj penetros?!

– Tiam mi mortos! – respondas Eva pli pala.

Kaj ŝi eniras la armilĉambron. Elportas sabron, la ĉiutagan glavon de Dobó. Kun enpeniĝa mieno ŝi metas ĝin sur la tablon.

Tra la malfermita fenestro aŭdiĝas la ĝemado kaj veado de la vunditoj.

– Oj ve, miaj okuloj, miaj okuloj! – ploras iu. – Neniam plu mi vidos la belan mondon de Dio!

– Mi iĝis almozulo! – ĝemas la alia. – Ambaŭ miajn brakojn oni amputis!

Ĉirkaŭ la barbiroj tiom multiĝis vunditoj, ke tiuj apenaŭ kapablas bandagi ilin.

S-ino Balogh tremas tutkorpe.

– Ni devas eliri! – ŝi diras kun turmentata mieno! – Ni devas helpi al la barbiroj.

– Ĉu ankaŭ mi eliru? Mi ja eliros! Mi sentas, ke nek honorvorto nek ordono povas malpermesi la flegadon de vunditoj.

Vento forbalaas la fumon. S-ino Balogh malfermas la pordon, forrigardas al la Karcera bastiono. Ŝi vidas Dobó en fumnebulo: li svingas teruran sabrobaton sur la kapon de suprenpaŝanta turko kaj repuŝas la mortinton.

Paĝio Blazio staras malantaŭ li en ŝtalkingo kun mallevita viziero. Li tenas subaksele la lancon, madzon kaj alian sabron de sia sinjoro.

La suno fojfoje ekbrilas el la nuboj kaj fumo. La vetero estus cetere tremetige malvarma, aŭtuna, sed ho, ĝi estas somere varmega por la batalantoj! Per abrupta movo Dobó malbukas sian kaskon kaj jetas ĝin al Blazio.

Li eltiras poŝtukon el la zono kaj viŝas sian traŝvitintan frunton.

Senkaske li plubatalas.

Paĝio Blazio ne scias, kien meti la oritan kaskon: do li surkapigas ĝin al si.

Fumo plenkovras ilin. „Forflugu, fumo, flugu for!”

La fumokirilo, kvazaŭ ĝi aŭdus la krion de la patrino koro, maldensiĝas. Blazio staras samloke, li staras sur la rundvojo. La patrino volas kribi al li, „stariĝu pli malantaŭe, pli malsupre”, sed la filo ja neniel aŭdus ŝin en la infera furiozo.

Kaj kiam ŝi levas la manon por gesti al sia filo, la knabo lasas fali la armilojn de Dobó kaj kun malvigla movo tuŝas al si la kolon. Samtempe li ŝanceliĝas, turnas sin. De lia kapo falas kaj forruliĝas la orita kasko. La knabo falsterniĝas, sen movi ŝirme la manojn kontraŭ la tero.

Kun korŝira ŝriko la patrino ekpuŝas la pordon. Kuregas al la loko. Levas sian filon. Priveadas lin. Kovras lin ŝirme per sia korpo. Brakumas lin. Vokadas lin per lia nomo.

Dobó alrigardas ilin kaj levas la forruliĝintan kaskon. Mangestas al du soldatoj kaj montras al la knabo.

Tiuj prenas la knabon: unu ĉe liaj ŝultroj, la alia ĉe la genuoj kaj portas lin en la palacon, en la ĉambron de la patrino.

La knabo kuŝas kun sanganta kolo kiel pafita kolombo, senviva.

– Ho, mi ne plu havas filon! – vekrias la grizhara vidvino.

– Eble li nur svenis – opinias unu el la soldatoj.

Kaj li malbukas la vizieran kaskon, la brustoplaton kaj ceterajn kirasaĵojn de la paĝio.

Sur la kolo de la knabo faŭkas larĝa pafvundo. Tamen la kuglo eniris ne ĉe la kolo, sed tra la talio. Kaj ĝi elvenis ĉe la kolo.

La vizaĝo de la vidvino tordiĝas pro doloro. Ŝiaj okuloj sange koloriĝas. Ŝi kaptas de sur la tablo la sabron, kiun Eva ĵus elportis el la armilejo kaj elkuregas en la homtempeston, supren sur la Karceran bastionon.

Tie jam okupiĝas pluraj virinoj.

Malsupre ili boligas akvon, peĉon, plumbon. Vigle ili suprenportas tiun, kiu bolas: ili transdonas ĝin al la soldatoj.

– Ankaŭ malvarman akvon portu, trinkaĵon! – krias al ili la soldatoj, kiam ekestas paŭzetoj inter la sturmoj.

– En la kelon, virinoj! – krias Dobó malsupren. – Malfermu ĉiuj barelojn! Portu vinon en pokaloj al la soldatoj!

Parto de la virinoj, kiuj aŭdis la vokon, kuras kun flirtantaj jupoj por vino.

Licenciulo Emeriko iradas armita tien-reen antaŭ la kelo.

Vidante alkuri la multajn virinojn, li puŝas la ŝlosilon en la kelpordon.

– Por la oficiroj, ĉu ne? – li demandas s-inon Kocsis.

– Por ĉiuj, s-ro licenciulo, por ĉiuj! Ordono de la s-ro kapitano.

Licenciulo Emeriko enpuŝas la kelpordon.

– Malantaŭe vi trovos la pli bonajn! – li postkrias.

Kaj li mallevas la vizieron, eltiras la sabron. Ekkuras al la Karcera bastiono.

La turkoj ĉiam pli amase tumultas al la bastiono. Kelkaj eĉ sursaltas ĝin. Ĉi tiuj komencas murdan korp-al-korpan batalon kun la defendantoj. Dobó prenas iun ĉe la gorĝo, iun giganton, nur liaj ostoj pezas kvintalon. Li provas repuŝi lin. La turko fiksas siajn piedojn. Dum minuto ambaŭ spiregas kun elorbitigitaj okuloj. Tiam Dobó reprenas ĉiujn siajn fortojn kaj per ek-tordo li entiregas lin. Ĵetas lin de la alta parapeto sur la korton.

La kasko de la turko deruliĝas, li mem falas inter ŝtonojn. Sed li relevas sin kaj returnas la kapon por vidi, ĉu liaj kunuloj sekvas lin.

Tiam alvenas s-ino Balogh. Kun falka kriĉo ŝi svingas la sabron en la aero kaj la kapo de la turko apartiĝas de la kolo sub ŝia terura frapego.

Jam pluraj virinoj okupiĝas sur la bastiono. Pro la luktoj la soldatoj ne plu transprenas la bolantan peĉon, ŝtonojn, plumbon, do la virinoj mem suprenportas kaj ŝutas ilin inter fumo, polvo kaj flamoj sur la suprengrimpan-tajn turkojn.

Faladas mortintoj kaj plimultiĝas vivantoj. Ŝtonrulado, peĉo- kaj plumboverŝado purigas padojn sur la homplenaj muroj, sed la amasoj de mortintoj plifaciligas la supreniĝon de ripozintaj taĉmentoj. La vivantoj kaptadas la ĉevalvostajn flagojn de la refalantaj mortintoj kaj la *bonĉokoj* ree flirtas super la eskaloj.

– Alaho! Alaho! Ni venkos! Ni jam venkos!

Dobó mire ĵetas rigardon al la apude luktanta s-ino Balogh, sed li ne havas tempon eligi vorton. Ankaŭ li batalas. De lia brila kiraso fluas sango de la ŝultroj ĝis la kalkanoj.

La virino disdonas frapojn post frapoj al la suprenpuŝiĝantaj turkoj, ĝis trafas ŝin lanco kaj ŝi renversiĝas de la bastiono sur la podion.

Ne troviĝas homo, kiu fortirus ŝin. La batalondoj transfrapiĝas sur la supron de la muro. Vivantoj travadas mortintojn. Dobó saltas sur elstarantan eĝon kaj rigardas malsupren.

Jam ankaŭ la agoj ariĝas ĉe la murbazoj. Bejo Veli alportas grandan, ruĝan, velurstandardon sur ĉevalo. Ekvidinte ĝin la turkaj batalantoj eksplodas en novan jubilon.

– Alaho helpas! La triumfo proksimas!

La flago estas la triumfa standardo de paŝao Alio. Sur la pintoj de tridek

fortikaĵoj kaj kasteloj ĝi jam anoncis ĉi-somere la venkon de la turka batal-
forto. Neniam io alia atingis ĝin ol nur glorradioj!

Bejo Veli trapuŝas sin kun la standardo al la Ter-bastiono. Tie ŝajnas
plej laciĝi la defendo, ja jam ankaŭ virinoj batalas.

Dobó ekvidas la larĝan, solenan standardon kun ore brilantaj literoj. Li
mesaĝas al Petó kaj li mem transkuras sur la Ter-bastionon.

Tie luktas homo kontraŭ homo. Fojfoje aperadas figuro kun flago kaj re-
flugas en la profundon. Vualitaj en la kirliĝantaj polvo kaj fumo duelas la
batalantoj. Peĉkronoj kaj brulkukoj flugadas komete inter la fumnuboj.

– Jesuo, helpu! – ŝrikas virino.

Dobó alkuras en la momento, kiam suprenpaŝanta turko mergas ĝistenile
sian jataganon en la mueliston de Maklár.

– Pli vigle, hej! Pli vigle, hej! – tondras lia voĉo sur la bastiono.

Aŭdinte ĉi tiun voĉon nova forto animas la soldatojn. Inter hungarecaj
sakroj, neniel ŝuldigeblaj nun al ili, kun murda feroco ili repuŝadas la su-
prentumultantojn.

Dobó turnas sin kontraŭ la mortiginto de la muelisto. Li vidas, ke la
turko estas vestita ĝistalie en Derbenda ŝtalo. Ĝi deglitiĝas la glavon. Kun
rapida decido li ĵetas sin sur lin kaj premas lin malsupren sur la mortigitan
mueliston.

Sed la turko estas larĝaŝultra, ŝtalmuskola homo. Tordiĝe li provas deĵeti
Dobó. En sia senpova kolero li demordas ties fermanikon, poste subite tur-
nas sin vizaĝe supren. Sed tio egalas lian morton. Dobó trovas lian senŝir-
man kolon kaj senindulge forpremas el li la spiron.

Li ankoraŭ ne leviĝis, kiam dealte falanta lanco laŭte frapiĝas sur lian
kruron kaj disŝirante la ledan rimenon de la krurŝirmilo haltas en lia suro.

Dobó ekmuĝas kiel leono pro doloro. Falinte sur la genuon li kaptas al
sia kruro, liajn okulojn humidigas turmento.

– Sinjoro! – diras terurite paĝio Kristoforo. – Ĉu vi vundiĝis?

Dobó ne respondas, eltiras la lancon el la kruro kaj forĵetas ĝin. Dum
minuto li staras kun kunpremitaj pugnoj kaj sible prenas aeron, dum la unua
doloratako forpasas. Poste li piedpuŝas prove, ĉu lia kruro ne rompiĝis. Ĝi
ne rompiĝis, nur sangas. Apenaŭ la doloro foriĝis el ĝi, li kaptas sian sabron
kaj tigre ĵetas sin kontraŭ la turkojn enpremiĝantajn tra la breĉoj. Ve al tiu,
kiu nun venos renkonte al li!

Dum ĉi tie oni jam preskaŭ dente mordas unu la alian, apenaŭ dek
klaftojn for, ĉe alia breĉo plidensiĝas la malamika armeo.

La traboj de la breĉa ŝtopaĵo rompiĝas sub la premo de centoj da homoj
kaj la turkoj kun triumfa bleko puŝas sin internen, sen bezono grimpi sur la
muro.

Unu ŝovas, puŝas la alian. Kun armilo dekstramane, *bonĉoko* maldekstre. La antaŭirantoj saltas kun la *bonĉokoj* sur la bastionon. La postevenantoj kuras kontraŭ la vunditoj kaj virinoj atendantaj sub la podio.

Dume unu el ili puŝas per sia kirasita piedo ardaĵon kaj brulantajn ŝtupojn al iu kolono de la ĉarpentaĵo. La fajro komencas leki la kolonon per altaj flamlangoj.

Kun la vunditoj ili havas facilan aferon, sed la virinaro kaptas kun furioza ŝriko la kaldronojn kaj bolpotegojn.

La diktalia edzino de Gasparo Kocsis ŝutas varmegan akvon en la vizaĝon de longbarba agao tiel, ke kiam tiu kaptas al sia barbo, la mandibla dekorajo restas en lia mano.

Iu virino prenas flamantan ŝtipon ĉe alia fajro kaj frapas ĝin kun tioma forto en la vizaĝon de turko, ke la splitoj de la ligno fajrerante disŝpruciĝas. Pluaj virinoj paŝas jam armitaj kontraŭ la paganoj.

– Batu! Haku! – blekas la forĝisto el Felnémet.

Li alkuras kun sia martelego inter la virinojn. Tri paganoj luktas tie kun dorsoj turnitaj unu al la aliaj.

Unu li frapegas sur la kapon kun tia forto, ke la cerbo de la turko elŝprucas tra liaj nazoj kaj oreloj.

En la mano de la alia turko ekfulmas jatagano kaj mergiĝas ĝistenile en la ventron de la forĝisto.

– Vi venos kun mi en la transmondon, hundo! – blekas la forĝisto.

Kaj li ankoraŭfoje svingas sian duon-kvintalan martelegon super la kapo kaj falsidiĝas surteren metante la manojn sur la ventron, nur kiam li vidas, ke lia kontraŭulo sterniĝas vizaĝe, kun kasko platigita pro la terura batego, inter la mortintojn.

Tiumomente la virinoj jam ĉiuj kaptis al si diskuŝantajn armilojn kaj feroce-freneze, kun falkaj kriĉoj luktas kontraŭ la entrudiĝantoj. La kaptukoj falis. La haroj distaŭziĝis. La jupoj flirte tordiĝas en la senindulga batalo. Sed ili ne plu pensas pri sia virineco: ŝrike ili ĵetas sin kontraŭ la turkojn. Iliaj sabroj ne kapablas fortorni frapojn. Ili ricevas ne malmulte, sed ankaŭ ili ne restas en ŝuldo.

– Vivu la virinoj! – aŭdiĝas la voĉo de Pető malantaŭ ili.

Kaj ekvidinte la podion lekatan de fajro, li kaptas sitelon kaj verŝas akvon laŭ la kolono.

La ĉefleŭtenanto alkondukas ripozintan taĉmenton. Fulmante per sia sabro kate li saltas kontraŭ suprensaltantan *akingion*. Li haksternas lin inter la trabojn.

Dume la soldatoj disŝutas kiel glumojn la enpenetrantajn turkojn. Ili eĉ elkuras tra la breĉo.

Genuante sur la muro, kun spireganta brusto kaj elorbitigitaj okuloj Dobó rigardas malsupren, dum sango gutadas de lia glavo kaj barbo.

La furioziĝintaj Eger'anoj ĉiam pli ope elkuras tra la breĉoj ektermuren kaj batas la turkojn sub la bastiono inter kuŝantaj mortintoj.

– Reen! – kriegas Dobó per ĉiuj fortoj de sia gorĝo.

Sed en la batala tempesto ili ne aŭdas lian voĉon.

Iu soldato nomata Ladislao Tóth ekvidas la bejon kun la ruĝa velurstandardo. Li alsaltas lin. Kun blunderbuzo en sia mano. Li pafas al lia brusto. Kaj kaptas al si la standardon. Per alia movo li ĵetas la blunderbuzon en la vizaĝon de turko. Poste li resaltas kun la predo, dum liajn kvin kunulojn elkurintajn kun li, morthakas janiĉaroj.

Dobó vidas nur, ke bejo Veli renversiĝas de la ĉevalo kaj la triumfan flagon de la paŝao forprenas hungaro. Li montras lokon al la ripozinta taĉmento. Premtordas la sangosaturitajn ĉifonojn sur sia maldekstra brako kaj kuras malsupren al la breĉo. Petó jam staras tie deĉevaliĝinte kaj levas flamantan ŝtipon al bombokanono staranta antaŭ la breĉo.

La pafu repuŝas la janiĉarojn tumultantajn por la standardo.

– Ŝargu! – kriis Dobó al iu soldato. – Kvar restu ĉi tie. Ŝtonojn, trajojn ĉi tien, se restas tempo!

Kaj la fajra tempesto plufuriozas kun renoviĝanta forto sur la bastiono.

[...]

Eva restis sola kun la mortinto.

Dum minuto, kvazaŭ ŝtonigita, ŝi fiksrigardis lin, poste ekmovis sin. Ŝi surmetis sur sian kapon lian kaskon, sur sian bruston lian platkirason, sur siajn brakojn liajn fermanikojn. La knabo estis samalta kiel ŝi. Ŝi vestis sin per liaj vestaĵoj.

Ŝi trovis la sabron de la knabo mallonga. Eniris la ĉambron de Dobó kaj deprenis rektan, longan rapiron italan de sur la muro. Ŝi ligis la tenilrimenon sur sia pojno.

La ingon ŝi lasis tie.

Ŝi elsaltis tra la pordo kun la nuda rapiro. Ekkuris. Ŝi mem ne sciis, kien. Ŝi sciis, nur ke ŝia edzo kune kun Zoltay defendas la fuorton. Sed ŝi ne sciis, en kiu direkto ekiri el la palaco.

La suno jam estis subiranta, sed tra la ĉiufanke kirliĝanta fumo ĝi aspektis kiel arda kanonkuglo restinta pendants en la aero.

Laŭ la mapo ŝi rememoris, ke la fuorto situas serpoforme apud la „testudo”.

La suno subiras dekstramane, do ĝi devas esti maldekstre.

Dek malpuraj, fumŝmiritaj soldatoj venis klakante renkonte al ŝi. Kure ili proksimiĝis. Kun kaporalo ĉekape. La dekstraj brakoj kaj flankoj de la soldatoj nigris pro sango. Surŝultre ili portis lancon. Ili kuregis al la Karcera bastiono. Post ili ŝanceliranta soldato... El lia vizaĝo fluis sango. Certe li volis iri al la barbiroj. Ankoraŭ kelkaj malcertaj paŝoj kaj li sterniĝis surtere.

Momenton Eva hezitis, ĉu levi lin. Sed ankaŭ dua kaj tria mortintoj aŭ svenintoj kuŝis tie. La tria estis la pli aĝa filo de la urbestro de Eger. Ŝi konis lin el la fenestro. El lia brusto elstaris sago.

Virinoj kuris spiregante el la direkto de la kelo. Kun lignopokaloj sur la kapo, kuvo aŭ ansa poto en la mano.

Ankaŭ ili klopodis orienten. Eva aliĝis al ili. Preterkurante la stalojn ili malaperis en milde dekliva tunelo. En ĝi brulis du lanternoj.

Tio estas la Malluma pordego. Ĝi kunligas la eksteran murarkon kun la supra muro.

Kiam ili transpasis ĝin, ili venis en inferon bruegantan en polvo kaj fumo.

Mortintoj kuŝas dise-vaste sur la tero, supre sur ŝtupoj kaj podioj. Iun Eva rekonas: pastro Valenteno. Li kuŝas surdorse. Kasko mankas sur lia kapo. Lia longa, blanka barbo ruĝas de sango. En la mano li ankoraŭ tenas la sabron.

Eva kaptas madzon de sur la tero kaj suprenkuras la ŝtuparon. La batalo jam furiozas preskaŭ korp-al-korpe. Starante sur la muro la soldatoj repuŝadas la turkojn. Virino frapas per brulanta trabofino el la alto. Alia svingas fajrokrucon kaj ĵetas ĝin sur la kolon de turko. Sakroj, Jesu-krioj, Alah-blekoj, tamburado de paŝoj, krakegoj, knalado ĉiuflanke.

Sur la bastiono ektondras du kanonoj unu post la alia.

Je la pafo Eva alrigardas. Li vidas sian edzon, dum li tenas fumantan meĉon kaj streĉe rigardas malsupren por vidi la trajektorion de la pafo.

Kvin aŭ ses turkojn restintajn sur la parapeto oni forbatas, poste sekvas unuminuta paŭzo. La soldatoj turnas sin ĉiuj malantaŭen kaj el tuta gorĝo krias:

– Akvon! Akvon!

Kaskita, maljuna soldato krias apud Eva de sur elstaranta ŝtono de la murrompaĵo. Sur lia vizaĝo rose perlas sanga ŝvito. La okuloj apenaŭ elvidas tra la sango.

Eva rekonas sian patron.

Ŝi forkaptas pokalon de virino kaj etendas ĝin al li. Ŝi tenas ĝin, helpas al li trinki.

La maljunulo avide glutas. En la pokalo estas ne akvo, sed malnova, ruĝa Eger'a vino.

La maljunulo longe trinkas. La ruĝa vino gutas de liaj lipharoj, kiam li debuŝigas la pokalon por skue kapti aeron.

Eva vidas, ke flamas la dekstra mano de la maljunulo. Ja ne mirinde: ĝi estas el ligno ĝis la artikoj; certe peĉita pajlo bruligis ĝin. La maljunulo eĉ ne perceptis tion.

Eva lasas fali la pokalon kaj la madzon, kaptas al la brako de la maljunulo. Ŝi scias, kie ĝi estas alkroĉita. Per rapidaj fingroj ŝi malbukas ĝin kaj la ligna mano flugas inter la turkojn.

Kaj la maljunulo prenas sian sabron kaj elklininte sin tra la parapeto, per la maldekstra mano li ree faligas ĝin sur rotangan ŝildon garnitan per kupraj lunoj.

Eva kuras pluen al sia edzo. Preskaŭ ĉiupaŝe ŝi devas transsalti mortintojn. Fojfoje brulantaj faskoj preterflugas antaŭ ŝiaj okuloj. Jen antaŭ, jen malantaŭ ŝi frapiĝadas kugloj en la muron. Sed la soldatoj ĉiuj trinkas. Ili petis nur akvon, ankaŭ ĝi estus nektaro por ili. Kaj la vino? Kvazaŭ dian forton ili verŝus en sin!

En la bruon de la malsupre kirliĝantaj krioj de la turkoj intertondras la stentoro de Zoltay:

– Nun venu, hundoj! Lasu min mesaĝi al Mahometo en la paradizon!

Kaj post unu minuto:

– Bonan nokton!

La turko, al kiu li turnis sin, certe forgesis reciproki lian saluton.

– *Ileri! Ileri!* – aŭdiĝas senĉese la blekoj de la *jasauĵoj*. – Ni venkos! Ni venkos!

Novaj amasoj, novaj eskaloj, novaj ŝildoj svarmas sur la montetoj de mortintoj.

– Alaho! Alaho!

Eva fine trovas Gregorion, kiam tiu ĝuste bruligas la meĉon de bareleto plena de pulvo kaj faligas ĝin malsupren.

Li forĵetas sian kaskon sur la teron. Saltas al virino. Forkaptas de ŝi la pokalon kaj trinkas tiel avide, ke ambaŭflanke de lia buŝo disriveras la ruĝa vino.

Eva etendas sian vinon al alia soldato. Ŝi lasas ĝin en lia mano.

Ŝi forturnas sin por la kasko, sed apenaŭ ŝi klinas sin, peĉofumo trafas ŝiajn okulojn. Ŝi forviŝas la larmojn el la okuloj kaj regajninte la vidkapblon ŝi ne plu vidas Gregorion.

Kiam ŝi rigardas ambaŭflanken, la soldatoj ĉirkaŭ ŝi subite kaŭriĝas.

[...]

Kiam Eva revenas, por resti ĉe Gregorio, en la granda fumo ŝi ne vidas homojn, nur zigzage flugantajn, ruĝajn, grandajn flamojn kaj inter flamoj kaj fumo ekfulmadantajn glavojn.

– Alaho! Alaho!

– Bum! Bum! Bum! – tondras kanonoj.

La fumo plidensiĝas, sed subite ĝi leviĝas super la kapojn de la defendantoj, kvazaŭ blanka littegmento aranĝita laŭ rondetaĵoj. Kaj klare videblas, kiel fulmadas supren la turkaj kaj malsupren la hungaraj armiloj.

– Akvon, bolakvon! – krias Gregorio.

Videblas, ke malsupre la fera kovrilego leviĝas. Kvintalaj ŝtonegoj falegas de sur la muro. La fera kovrilo malfermiĝas kaj englutas ŝtonon. Poste ĝi ree kunfermiĝas.

– Varmegan akvon! – krias ankaŭ Zoltay alkurante.

Apenaŭ Gregorio ekvidas Zoltay, li saltas al la kanono.

La rezino jam atendas lin en unufunda barelo.

Gregorio renversas la barelon kaj ordonas al la kanonistoj:

– Ŝtopu ĝin en la kanonojn post la pulvo! Kiom vi povas! Enbatu ĝin, por ke ĝi dispolviĝu! Malmultan ŝtopon sur ĝin!

En tiu minuto oni malsuprenverŝas la varmegan akvon de sur la muro.

Kien ŝtonoj ne povis penetri, la varmega akvo atingas. La baldakenoj subite ŝanceliĝas kaj disloziĝas. El sub ĝi elsaltadas turkoj hurlante *ej va* kaj *meded*.

La „fajrocimoj” restis sur la muro. Al ili Gregorio pafis per haŭbizo. Tamen restis kelkaj sur la muro. Gregorio kuras al ili kun ŝtopostango.

– Gregorio! – aŭdiĝas la voĉo de Petó.

– Jen mi! – respondas raŭke Gregorio.

– Mi alkondukis kvindek homojn. Ĉu sufiĉe?

– Alkonduku ankoraŭ, kiom eblas! Igu nutri malsupre la fajrojn kaj dek homoj transportu ĉion.

La rea pafserio de la *tufenĝioj* intermiksiĝas kun la fumo de la haŭbizo kaj vualas la muron por minuto. Ĉi tiun minuton profitas la leĝere vestitaj murgrimantoj por denove plenkovri la eskalojn.

Gregorio rekuregas al la kanono.

– Ĉu jam ŝargita? – li anhelas.

– Jes – respondas la maljuna Gasparo Kocsis.

– Fajro!

La kanono elsputas fajron kaj ektondras.

La rezino elŝprucas kiel dudek-klafta flamkolono. Forsaltas de sur la muro eĉ tiuj turkoj, kiujn atingas nur la aerpuŝo.

La puriĝon de la muro sekvas la kolera muĝado de *jasauĵoj* kaj oficiroj.

De sur la bastiono bone videblas, kiel forkuras ĉiuj soldatoj de la muro. *Asaboj, pijadoj, museletoj, delianoj, spahioj, gariboj, akingioj* fuĝas intermikse, teruritaj al la terŝirmaĵoj. Kaj videblas, kiel provas reteni ilin multaj *jasaŭloj* kaj agaoj. Ili rebatas la kurĵetiĝintan amason ne plu per skurĝo sed glavo. Kaj tiuj kun sanganta kapo, ŝaŭmantaj pro furiozo kaptas ree la sturmeskalojn kaj kuregas nun rekte al la muro, kie staras la hungaraj kanonoj.

La derviŝo gvidas ilin. Li ardas de batalfuriozo. Lia blanka froko jam ruĝas pro sango. Kun la multekosta *bonĉoko* interdente, sen ŝildo li kuregas supren.

Sur la najbara eskalo grimpas agao, larĝŝultra giganto. Lia turbano estas granda kiel cikonia nesto. Lia glavo similas al ekzekutista hakglavo.

Gregorio flankenrigardas kaj denove vidas apude la paĝion portantan ŝtonojn. Pene li levas grandan konstruŝtonon kaj ĵetegas ĝin malsupren.

– Blazio – diras Gregorio al li –, foriru de ĉi tie!

Lia raŭka voĉo klare tintas ĉe la lastaj vortoj.

„Blazio” ne respondas. Ŝi tenas en la mano la italan rapiron prenitajn el la ĉambro. Ŝi rapidas al la eskalo, sur kiu la derviŝo venas supren.

Gregorio ĵetas rigardon malsupren.

– Hajvano! – li krias al la aperinta giganto. – Ho, vi granda bovo, vi bubalo! – li daŭrigas turke. – Ĉu vi do kredas, ke armilo ne damaĝas vin?!

La turko konsterniĝas. Lia larĝa, granda mieno fiksiĝas ŝtonigita al Gregorio.

Tiun minuton profitas Gregorio. La lancon, kiun li tenas en la mano, li ĵetas en la bruston de la turko.

Tiu kaptas per unu mano la lancon kaj per la alia svingas teruran baton al Gregorio. Sed la frapego trafas malplenon kaj la grandega korpo falegas dorse sur ladtegitan sieĝtegmenton.

Dume la derviŝo atingas la mursupron.

Eva evitas la pikon de lia lanco per flankenkapto de sia kapo. En la sekva momento ŝi alfrapas lin per la rapiro kaj trafas la maldekstran brakon de la kroĉiĝanto.

Sur la brako de la derviŝo disduiĝas la lana froko kaj ekglimas sub ĝi brila maŝkuto.

Per eksalto li aperas sur la mursupro. Premante la rimene pendigitajn sabron en la mano, li ĵetas sin kontraŭ Eva.

Tiu resaltas du paŝojn. Fikse ŝi tenas la rapiron antaŭ si. Kun rondigitaj okuloj ŝi atendas la atakon.

Sed la turko jam longe vizitas la lernejon de la mortigo: li vidas, ke li staras kontraŭ rapiro kaj ne glavo. Li scias, ke ne estas konsilinde kontraŭkuri etenditan, longan ponardon. Per piedfrapo li bridas sin kaj frapas sur la

rapiron por flankenbati ĝin kaj sendi per alia hako la paĝisimilan junuleton en la mondon de animoj.

Sed Eva konas ĉi tiun hakon. Ŝi fulmrapide rondmovas la rapiron de sube supren kaj evitas per tio la turkan sabron. Kiam la turko volas svingi duafoje, la rapiro de Eva glitas al li subakselen.

La turkon savis lia maŝkuto. La ŝtalĉeneroj ja krakas, sed la derviŝo samtempe rebatas kaj la sabro trafas Evan sur la kapo.

Eva sentas, kvazaŭ ŝia kapo disrompiĝus. En ŝiaj okuloj estingiĝas la lumo. La tero kvazaŭ malaperus sub ŝiaj piedoj. Ŝi levas la brakon antaŭ la okulojn kaj sake falsterniĝas apud kanono.

21

Kiam Eva rekonsciiĝis el la torporo, silento regis ĉirkaŭe. Kie ŝi estas..., ŝi ne scias. Ŝi pene rigardas. Rekonsciiĝadas. Ruina ĉarpenaĵo... Inter la traboj pura, lunluma nokto kaj blanke brilantaj steloj... La talion dolore premas io malmola. La kapo ripozas en ia malvarma malsekaĵo...

Per malvigla movo ŝi palpas sub sia talio. Ŝi sentas ŝtonpulvoron kaj pomgrandan ferglobon.

Tiam subite ĉio klariĝas al ŝi.

Estas silento. Do finiĝis la bataloj. Kaj kiu regas en la fortikaĵo? Ĉu la turkoj aŭ la hungaroj? Sur podio aŭdiĝas la samritma, malrapidema paŝbruo de postenanto: unu, du, tri, kvar...

Eva volas levi sin, sed ŝia kapo pezas kvazaŭ plumbo. Tiom ŝi tamen vidas danke al ĉi tiu movo, ke ŝi troviĝas proksime al bastiono kaj apude kuŝas virino surventre kaj soldato sen kapo.

Dio kompatema, se la turkoj regas...

EPILOGO

Kiam antaŭ la sieĝo Dobó petis helpon de la tutlanda asembleo en Szikszó, oni respondis al li, pli precize al Mekcsey, lia delegito:

– Kial vi restis en viaj oficoj, se vi ne sufiĉas por tio?! Se vi kuiris la kaĉon, ankaŭ elkuleru ĝin!

Responde al tio ambaŭ kapitanoj demetis siajn oficojn post la sieĝo.

La tuta Eŭropo aplaŭdis kaj jubilis aŭdinte pri la venko. La papo en Romo celebris dankomeson. La reĝon glorigis gratulaj leteroj de ĉiuj flankoj. La Vienanoj admiradis la flagojn preditajn for de la turkoj kaj send-

itajn al Vieno. (La velura standardo de paŝao Aljo certe ankaŭ nun troviĝas inter la ceteraj militaj trofeoj de la Habsburgoj.)

La reĝo sendis la tutlandan ĉefkapitanon Matiaso Sforza al Eger por instigi Dobó kaj Mekcsey al resto. Sed ili restis neŝanceligeblaj.

– Ni plenumis nian devon – respondis Dobó. – Se nur ĉiuj estus plenumintaj la sian! Transdonu al lia reĝa moŝto la esprimojn de nia honora respekto kaj omaĝo.

La reĝo poste nomumis Gregorion Bornemissza por la ofico de Dobó ĉefkapitano de la fortikaĵo de Eger.



Géza Gárdonyi (1863-1922)

Ĵurnalisto, aŭtoro de noveloj, romanoj kaj unu teatraĵo. Unika figuro en la hungara literaturo ne klasigebla en kian ajn kategoion. En siaj historiaj romanoj li ĝis plej etaj detaloj, sed ĉiam atentokapte kaj eventoriĉe kondukas la leganton en la ĉiutagojn de la historia Hungario. La desegno de la epoko kaj la plastikeco de de la figuroj faras valoraj liajn romanojn. Ili fariĝis popularaj ne nur danke al ties turnoriĉaj agadoj, sed al valoroj, kiel kredo, patrujamo kaj individua kuraĝo.

La leganto tenas en la manoj romantikan, historian aventurromanon pri la unua duono de la 16a jarcento. Ĝi kaptas la atenton per spirhaltigaj aventuroj, fuĝoj kaj fuĝigoj, emociigas per amo kaj malamo, fidelo kaj perfido, sinofero kaj insidoj, kondukas la leganton al pitoreskaj kaj ekzotikaj pejzaĝoj, pentras la vivon, morojn kaj la ĉiutagojn de la 16-jarcentaj Hungario kaj Turkio, priskribas la luktojn de lando kontraŭ du grandpotencoj kaj okazintaĵfidele – tamen atentostreĉe – fabelas pri la heroa defendo de fortikaĵo kontraŭ enorma superforto, heroeco de virinoj, patrujamo. La historiografie dokumentitaj personoj kaj okazintaĵoj transkoloriĝas per la inventema fantazio de la aŭtoro – rekvizitoj de ĉiu bona romano.

La verko konsideriĝas la plej populara junulara romano en Hungario.